

INTERNACIA LINGVO  
**ESPERANTO**



LERNO- KAJ LEGOLIBRO  
KUN VORTKLARIGOJ

*Kunmetis*

**FRANO NOVLJAN**  
*profesoro de reala gimnazio en Bjelovar*

---

---

ELDONIS „LA SUDA STELO“ © SLAV. BROD © PRESEJO VILIM BUK

1932

## Predgovor.

Esperanto je mnogo lakši od svih drugih živih i mrtvih jezika. Uza sve to mora učiti svaki, koji ga želi dobro naučiti. Da to učenje olakšam, sastavio sam ovu knjižicu. Ona pruža i gradivo za vježbanje duha.

Samouk će najprije dobro naučiti uvod i prve tri lekcije. Naročito će paziti, kako se iz esperantskog prevodi na naš jezik i obratno. Pregledat će i riječi u trećem dijelu, da se priuči na uporabu rječnika, a ne će prijeći na četvrtu lekciju, dok nije točno naučio ono, što je u uvodu i u prvim trim lekcijama. Ne treba se žuriti, nego valja pričekati, dok se novostečeno znanje u našem pamćenju sredi i učvrsti.

Svaku vještinu najbolje učimo prakticirajući je, a jezik govoreći ga. Stoga učenika već u prvoj lekciji silim da govori esperantski. Dijete svoj materinjski jezik nauči dobro, premda nije učilo gramatičkih pravila. Svaki je narod stoljećima i tisućljećima pravilno govorio svojim jezikom, a o gramatici nije imao ni pojma. Tek mnogo kasnije stadoše učenjaci proučavati jezik i njegovu gramatiku. Istim načinom napredujemo i mi u ovoj knjizi: najprije govor, a učenik je ujedno i učenjak, koji otkriva gramatička pravila. Učitelj ga samo vodi i pomaže mu, gdje treba.

Esperantski tekst čitaj *glasno*, da ti se jezik i uho priuče na novi govor. U tu svrhu prepisuj, a kod toga sam sebi glasno diktiraj. Najbolje je učiti u dvoje: jedan neka čita ono, što govori učitelj, a drugi ono, što govori učenik. To će trajati tako dugo, dok razgovor ne bude tekao glatko i s potpunim razumijevanjem, a onda će oni svoje uloge promijeniti. Ta dva suradnika mogu, prema primjerima u knjizi, samostalno voditi razgovore i o drugim predmetima; dakako samo esperantski!

Tko želi neki jezik naučiti, mora učiti s razumijevanjem, u tu svrhu mora *misliti*. Naši razgovori navode učenika na razmišljanje i potiču ga na *samostalan rad*. Prve poteškoće neka nikoga ne prestraše! Putujemo li u neki grad, kojega već iz daljine možemo na svom putu vidjeti, najprije ćemo zamjetiti samo njegove glavne crte. Kasnije ćemo već razabrati tornjeve i velike zgrade, a kad u grad dođemo, moći ćemo u njemu točno sve razgledati i upoznati. Tako se i znanju jezika postepeno približavamo.

O uporabi ove knjige u esperantskim tečajevima ne trebam govoriti, jer svaki će učitelj znati, kako da se njome najzgodnije posluži. Glavno je u tečaju neprestano govoriti esperantski, jer je šteta vremena, koje se potroši govoreći narodnim jezikom. Polazeći od poznatoga k nepoznatomu učitelj će lako postići, da ga učenici razumiju, a doskora da i sami progovore međunarodnim jezikom.

Sastavljajući ovu knjigu u prvom sam se redu poslužio svojim iskustvom, koje stekoh poučavajući u raznim esperantskim tečajevima a naročito vodeći svoju dopisnu esperantsku školu, ali se poslužih i raznim udžbenicima. Naročito mi je poslužila gramatika Paula Fruictiera u preradi S. Grenkampa.

Bjelovar, u rujnu 1932.

*Fran Novljan*

## Uvod.

1. U Esperantu za svaki glas imamo samo po jedno slovo, a svaku riječ čitamo onako, kako je napisana.

### Alfabet.

A, a; B, b; C, c; Ĉ, ĉ (čitaj ĉ); D, d; E, e; F, f; G, g; Ĝ, ĝ (čitaj dž); H, h; Ĥ, ĥ; I, i; J, j; Ĵ, ĵ (čitaj ž); K, k; L, l; M, m; N, n; O, o; P, p; R, r; S, s;Ŝ, ŝ (čitaj ŝ); T, t; U, u; Ŭ, ŭ; V, v; Z, z.

### Imena slova.

A, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.

### Izgovor.

Izgovor esperantskih glasova je isti, koji i u srpskom, hrvatskom i slovenačkom jeziku. Nije nužno glas *ĥ* u izgovoru razlikovati od *h*. Glas *ŭ* dolazi samo u spoju *aŭ*, *eŭ*, pa tvori dvoglas, u kojem se glas *u* posve slije s glasom *a* dotično *e*. Isporedi: *jauk*, *jauknem*, *nauiditi*; *neuk*, *eufonija*, *sveumnik*.

2. Sve međunarodne riječi (t. j. takozvane tuđe riječi u narodnim jezicima) preuzima Esperanto, ali im daje esperantski oblik.

3. Svaka se riječ sastoji od jednoga ili više slogova. N. pr: Dan, noć, sin; ma-ti, o-tac, tra-va, pa-da-ti, le-ža-ti, pre-sli-ca; pre-la-že-nje, si-la-zi-ti, sud-bo-no-san; u-dru-ži-va-ti, stram-pu-či-ti, raz-ve-se-lja-va-ti.

*U esperantskom jeziku naglašen je predzadnji slog t.j. u izgovoru treba ga jače istaknuti kao u: brdovit, vrednoća, vreteno, cjelina, devedeset, gologlav, jasenik, kojekakav, kokošji, mitropolit, nevidljiv, ogrepsti ogrtač, samokres.*

*U esperantskom jeziku nema duljine, stoga se niti je-dan samoglas ne smije u izgovoru poduljiti.*

*Svaki glas treba jasno izgovoriti.*

## Vježba za čitanje.

(Deblje štampano glasom jače istakni, naglasi!)

Telegrafo, telegrafisto, telefono, telefonisto, fabriko, fabri-  
kisto, pošto, poštisto, aŭtomobilo, aŭtomobilisto, biciklo, biciklis-  
to, sporto, sportisto, balono, aeroplano, Januaro, Februaro, Marto,  
Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, No-  
vembro, Decembro, gramatiko, fiziko, historio, ĥemio, arhitek-  
turo, matematiko, geometrio, parlamento, senato, katoliko, pro-  
testanto, evangelio, anĝelo, literaturo, banko, ministro, teatro,  
muziko, socialisto, komunisto, bolŝeviko, maŝino, ĵurnalo, profe-  
soro, doktoro, advokato, medicino, astronomio, metro, kilometro,  
gramo, kilogramo, litro, hektolitro, dinaro, liro, ŝilingo, marko,  
franko, Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko, Aŭstralio, Romo, Lon-  
dono, Beogrado, Berlino, Zagrebo.

Ĉeko, ĉefo, ĉe, eĉ, voĉo, ĉapo, ĉapelo, ĉio, ĉasi, ĉasisto;  
ĝi, ĝis, ĝiro, ĝusta, ĝenerala, ĝardeno, kuraĝa, ruĝa, burĝono;  
ĥameleono, ĥaoso, ĥemio, ĥirurgo, ĉeĥo, monaĥo; ĵurnalo, ĵus,  
ĵaketo, aĵo, manĝaĵo, legaĵo, trinkaĵo, ŝaho, ŝako, ŝalo, ŝovinisto,  
ŝtofo, tuŝi, ŝparema, paŝtisto; aŭdienco, Aŭgusto, aŭtomato, aŭ-  
toro, ĵaŭdo, morgaŭ, eŭkaristio, Eŭropo, pneŭmatiko.



### Unua leciono.

### Prva lekcija.

Instruisto: Mi estas instruisto, Uĉitelj: Ja sam uĉitelj,  
vi estas lernanto. vi ste uĉenik.

— Kio estas mi?

— Ŝto sam ja?

Lernanto: Vi estas instruisto. Uĉenik: Vi ste uĉitelj.

I.: Kio estas vi?

U.: Ŝto ste vi?

L.: Mi estas lernanto.

Uĉen.: Ja sam uĉenik.

I.: Mi instruas, vi lernas.

U.: Ja pouĉavam, vi uĉite.

— Kion faras mi?

— Ŝto ĉinim ja?

L.: Vi instruas.

Uĉen.: Vi pouĉavate.

I.: Kion faras vi?

U.: Ŝto ĉinite vi?

L.: Mi lernas.

Uĉen.: Ja uĉim.

- I.: Mi *instruas Esperanton*,  
vi ĝin *lernas*.  
– *Kion vi lernas?*
- L.: Mi *lernas Esperanton*.  
– *Kio estas Esperanto?*
- I.: *Esperanto estas lingvo*,  
*internacia lingvo*. *Homo*,  
*kiu parolas kaj uzas*  
*Esperanton, estas esperantisto*.
- L.: Ĉu mi *estas esperantisto?*
- I.: *Ankoraŭ ne, ĉar vi ne scias*  
*tiun lingvon*, vi ĝin nur  
*lernas*. Sed *multaj homoj* en  
la *mondo* ĝin *scias*.  
*Esperantistoj vivas en urboj*  
kaj *urbetoj*, eĉ en *kelkaj*  
*vilaĝoj* sur la *tuta*  
*terglobo*.  
– *Kiu estas esperantisto?*
- L.: *Esperantisto estas homo*,  
*kiu uzas esperantan lingvon*.
- I.: Jes! – Ĉu vi *scias skribi* kaj  
*legi?*
- L.: Jes, *sinjoro instruisto*,  
mi *scias*.
- I.: *Prenu krajonon kaj skribu!*
- L.: *Kio estas kraĵono?*
- I.: *Kraĵono estas objekto*,  
per *kiu oni skribas* sur  
*papero*. Per *kreto* oni *skribas*  
sur *nigra tabulo*. Sur *papero*  
oni *ankaŭ skribas* per *plumo*.
- L.: *Kia estas kreto?*
- I.: *Kreto estas blanka*.
- L.: *Papero estas ankaŭ blanka*.
- I.: Jes! – La *tabulo ne estas*  
*blanka*, sed ĝi *estas nigra*.
- L.: *Kraĵono estas ankaŭ nigra*.
- I.: Jes, sed ĝi *povas esti*  
*ankaŭ ruĝa aŭ blua*.
- U.: Ja *pouĉavam esperanto*,  
vi ga *uĉite*.  
– *Ŝto vi uĉite?*
- Uĉen.: Ja *uĉim esperanto*.  
– *Ŝto je esperanto?*
- U.: *Esperanto je jezika*,  
*meĉunarodni jezika*. *Ĉovjek*,  
*koĉi govori i upotrebljava*  
*esperanto, je esperantist*.
- Uĉen.: Da li sam ja *esperantist?*
- U.: *Joŝ ne, jer vi ne znate*  
*taj jezika, vi ga samo*  
*uĉite*. Ali *mnogi ljudi u*  
*svijetu ga znadu*.  
*Esperantisti živu u gradovima*  
*i gradiĉima, paĉe u nekim*  
*selima na cijelaj*  
*zemaljskoj kugli*.  
– *Tko je esperantist?*
- Uĉen.: *Esperantist je ĉovjek, koĉi*  
*upotrebljava esperantski jezika*.
- U.: Da! – Da li vi znate *pisati i*  
*ĉitati?*
- Uĉen.: Da, *gospodine uĉitelju*,  
*znam*.
- U.: *Uzmite olovku i piŝite!*
- Uĉen.: *Ŝto je olovka?*
- U.: *Olovka je predmet*,  
*koĉim se piŝe na*  
*paperu*. *Kredom se piŝe*  
*na crnoj tabli*. Na *paperu*  
*se takoĉer piŝe perom*.
- Uĉen.: *Kakva je kreda?*
- U.: *Kreda je bijela*.
- Uĉen.: *Papir je takoĉer bio (bijel)*.
- U.: Da! – *Tabla nije*  
*bijela, nego ona je crna*.
- Uĉen.: *Olovka je takoĉer crna*.
- U.: Da, ali *ona moĉe biti*  
*takoĉer crvena ili modra*.

## Dua leciono.

- Instruistino: Mi estas instruistino, vi estas lernantino. Instruisto estas viro, sed mi estas virino.
- Lernantino: Ĉu mi ankaŭ estas virino?
- I.: Jes, certe, ni du estas virinoj, sed instruisto kaj lernanto estas viroj.
- L.: Sed viroj kaj virinoj estas homoj.
- I.: Vi estas prava, mia kara, la homoj havas viran aŭ virinan sekson.
- L.: Ĉu anĝeloj estas viroj aŭ virinoj?
- 1.: Tion mi ne scias, sed pentristoj pentras ilin plejparte kiel virinojn kun flugiloj.
- L.: Sed diabloj estas viroj?
- I.: Certe, almenaŭ la pentristoj ilin tiel pentras kaj la aktoroj en teatro ilin ankaŭ tiel prezentas.
- L.: Kie estas diabloj?
- I.: La diabloj estas en infero, kaj ĉie en la mondo, kie malbonaj homoj faras malbonon.
- L.: Sed virinoj faras ankaŭ malbonon.
- I.: Jes kelkfoje, bedaŭrinde ekzistas virinoj, kiuj estas vivantaj diabloj.
- L.: Do, ankaŭ virinoj estas anĝeloj kaj diabloj.
- I.: Povas esti, laŭ iliaj karaktero, konduto kaj vivmaniero. Vi restu ĉiam

## Druga lekcija.

- Uĉiteljica: Ja sam uĉiteljica, vi ste uĉenica. Uĉitelj je muž, ali ja sam žena.
- Uĉenica: Zar sam i ja žena?
- U.: Jest, doista, mi dvije smo žene, a uĉitelj i uĉenik su muževi.
- Uĉen.: Ali muževi i žene su ljudi.
- U.: Imate pravo, moja draga, ljudi imaju mužki ili ženski spol.
- Uĉen.: Da li su anđeli muževi ili žene?
- U.: To ne znam, ali slikari slikaju ih većinom kao žene s krilima.
- Uĉen.: Ali vragovi su muževi?
- U.: Doista, barem slikari ih tako slikaju i glumci u kazalištu ih također tako prikazuju.
- Uĉen.: Gdje su vragovi?
- U.: Vragovi su u paklu, i svagdje na svijetu, gdje zli ljudi čine zlo.
- Uĉen.: Ali muževi čine također zlo.
- U.: Jest katkada, nažalost postoje žene, koje su živi vragovi.
- Uĉen.: Dakle, također žene su anđeli i vragovi.
- U.: Može biti, prema njihovom značaju, vladanju i načinu života. Vi ostanite uvijek

anĝelo, *kia* vi estas nun; *kiel*  
knabino, edzino, patrino kaj  
avino, *ĉiam* estu anĝelo,  
semu amon, *bonon* kaj  
feliĉon.

L.: *Kie* estas la anĝeloj ?

L.: La religio *instruas* nin, ke  
ili estas en la ĉielo. Sed ili  
estas *ankaŭ* sur la *tero*, ĉar  
ĉiu *homo* havas *sian*  
anĝelon *gardiston*.

L.: Ĉu *ankaŭ* mi havas *mian*  
anĝelon *gardiston*?

L.: Jes, li *gardas* vin *ĉiam*,  
*tage* kaj *nokte*.

L.: *Domaĝe*, ke mi lin ne *vidas*!

L.: *Bestoj* estas *ankaŭ* *virseksaj*  
aŭ *virinseksaj*: *bovo*, *bovino*;  
*kato*, *katino*; *hundo*,  
*hundino*; *ŝafo*, *ŝafino*;  
*ĉevalo*, *ĉevalino*; *kapro*,  
*kaprino*; *koko*, *kokino*;  
*meleagro*, *meleagrino*; *anaso*,  
*anasino*. Ĉu vi *tion*  
*komprenas*?

L.: Jes, *sinjorino* *instruistino*, mi  
*komprenas tion*.

L.: *Bone*, *diru* al mi la *vortojn*,  
*kiuj signifas bestojn*  
*virinseksajn* por: *azeno*,  
*porko*, *ansero*, *leono*, *tigro*,  
*leopardo*, *melo*, *erinaco*,  
*muso*, *vesperto*, *noktuo*,  
*strigo*, *korvo*, *korniko*, *falko*.

L.: Mi jam *scias*: *azenino*,  
*porkino*, *anserino*, *leonino*,  
*tigrino*, *leopardino*, *melino*,  
*erinacino*, *musino*, *vespertino*,  
*noktuino*, *strigino*,  
*korvino*, *kornikino*,  
*falkino*.

L.: Tre *bone*, mi estas

anĝelo, *kakva* ste sada; *kao*  
djevotjka, *žena*, *majka* i  
*baka* *uvijek* *budite* *anĝelo*,  
*sijte* *ljubav*, *dobro* i  
*sreĉu*.

Uĉen.: Gdje su anđeli ?

U.: Vjera uči nas, da  
su u nebu. Ali oni  
su i na zemlji, jer  
svaki čovjek ima svoga  
anđela čuvara.

Uĉen.: Zar i ja imam svoga  
anđela čuvara?

U.: Da, on vas čuva uvijek,  
danju i noću.

Uĉen.: Šteta, da ga ne vidim!

U.: Životinje su također muškoga  
ili ženskoga roda: vol, krava,  
mačak, mačka; pas,  
kuja; ovan, ovca;  
konj, kobilica; jarac,  
koza; pijetao, kokoš;  
puran, pura; patak,  
patka. Da li to  
razumijete?

Uĉen.: Da, gospođo učiteljice,  
razumijem to.

U.: Dobro, recite mi riječi,  
koje znače životinje  
ženskoga roda za: magarac,  
prase, gusak, lav, tigar,  
leopard, jazavac, jež,  
miš, šišmiš, ćuk,  
sova, gavran, vrana, sokol.

Uĉen.: Već znam: magarica,  
svinja, guska, lavica,  
tigrica, leopardica, jazavica,  
ježica, mišica, šišmišica,  
ćukica, sova ženka,  
gavran ženka, vrana ženka,  
sokolica.

U.: Veoma dobro, ja sam



- kontenta pri vi. Ĉu vi estas feliĉa, ke vi tiel bone sukcesas?
- L.: Jes, sinjorino instruistino, mi estas feliĉa. Mi jam komprenas, kiel el esperantaj vortoj oni faras novajn esperantajn vortojn.
- L.: Mi admiras vian talenton kaj vian kapablecon tiel rapide percepti.
- L.: Tion mi povas, ĉar Esperanto estas tre facila lingvo.
- L.: Nur lernu ankaŭ plue tiel! Ĉiu leciono – nova ĝojo, ĉiu sukceso – nova feliĉo!
- L.: Jes, sinjorino instruistino, mi tion komprenas tre bone.
- zadovoljna s vama. Da li ste sreĉni, da tako dobro uspijevate?
- Uĉen.: Jesam, gospoĉo uĉiteljice, ja sam sreĉna. Ja veĉ razumijem, kako se iz esperantskih rijeĉi tvore nove esperantske rijeĉi.
- U.: Divim se vaŝem talentu i vaŝoj sposobnosti tako brzo shvaĉati.
- Uĉen.: To mogu, jer Esperanto je veoma lak jezic.
- U.: Samo uĉite i nadalje tako! Svaka lekcija – nova radost, svaki uspjeh – nova sreĉa!
- Uĉen.: Da gospoĉo uĉiteljice, to razumijem vrlo dobro.

## Tria leciono.

### Lerneja ĉambro.

Nia esperanta kurso estas en ĉambro de popollernejo en La popollernejo troviĝas en Petra Zrinskoga strato numero dek. El la strato ni eniras en la lernejon tra pordego. Per la ŝtuparo ni venas en koridoron. El la koridoro ni eniras en nian ĉambron tra pordo. Por eniri ni devas malfermi la pordon. Poste ni fermas ĝin.

La ĉambro estas sufiĉe granda. Ĝi havas kvar murojn, unu pordon kaj tri fenestrojn. Supre estas plafono kaj malsupre planko. Je la antaŭa muro pendas krucifikso. Flanke de ĝi estas bildoj de jugoslavaj reĝo kaj reĝino. Ĉe tiu muro estas katedro kun tablo kaj seĝo por la instruisto. Ĉe la katedro sur stablo staras nigra tabulo. Je la aliaj muroj pendas instruaj bildoj kaj geografiaj karto, Sub la plafono pendas du lampoj. Taga lumo venas en la ĉambron tra fenestraj vitroj. Vespere ni lumigas la lampojn. En vilaĝoj la lampoj estas petrolaj, en urboj gasaj aŭ elektraj.

La lernantoj sidas po du en unu *benko*. La ĉambro *havas* tri vicojn de benkoj, en ĉiu *vico* po ok benkoj. La instruisto staras antaŭ la benkoj kaj instruas. Li demandas, la lernantoj respondas. Novajn esperantajn vortojn li *skribas* sur la nigran *tabulon*. *Kelkfoje* li *skribas* ankaŭ mallongajn propoziciojn aŭ *frazojn*. Li *skribas* per *kreto*. La lernantoj *skribas* per *krajono* sur papero. Kelkaj el ili *havas* kajerojn. *Nian kurson* vizitas nur plenkreskuloj: sinjoroj kaj sinjorinoj, inter ili estas fraŭloj kaj fraŭlinoj. Ili lernas kun granda plezuro.

### *Ŝkolska soba.*

Naŝ esperantski teĉaj je u sobi puĉke ŝkole u Puĉka ŝkola se nalazi u Petra Zrinskoga ulici broj deset. Iz ulice ulazimo kroz kapiju u ŝkolu. Po stubama dolazimo u hodnik. Iz hodnika ulazimo u naŝu sobu kroz vrata. Da uĉemo, moramo otvoriti vrata. Poslije ih zatvorimo.

Soba je dosta velika. Ona ima ĉetiri stijene, jedna vrata i tri prozora. Gore je strop a dolje pod. Na prednjoj stijeni visi raspelo. Uza nj su slike jugoslavenskog kralja i kraljice. Kod toga zida je katedra sa stolom i stolicom za uĉitelja. Kod katedre na stalku stoji crna tabla. Na drugim stijenama vise pouĉne slike i zemljopisne karte. Pod stropom vise svjetiljke. Dnevno svijetlo dolazi u sobu kroz prozorska stakla. Veĉerom rasvjetljujemo svjetiljke. U selima svjetiljke su petrolejske, u gradovima plinske ili elektriĉne.

Uĉenici sjede po dva u jednoj klupi. Soba ima tri reda klupa, u svakom redu po osam klupa. Uĉitelj stoji pred klupama i pouĉava. On pita, uĉenici odgovaraju. Nove esperantske rijeĉi piŝe na crnu tablu. Katkada piŝe i kratke reĉenice ili fraze. On piŝe kredom. Uĉenici piŝu olovkom na papiru. Neki izmeĉu njih imadu pisanke. Naŝ teĉaj pohaĉaju samo odrasli: gospoda i gospoĉe, meĉu njima su neŝenje i gospoĉice. Oni uĉe s velikom radoŝu.

---

## Kvara leciono

### *Konversacio.*

Instruisto:

Lernanto:

Kie troviĝas nia esperanta kurso? Nia esp. kurso troviĝas en popollernejo.

Kie estas popollernejo?

Popollernejo estas en Dubrovnik.

Kie estas Dubrovnik?

Dubrovnik estas en zetska banovina.

Kie estas zetska banovina?	Zetska banovina estas en Jugoslavujo.
Jes, ĝi estas sur bordo de Adriatika maro. — Kie estas Jugoslavujo ?	Jugoslavujo estas en Eŭropo.
Eŭropo estas kontinenta. Sur la tero ekzistas kvin kontinentoj. Ĉu vi scias iliajn nomojn?	Jes, ili estas: Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko kaj Aŭstralio.
Kia estas nia lerneja ĉambro?	Ĝi estas sufiĉe granda.
Kiom da muroj havas nia ĉambro?	Ĝi havas kvar murojn.
Kiom da benkoj estas en la ĉambro?	En la ĉambro estas tri vicoj de benkoj.
Kiom da benkoj estas en unu vico?	En unu vico estas ok benkoj.
Kiom da lernantoj sidas en unu benko ?	En ĉiu benko sidas po du lernantoj.
Kiu staras antaŭ la benkoj ?	La instruisto staras antaŭ la benkoj.
Kion li faras?	Li instruas.
Kion ni faras?	Ni lernas.
Kion li faras per blanka kreto?	Li skribas sur nigra tabulo per blanka kreto.
Kion li skribas?	Li skribas novajn esperantajn vortojn, kaj mallongajn proponojn.
Per kio skribas la lernantoj?	La lernantoj skribas per krajono.
Ĉu la krajono estas longa ?	Ne, sinjoro instruisto, la krajono ne estas longa, sed ĝi estas mallonga.
Ĉu nia ĉambro estas malalta ?	Ne, ĝi ne estas malalta, sed ĝi estas alta.
Ĉu Esperanto estas nacia lingvo?	Ne, Esperanto ne estas nacia lingvo, sed ĝi estas internacia lingvo.
Ĉu nian esperantan kurson vizitas infanoj aŭ plenkreskuloj ?	Plenkreskuloj vizitas ĝin, viroj kaj virinoj.
Ĉu ili ŝatas tiun artefaritan lingvon ?	Jes, ili ŝatas ĝin, ĉar ĝi estas logika, praktika kaj tre belsona.
Ĉu la bildoj sur la muro estas belaj ?	Jes, ili estas sufiĉe belaj.
Ĉu bela bildo faras al vi plezuron?	Jes, mi tre ŝatas belajn bildojn.
Ĉu la sono de muziko estas agrabla?	Jes, mi tre ŝatas belan muzikon.

Ĉu vi konas kelkajn instrumen- tojn?	Jes, mi konas ilin, sed mi ne scias iliajn esperantajn no- mojn.
Piano, orgeno, harmoniumo, har- fo, violono, klarneto, trumpeto, guslo, tamburico k.t.p.	Mi tre ŝatas orgenon.
Ĉu vi scias nombri ĝis dek?	Ankoraŭ ne.
Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek.	Nun mi scias.
Kiom da fenestroj havas nia ĉambro.	Ĝi havas tri fenestrojn.
Kiom da vitraj tabuloj havas ĉiu fenestro.	Ĉiu fenestro havas ses vitrajn tabulojn.
Kiom estas kvar kaj tri?	Kvar kaj tri estas sep.
Kiom faras kvin kaj kvar?	Kvin kaj kvar faras naŭ.
Tiun kalkulon ni nomas adicio.	

---

## Kvina leciono.

### *Homa korpo.*

Mi estas homo, ĉar mi pensas, parolas kaj laboras. La homo havas korpon kaj animon. Li laboras korpe kaj spirite. La organo de la spirita laboro estas cerbo en la kapo. La cerbo similas telegrafan centralon, la nervoj telegrafajn fadenojn. Eksterajn impresojn ni perceptas per kvin sentoj: per la okuloj ni vidas, per la oreloj ni aŭdas, per la nazo ni flaras, per la lango ni gustumas kaj per haŭto ni palpas. La homo, kiu ne povas vidi, estas blindaj kiu ne povas aŭdi, estas surda; kiu ne povas paroli, estas muta; kiu ne kapablas rekte iri, estas lama.

La korpo konsistas el kapo, trunko kaj membroj. La supraj membroj estas brakoj kun la manoj; ili estas per la ŝultro ligitaj kun la korpo. La brako fleksiĝas en la kubuto. La manartiko estas la interligo inter la mano kaj la brako. Ĉiu mano havas po kvin fingrojn. Ĉiu fingro havas ungon. La fingroj estas nomataj dika fingro aŭ polekso, montra fingro, meza fingro, ringfingro kaj malgranda fingro. Per la helpo de la dika fingro la mano povas pli bone teni kaj ekpreni la objektojn ol sen ĝi. Kvankam la manoj estas konstruitaj tute egalaj, tamen generale la dekstra mano estas pli lerta ol la maldekstra, ĉar ĝi estas pli regule ekzercata.

La homo enspiras la aeron per la nazo aŭ per la buŝo. La aero poste venas en la traĥeon, de tie en la pulmojn. Dum la

spirado la pulmoj plivastiĝas. En la brusto ni havas ankaŭ la koron. La koro batas kaj pelas la sangon en la arterioj kaj vejnoj. La diafragmo dividas la brustan kavon de la ventra kavo. En la ventro estas stomako, intestoj, hepato, gala veziko, lieno kaj urinveziko. Ambaŭ renoj estas fiksitaj sur la dorsa parto de la ventra kavo. La organoj en la ventro digestas la manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Havi regulan digestadon estas nepre necese por la sano de la korpo.

La malsupraj membroj estas la gamboj. La gambo fleksiĝas en genuo. Sur la antaŭa parto de la genuo estas malgranda osto nomata patelo, la malantaŭa parto estas nomata genukavo. La parto de la gambo super la genuo estas femuro, tiu sub ĝi estas kruro. La piedartiko ligas la kruron kun la piedo. La malantaŭa parto de la piedo estas nomata kalkano, la suba plando.

La skeleto tenas la staturon de nia korpo. Ĝi konsistas el multaj grandaj kaj malgrandaj ostoj. Sur la ostoj ni havas muskolojn. Ili estas el karno. Haŭto kovras la tutan korpon.

Ni ne iras nudaj, sed vestitaj en vestoj. Partoj de la vira vestaĵo estas: ĉemizo, kalsono, ŝtrumpo, pantalono, ŝuo, kolumo, kravato, veŝto kaj jako. La kapon ni kovras per ĉapelo aŭ ĉapo, sur la manojn ni surmetas gantojn. La virinoj surmetas jupojn. Kiam estas malvarme ni surmetas surtuton kaj vintre mantelon.

---

## Sesa leciono.

### *Ekzerco.*

Levu vian dekstran manon! Montru vian dekstran okulon! Levu vian maldekstran manon! Mallevu ĝin! Tuŝu vian dekstran orelon! Kie estas maldekstra orelo? Levu ambaŭ manojn! Mallevu ilin! Ekstaru! Levu la dekstran piedon! Mallevu ĝin! Levu la maldekstran piedon! Mallevu ĝin! Montru la genuon! Montru la bruston! Montru la plafonon! Montru la plankon! Malfermu la fenestron! Fermu ĝin! Iru al la tabulo, prenu kreton kaj skribu: „Mi konas mian korpon.“ Mi dankas! Iru sur vian lokon! Sidiĝu! Montru la krajonon! Montru la kajeron! Montru la libron! Malfermu ĝin kaj legu sur la paĝo sep. Mi dankas! Fermu la libron!

Kiom da fingroj havas la homo sur la mano? Kiom sur ambaŭ manoj? Kiom da piedfingroj havas la homo? Kio estas en la kapo? Kion similas la cerbo? Kion la nervoj? Kio pelas la sangon? Kie estas la intestoj? Kie estas ungo? Montru la frunteton! Kie kreskas la haroj? Kie estas la vizaĝo? Kio estas la femuro? Kio estas la kruro?

Kiom da piedoj vi havas? Kiom da piedoj havas la stablo de la tabulo? Kiom da piedoj havas la tablo? Ĉu benko havas piedojn? Ĉu vi scias, kio estas lango? Kia diferenco estas inter karno kaj viando? Kia diferenco estas inter mano kaj brako? Kia diferenco estas inter piedo kaj gambo? Ĉu vi scias, kio estas dento? Ĉu dentoj estas en la buŝo? Kie estas la lipoj? Kiom da lipoj ni havas? Kie kreskas la lipharoj? Ĉu vi scias kio estas barbo? Kion faras la mano en la kubuto? Kie estas ŝultra kavo? Kie estas dorso?

Kion faras la homo? Per kio ni palpas? Per kio ni skribas? Per kio ni legas? Per kio ni gustumas? Per kio ni spiras? Per kio la homo parolas? Ĉu vi vidas la bildon de la reĝo? Ĉu vi vidas min? Ĉu vi povas vidi la blindulon? Ĉu li povas vidi vin? Ĉu mutulo povas paroli? Ĉu surdulo aŭdas, kion ni parolas? Ĉu vi ŝatas bonulon? Ĉu vi scias kio estas grandulo? Ĉu belulino estas malbela virino? Ĉu rozo havas agrablan odoron? Per kio ni flaras? Ĉu lamulo povas rapide kuri? Per kio ni marŝas, saltas kaj kuras? Ĉu vi scias, kio estas kolo? Ĉu kolo ligas la kapon kun la trunko?

Post la laboro ni bezonas ripozon. Niaj korpo kaj spirito plej bone ripozas, kiam ni dormas.

---

## Sepa leciono.

Instruisto: Bonan vesperon (mi deziras al vi), mia lernanto!

Lernanto: Bonan vesperon, sinjoro instruisto!

I.: Ĉu vi bone lernis la antaŭajn lecionojn?

L.: Jes, mi lernis kaj komprenis la esperantan gramatikon.

I.: Ĉu vi eble mem trovis la gramatikajn regulojn de Esperanto.

L.: La vortojn mi skribis en vicoj, kaj tio montras la regulojn.

I.: Tio estas tre interesa, montru al mi vian laboron.

L.: Jen la unua vico: instruist-o, lernant-o, Esperant-o, lingv-o, mond-o, objekt-o, plum-o, best-o, leon-o, tigr-o, erinac-o, kat-o, karakter-o, kondut-o, vivmanier-o, am-o, bon-o. Tiuj vortoj servas por nomi personon, beston, aĵon aŭ ideon.

I.: Jes, tre bone, ili havas la finiĝon — o kaj estas nomataj *substantivoj* (imenance). Diru nun la regulon!

L.: *Substantivo estas vorto, kiu servas por nomi personon, beston, objekton aŭ ideon. Ĝia finiĝo estas — o.*

I.: Montru la duan vicon!

L.: Hom-o-j, urb-o-j, urbet-o-j, esperantist-o-j, anĝel-o-j, flugil-o-j. *La finiĝo por pluralo (multnombro) estas—j.*

I.: Bonege!

L.: Jen la tria grupo de vortoj: est-as, lern-as, instru-as, far-as, uz-as, sci-as, viv-as, pentr-as, skrib-as. Ili esprimas, ke io okazas nun, en nuna tempo.

I.: Vi estas prava: *-as* estas finiĝo de *prezento* (estanta tempo) de la *verbo*.

L.: La kvara grupo estas: pren-u, skrib-u, rest-u, sem-u. Tiuj vortoj esprimas ordonon.

I.: Jes, *-u* estas finiĝo de *imperativo* (ordona modo).

L.: Jen la kvina grupo: internaci-a, nigr-a, blank-a, ruĝ-a, blu-a, kar-a. *Tiujn vortojn oni aldonas al substantivo por montri ĝian econ*: internacia lingvo, nigra tabulo, blanka kreto, ruĝa kraĵono.

I.: Gramatika nomo por tiuj vortoj estas *adjektivo*. *La finiĝo de adjektivo por ĉiuj tri seksoj (vira, virina kaj neŭtra) estas — a.*

L.: Se la substantivo estas en pluralo, ĝia adjektivo ricevas ankaŭ la pluralan finiĝon — *j*.

I.: La regulo: *Adjektivo akordiĝas kun substantivo en nombro kaj kazo.*

L.: Esperantaj vortoj konsistas el du partoj: el unu konstanta, neŝanĝebla, kaj alia ŝanĝebla. La neŝanĝeblan parton ni nomu *bazo*, kaj la ŝanĝeblan *finiĝo*. La bazo portas la ĉefan signifon de la vorto, la finiĝo donas al ĝi specialan signifon.

I.: La verboj en *infinitivo* (nedifinita modo) havas la finiĝon — *i*. Ekzemple: leg-i, skrib-i, kalkul-i, parol-i, pens-i, esprim-i.

En tiu formo ni trovas ilin en la vortaro.

---

## Oka leciono.

### *La familio.*

La Sankta Biblio skribas: „Kaj Dio la Eternulo diris: Ne estas bone, ke la homo estu sola; Mi kreos al li helpanton similan al li. Kaj Dio la Eternulo kreis el la tero ĉiujn bestojn de la kampo kaj ĉiujn birdojn de la ĉielo, kaj venigis ilin al la homo, por vidi, kiel li nomos ilin; kaj kiel la homo nomis ĉiun vivan estaĵon, tiel restis ĝia nomo. Kaj la homo donis nomojn al ĉiuj brutoj kaj al la birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj bestoj de la kampo; sed por la homo

ne troviĝis helpanto simila al li. Kaj Dio la Eternulo konstruis el la ripo, kiun Li prenis de la homo, virinon, kaj Li venigis ŝin al la homo. Kaj la homo diris: Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita. Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno."

Kaj vere la homo ne povas vivi sola, li bezonas helpantojn, li bezonas societon. La plej malgranda, sed ankaŭ la plej grava societo estas la familio. Ĝi estas la fundamento de ĉiu nacio kaj de ĉiu ŝtato. Ĝi estas la ĉelo de la kulturo kaj ekonomia organizacio. Amo estas la ligilo, kiu kune tenas la anojn de la familio.

Viro kaj virino, geviroj, estas edzo kaj edzino. Al la geedzoj naskiĝas infano: filo aŭ filino, tial ili fariĝas gepatroj. Iliaj infanoj inter si estas fratoj kaj fratinoj, gefratoj. Mia patro estas avo al mia filo kaj mia filino. Avo kaj avino estas geavoj. Mia filo estas nepo al sia avo kaj al sia avino. Nepo kaj nepino estas genepoj. Mia fratino estas onklino al mia filo, kaj li estas nevo al ŝi. La infanoj de mia frato estas ankaŭ ŝiaj nevoj. Miaj infanoj kaj infanoj de miaj gefratoj inter si estas kuzoj kaj kuzinoj. Mi estas onklo al la infanoj de miaj gefratoj. Ili estas miaj nevoj. La patro de mia avo estas mia praavo, lia edzino estas mia praavino, kune ni nomas ilin gepraavoj.

La patro de mia edzino estas mia bopatro kaj mi estas lia bofilo. La frato de mia edzino estas mia bofrato. La onklo de mia edzino estas mia boonklo. La kuzo de mia edzino estas mia bokuzo. Ŝia avo estas mia boavo, ŝia nepo mia bonepo.

Se ĉiuj anoj de la familio amas unu la alian, ili estas feliĉaj. La amo donas feliĉon, la malamo malfeliĉon. La gepatroj amas siajn infanojn kaj deziras al ili nur la bonon. Malbonaj cirkonstancoj detruas la familion. La familian vivon plej multe domaĝas malsano, malsato, malriĉeco, malŝparemo kaj envio.

La patro laboras kaj prizorgas la nutraĵon, la vestaron, hejtmaterialon kaj ĉion, kion oni bezonas por la vivo. La patrino gardas tion, kion la patro prizorgis. Ŝi kuiras, kudras, mastrumas en la domo, edukas la infanojn kaj helpas al sia edzo.

Ni zorgu, ke niaj familioj estu sanaj, konkordaj, riĉaj kaj feliĉaj!

## Naŭa leciono.

Lernanto: Mian komplimenton, sinjoro instruisto!

Instruisto: Bonan tagon!

L.: Miaj grupoj de vortoj denove kreskis.



I.: Do, vi jam malkovris la sekreton de esperanta lingvo. Bonvolu diri kion vi divenis.

L.: Mi rimarkis, ke la bazo de esperanta vorto ne restas ĉiam neŝanĝebla, sed ĝi havas neŝanĝeblan parton, al kiu oni aldonas aŭ antaŭmetas ion. Ekzemple: bo-*frat*-in-o, pra-*patr*-m-o, ge-*edz*-oj, plen-*kresk*-ul-o, mal-*dekstr*-a, *nask*-iĝ-as k. t. p. (kaj tiel plu).

I.: Bonege vi tion rimarkis. La neŝanĝebla parto de la vorto estas **radiko**. **Prefikso** estas nomata la ero, kiun ni antaŭmetas, kaj **sufikso** la ero, kiun ni postmetas al la radiko. Unuvorte ni nomas ilin **afiksoj**.

L.: Jam en la dua leciono fraŭlino lernantino divenis, *ke per la sufikso -in- oni kreas vortojn, kiuj indikas virinseksajn estaĵojn, homojn aŭ bestojn.*

I.: Jes! Multajn ekzemplojn ni trovas en la lasta leciono, kiu parolas pri familio.

L.: En la sama leciono ni vidis, *ke ni antaŭ la radikon antaŭmetas prefikson ge-, se ni volas indiki viron kaj virinon, kiuj apartenas unu al la alia.*

1.: Vi estas prava: reĝo kaj reĝino estas gereĝoj, princo kaj princino estas geprincoj, mastro kaj mastrino estas gemastroj; sed oni povas ankaŭ diri: gesinjoroj, gelernantoj, gestudentoj, geinstruistoj, geprofesoroj, gekolegoj anstataŭ sinjoroj kaj sinjorinoj, lernantoj kaj lernantinoj, studentoj kaj studentinoj k. t. p.

L.: En la sepa leciono mi trovis la vorton *pra*-avo. La prefikso *pra*- evidente havas la saman signifon, kiel en serba kaj kroata lingvoj.

I.: Tio estas ĝusta. El arbaro oni derivas *pra*arbaron, el tempo *prate*mpo, el historio *prah*istorio, el patroj *prap*atroj.

L.: En la antaŭlasta ĉapitro de la sesa leciono ni havis la sufikson *-ul*. *Oni ĝin aldonas al la adjektivaj radikoj por montri la homon (aŭ beston), kiu posedas kvaliton difinitan per la adjektiva radiko.* Blinda homo estas *blindulo*, surda homo estas *surdulo*, muta *mutulo*, kvarpieda besto estas *kvarpiedulo*; besto, kiu remaĉas estas *remaĉulo*, hufojn havantaj bestoj estas *hufuloj*. El tiel derivitaj vortoj, kun la signifo de virseksaj estaĵoj oni derivas vortojn kun virinseksa signifo per simpla aldono de sufikso *-in-*. Ekzemple: *belulo* – *belulino*, *bonulo* – *bonulino*, *nigrulo* – *mgrulino*, *blankulo* – *blankulino*. Eterna Dio estas *Eternulo*.

I.: Tre bone vi komprenis la esperantan vortfaradon. Tio certe tre ĝojigos vin kaj de nun vi lernos la esperantan lingvon kun ankoraŭ pli granda plezuro ol vi lernis ĝis nun. La lernado estas al vi facila kaj agrabla.

## Deka leciono.

### *Proverboj.*

Ĉiu kapo havas sian saĝon.

Kiom da homoj, tiom da temperamentoj.

Kiu malkovris sian talenton, trovis enterigitan trezoron.

Ĉiu disvolvu siajn kapablojn laŭ sia speciala maniero.

Ŝtono sur ŝtono palaco, grajno al grajno panbulo, vorto al vorto lingvo.

Pli zorgas unu patrino pri dek infanoj ol dek infanoj pri unu patrino.

### *Infana kapo.*

Malgranda filineto diris al sia patrino:

„Kiam mi estos granda, mi estos edzino de la avo.”

Patrino: „Kiel. karulino, ĉu vi volas esti la edzino de mia patro?”

Filineto: „Kial ne? Ankaŭ vi estas la edzino de mia patro?”

### *Saĝaj musoj.*

Musoj kunvenis por interkonsenti, kiel ili ŝirmos sin kontraŭ la kato. Unu diris tion, kaj la alia alion. Fine ili decidis je kolo de la kato pendigi sonorileton. Kiam la kato kun sonorileto venus, tiam ili ĝin aŭdus. La sonorileton ili trovis, sed neniu troviĝis, kiu la sonorileton pendigus je kolo de la kato.

Kaj tiel la kato ankoraŭ hodiaŭ estas – sen sonorileto.

### *Azeno.*

Azeno ŝarĝita je salo devis transiri rivereton. Kiam ĝi estis en la mezo de la akvo, ĝi kuŝiĝis, ĉar tio plaĉis al ĝi. Post kelka tempo ĝi leviĝis kaj rimarkis, ke ĝia ŝarĝo estas multe pli malpeza ĉaren akvo solviĝis granda parto da salo. Pri tio azeno bone memoris kaj decidis, ke ĝi ankaŭ duan fojon faros la samon.

Kaj efektive, la morgaŭan tagon ĝi devis porti spongojn. Kiam la azeno venis en la rivereton, ree ĝi sin rulis en la akvon, kiel ĝi estis longa kaj larĝa. Sed ĝi terure eraris. La spongoj pleniĝis je akvo kaj fariĝis multe pli pezaj ol antaŭe. Kaj nun la ŝarĝo tiel premeĝis la azenon, ke ĝi apenaŭ povis marŝi.

### *Demandoj.*

*(Ĉiun demandon respondu per plena propozicio!)*

Kion havas ĉiu kapo? – Kiom da homaj temperamentoj vi konas? – Kiu trovis enterigitan trezoron? – Kion devas fari ĉiu

homo? – Kiel oni masonas domojn? – Kion oni muelas por ricevi farunon? – El kio konsistas ĉiu lingvo? – Kio estas silabo? – Kio estas vokalo? – Kio estas konsonanto? – Kiom da konsonantoj havas la esperanta lingvo? – Pri kio zorgas ĉiu patrino? – Ĉu malgrandaj knabinoj edziniĝas? – Ĉu knaboj edziĝas? – Kiam la gepatroj edzinigas siajn filinojn? – Ĉu infanoj komprenas, kion signifas esti edzo kaj edzino? – Kial la knabineto en nia anekdoto volas fariĝi edzino de sia avo? – Ĉu ekzemploj havas grandan influon en la vivo de homoj? – Kial kunvenis saĝaj musoj? – Ĉu azeno estas saĝa besto? – Kiel ili sin ŝirmos kontraŭ la kato? – Ĉu ili faris saĝan decidon? – Ĉu vi veturus Parizon, se vi havus monon? – Ĉu vulpo manĝus vinberojn, se ili ne estus acidaj? – Kion devis la azeno en nia anekdoto porti trans la rivereton? – Ĉu salo estas solvebla en akvo? – Kies salon ĝi portis? – Kien ĝi kuŝiĝis? – Kiam patrino kuŝigas sian infanon en la liton? – Kie kuŝas la libro? – Per kio ni viŝas la nigran tabulon, kiam ĝi estas plenskribita? – Ĉu salo sorbas akvon? – Ĉu spongo sorbas akvon? – Kio estas sorba papero? – Ĉu azeno saĝe agis? – Kiu estis pli saĝa azeno aŭ musoj? – Kia estas la azeno laŭ tiu anekdoto? – Kiaj estas la musoj? – Ĉu vi amuzas vinlegante anekdotojn? – Sur kiu silabo de esperantaj vortoj estas akcento?

## Dekunua leciono.

Lernanto: Mian komplimenton, sinjoro instruisto!

Instruisto: Bonan matenon!

L.: Ĉu ni hodiaŭ parolos pri gramatiko?

I.: Jes, se tio plaĉas al vi.

L.: Tio min tre ĝojigas, ĉar mi havas grandan plezuron, kiam mi povas montri tion, kion mi mem trovis per miaj propraj fortoj. – De kiam ni la lastan fojon parolis pri gramatiko kaj esperanta vortfarado, mi trovis multajn novajn regulojn. Miaj vortgrupoj kreskis rimarkinde.

I.: Bonvolu komenci.

L.: Mi konstatis, ke al ĉiu verbo apartenas substantivo aŭ iu el la mallongaj vortoj: mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, ili, oni.

I.: Tio estas grava konstato. Substantivo estas **nom**o de homo, besto, aĵo aŭ ideo, tial la vorto, kiu staras anstataŭ substantivo, estas nomata *pronomo*. *Personaj pronomoj estas: mi, ci, li, ŝi, ĝi* por la singularo (ununombro) kaj *ni, vi, ili* por la pluralo (multnombro). La pronomon *ci* ni ankoraŭ ne havis, ĉar *en*

*Esperanto oni kutimas laŭ franca kaj angla manieroj al ĉiu persono diri vi, sed ne ci, kiel en slavaj lingvoj.*

**Oni** estas *nedifina pronomo*. En nia nacia lingvo ni ne havas ĝin.

**Si** estas *refleksiva pronomo*. **Oni uzas ĝin, kiam la ago de la verbo revenas al tria persono:** Li diris al si: malĝuste vi pensis! Ŝi lavas sin. La gepatroj ne laboras por si, sed por siaj infanoj.

L.: Nun mi povas diri la tutan prezenton.

*Estanta tempo.*

**Singularo:**

1. Mi laboras,
2. ci laboras,
3. li laboras (vira),  
ŝi laboras (ina),  
ĝi laboras (neŭtra).

**Pluralo:**

Ni laboras,  
vi laboras,  
ili laboras.  
  
Oni laboras.

I.: Se ni ne scias, kiu persono laboras, ni diros: oni laboras.

L.: Plue mi konstatis, ke **-is** estas finiĝo por pasinta tempo. Do, mi povas doni la ekzemplon.

*Estinta tempo.*

**Singularo:**

1. Mi laboris,
2. ci laboris,
3. li laboris,  
ŝi laboris,  
ĝi laboris.

**Pluralo:**

Ni laboris,  
vi laboris,  
ili laboris.  
  
Oni laboris.

Finiĝo de la futuro (estonta tempo) estas **-os**.

*Estonta tempo.*

**Singularo:**

1. Mi laboros,
2. ci laboros,
3. li laboros,  
ŝi laboros,  
ĝi laboros.

**Pluralo:**

Ni laboros,  
vi laboros,  
ili laboros.  
  
Oni laboros.

I.: Por pli bone fiksigi la signifon de la tri tempoj ni memoru jenan ekzemplon: Hieraŭ estis bela vetero, hodiaŭ estas malbela vetero, mi ne scias, kia vetero estos morgaŭ.

**Imperativo.**

Venu tien ĉi! (Mi volas, ordonas.)

En dependaj propozicioj, imperativo montras ordonon, volon, deziron, peton, devon, konvenon, neceson, timon, k. t. p.:

Mi deziras, ke li venu.

Estas necese, ke ŝi lernu diligente.

Mi petas, ke vi ne faru tion.

Mi timas, ke li venu.

L.: En la anekdoto „Saĝaj musoj” ni havis formojn kun finiĝo **-us**: ven-us, aŭd-us, pendig-us. Tio signifas, ke ne okazos tio, kion signifas la radiko.

I.: Tio estas *kondiĉa modo* aŭ kondicionalo.

#### *Kondicionalo.*

##### **Singularo:**

1. Mi laborus,
2. vi (ci) laborus,
3. li laborus,  
ŝi laborus,  
ĝi laborus.

##### **Pluralo:**

Ni laborus,  
vi laborus,  
ili laborus.

Oni laborus.

*Ekzemploj:* Se la junulinoj estus tio, kio estas sur la ĉielo steloj: ĉiuj junuloj estus astronomoj; se la junuloj estus tio, kio estas ĉe la fajro potoj: ĉiuj junulinoj estus kuiristinoj. (Sed la junulinoj ne estas steloj, kaj la junuloj ne estas potoj.)

L.: Mi opinias, ke verbo estas la plej grava vorto en la propozicio kaj tiel ankaŭ en la lingvo.

Ni povas la verbojn dispartigi en du grandajn grupojn laŭ ilia rilato en propozicio.

I.: Vi estas prava, sed pri tio ni parolos la venontan fojon.

---

## **Dekdua leciono.**

Instruisto: Nun ni daŭrigu nian interparoladon, kiun ni interrompis la lastan fojon!

Lernanto: Mi deziras paroli pri la du grupoj de verboj.

I.: Bonvolu!

L. La verboj de la unua grupo rilatas al substantivo kun finiĝo **-o** aŭ **-oj**: La patro *estas* bona. La lernantoj *sidas* en benkoj, la instruisto *staras* antaŭ ili. Lingvo *konsistas* el vortoj.

La verboj de la dua grupo povas havi ankoraŭ unu aŭ kelkajn substantivojn kun finiĝo — **-on** aŭ **-ojn**: La instruisto *prenas* kreton. La lernanto *havas multajn librojn*. La fraŭlino *lernas esperantan lingvon*. La patro *skribas* leteron. Mi *vidas* lin.

I.: Vi bone dispartigis la verbojn. Tiujn de la dua grupo ni nomas **transitivaj verboj**, ĉar ilia ago transiras sur la **objekton**, tio estas sur la substantivon aŭ pronomon kun finiĝo – **n**.

La verboj de la unua grupo estas **netransitivaj**.

L.: Ŝajnas al mi, ke propozicio havas tri ĉefajn partojn.

I.: Tute ĝusta supozo. Ĝenerale la propozicio havas du ĉefajn partojn: **subjekton** kaj **predikaton**.

*Subjekto estas vorto, pri kiu ni parolas. Predikato estas tio, kion ni parolas pri la subjekto.*

*Ekzemplo:* Homo vivas. Homo estas subjekto, ĉar ni parolas pri li. Vivas estas predikato, ĉar pri la homo ni parolas, ke li vivas. Se predikato estas verbo transitiva, la propozicio povas havi ankaŭ objekton kun finiĝo **-n**.

*Ekzemplo:* Esperantisto uzas Esperanton. Esperanton estas objekto.

La **kazo** kun finiĝo **-o** respektive **-oj** en gramatiko estas nomata **nominativo**, la kazo kun finiĝo **-n** **akuzativo**.

*Subjekto staras en nominativo, objekto post transitiva verbo en akuzativo.*

L.: Mi rimarkis, ke *akuzativo staras ankaŭ post verboj, kiuj signifas movon, kiam oni volas indiki direkton de la movo*. Ekzemploj: Kiam azeno venis en la rivereton. Ĉu vi veturus Parizon.

I.: Pli klare ni tion vidos en sekvanta ekzemplo:

La birdo flugas en la ĉambro. (Ĝi jam estas en la ĉambro.) – La birdo flugas en la ĉambro. (Ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas por veni en ĝin.)

L.: Se ni al la personaj pronomoj donas la finiĝon **-a**, ni ricevas **posesivajn pronomojn** *mia, cia, lia, ŝia, ĝia; nia via, ilia*.

El refleksiva pronomo **si** ni ricevas **sia**.

I.: Por pli bone kompreni la uzadon de posesivoj kaj de akuzativo ni kunmetu ĉi tie aron da ekzemploj:

Mi amas mian patron.

Ni amas niajn patrojn.

Ci amas cian patron.

Vi amas viajn patrojn.

Li amas sian patron.

Ili amas siajn patrojn.

Ŝiamas sian patron.

La infanoj amas siajn patrojn.

La infano amas sian patron.

L.: Mi rememoras, sinjoro instruisto, en la deknua leciono vi donis al mi klarigon pri la uzado de refleksiva pronomo **si**. La sama regulo, laŭ la supraj ekzemploj, valoras ankaŭ por la uzado de **sia**.

I.: Certe! Se mi diras: „Li amas lian patron“, signifas, ke li amas la patron de iu alia. Mia fratino legas ŝian libron, signifas la libron de sia fratino, aŭ de iu alia virino.

L.: Nun mi deziras montri kelkajn regulojn pri vortfarado.

I.: Bonvolu, mi aŭskultas.

L.: *La prefiksa mal-* donas al la vorto tute kontraŭan signifon ol ĝin havas la radiko: bona, malbona; bela, malbela; supre, malsupre; dekstra, maldekstra; fermi, malfermi; granda, malgranda.

*La sufikso -ig-* servas por formi verbojn kun signifo meti en staton montratan de la radiko. Ekzemploj: feliĉa, feliĉigi; blinda, blindigi; ĝoja, ĝojigi, ruĝa, ruĝigi, kuŝi, kuŝigi; plena, pleniĝi; edzo, edzigi.

*La sufikso -iĝ-* servas por formi vortojn, kiuj eldiras, ke oni de si mem venas en la staton montratan de la radiko. Ekzemploj: kuŝi, kuŝiĝi; levi, leviĝi; solvi, solviĝi; plena, pleniĝi; fari, fariĝi; ruĝa, ruĝiĝi; blinda, blindiĝi; fini, finiĝi; edzo, edziĝi; edzino, edziniĝi; pala, paliĝi; malsana, malsaniĝi.

## Dektria leciono

### Nombroj.

	11 dek-unu	21 dudek-unu	31 tridek-unu
2 <i>du</i>	12 dek-du	22 dudek-du	32 tridek-du
3 <i>tri</i>	13 dek-tri	23 dudek-tri	33 tridek-tri
4 <i>kvar</i>	14 dek-kvar	24 dudek-kvar	40 kvardek
5 <i>kvin</i>	15 dek-kvin	25 dudek-kvin	50 kvindek
6 <i>ses</i>	16 dek-ses	26 dudek-ses	60 sesdek
7 <i>sep</i>	17 dek-sep	27 dudek-sep	70 sepdek
8 <i>ok</i>	18 dek-ok	28 dudek-ok	80 okdek
9 <i>naŭ</i>	19 dek-naŭ	29 dudek-naŭ	90 naŭdek
10 <i>dek</i>	20 dudek	30 tridek	<b>100 cent</b>
100 cent	111 cent-dek-unu	1101 mil-cent-unu	
101 cent-unu	112 cent-dek-du	1102 mil-cent-du	
102 cent-du	200 ducent	2000 dumil	
103 cent-tri	300 tricent	3000 trimil	
104 cent-kvar	400 kvarcent	4000 kvarmil	
105 cent-kvin	500 kvincent	5000 kvinmil	
106 cent-ses	600 sescent	6000 sesmil	
107 cent-sep	700 sepcent	7000 septmil	
108 cent-ok	800 okcent	8000 okmil	
109 cent-naŭ	900 naŭcent	9000 naŭmil	
110 cent-dek	<b>1000 mil</b>	10000 dekmil	

20000	dudekmil	80000	okdekmil
30000	tridekmil	90000	naŭdekmil
40000	kvardekmil	100000	centmil
50000	kvindekmil	200000	ducentmil
60000	sesdekmil	300000	tricentmil
70000	sepdekmil		
1000000	unu <i>miliono</i>	963274	naŭcent sesdek tri mil
2000000	du milionoj		ducent sepdek kvar
67	sesdek sep	5234568	kvin milionoj ducent
198	cent naŭdek ok		tridek kvar mil kvin-
1335	mil tricent tridek kvin		cent sesdek ok.
16739	dek ses mil sepcent		
	tridek naŭ		

### *Ordaj numeroj.*

1. unua, 2. dua, 3. tria, 4. kvara, 5. kvina, 6. sesa, 7. sepa, 8. oka, 9. naŭa, 10. deka, 11. dekunua, 20. dudeka, 37. tridek sepa, 186. cent okdek sesa, 1919. mil naŭcent dek naŭa.

### *Regulo.*

Ordaj numeroj formiĝas per aldono de adjektiva finiĝo *a* al la nombroj.

### *Multobligado.*

*Dufoje* du estas kvar.  
*Dekfoje* tri faras tridek.  
*Kvarfoje* kvin faras dudek.  
*Kvinfoje* tri faras dek kvin.  
 La *duoblo* de du estas kvar.  
*Dekoble* tri faras tridek.  
 La *kvaroblo* de kvin estas dudek.  
*Kvinoble* tri estas dek kvin.

### *Dividado.*

La *triono* de naŭ estas tri.  
 La *duono* de dek estas kvin.  
 La *sesono* de sesdek ses estas dek unu.  
 $\frac{1}{2}$  *duono*,  $\frac{1}{3}$  *triono*,  $\frac{3}{4}$  tri *kvaronoj*,  $\frac{2}{5}$  du *kvinonoj*,  
 $\frac{6}{10}$  0,6 ses *dekonoj*,  
 0'23  $\frac{23}{100}$  dudek tri cent *onoj*.

### *Kolektivaj nombroj.*

*Duope*, *triope*. *Duopo*, *trio*. *Kvarope* ili marŝis.

### *Distributivaj nombroj.*

*Po* unu, *po* du, *po* tri. *Po* sep metroj. *Po* kvin ili venadis.



## La jaro.

La jaro havas tricent sesdek kvin tagojn.

Ĝi havas kvar *sezonojn*: *printempo*, *somero*, *aŭtuno* kaj *vintro*.

La jaro havas dek du *monatojn*: *Januaro*, *Februaro*, *Marto*, *Aprilo*, *Majo*, *Junio*, *Julio*, *Aŭgusto*, *Septembro*, *Oktobro*, *Novembro*, *Decembro*.

La monato havas tridek aŭ tridekunu tagojn nur Februaro havas dudekok tagojn.

Ĉiu monato havas kvar *semajnojn*.

La tagoj de la semajno estas: *lundo*, *mardo*, *merkredo*, *ĵaŭdo*, *vendredo*, *sabato* *dimanĉo*.

La tago havas dudekkvar *horojn*.

De noktomezo ĝis tagmezo ni havas dekdu horojn.

La horo dividiĝas en sesdek *minutojn*.

La minuto dividiĝas en sesdek *sekundojn*.

Tiel la tago havas okdek-ses-mil-kvarcent sekundojn.

### *Demandoj kaj respondoj.*

*Kioma horo estas?*

Estas la sepa.

*Je kioma horo vi vespermanĝos?*

Je la oka horo vespere.

*Kiam vi leviĝas?*

Je la sesa horo matene.

*Kiam vi forveturos?*

La dudekan de Majo je la dekunua horo antaŭtagmeze.

*Kion vi faros posttagmeze?*

Je la dua posttagmeze komencos mia instruado en gimnazio kaj daŭros ĝis la sesa.

Praha, la deksepan de Aŭgusto 1932.

---

## Dekkvara leciono.

### *Interparolado pri domo.*

Instruisto: Hodiaŭ ni parolos pri la domo.

Studento: Tio estas konstruaĵo, en kiu loĝas familio

I.: Jes! En la ĉambroj oni loĝas, en la kuirejo oni kuiras, en la kelo oni tenas vinon, brasikon, rapon, terpomojn, karotojn. En la grenejo troviĝas greno: tritiko, hordeo, sekalo kaj aveno. Maizo estas en speciala maizejo.

S.: Kie estas fazeolo, fabo, pizo, lento kaj aliaj legomoj?

I.: En diversaj lokoj kelkaj terkulturistoj konservas ilin en subtegmento.

S.: La manĝaĵoj oni tenas en manĝaĵejo.

I.: Vi tion bone diris. Nun ni devas iomete trarigardi la domon: ĝi estas masonita sur bona fundamento. Ekstere oni devas supreniri ses ŝtupojn por veni al la pordo. Tio estas enirejo en la domon. Nia domo havas antaŭe kvin fenestrojn: du malgradajn el la kelo, du grandajn flanke de la pordo el la ĉambroj. La fenestro supre en la mezo enlasas la lumon en la subtegmenton.

S.: Sed fenestroj estas ankaŭ en la flankoj de la domo dekstre kaj maldekstre.

I.: Jes, ĉiuflanke ni havas po tri fenestrojn, entute ses, kaj kun jam menciitaj dekonu fenestrojn. La tegmento estas kovrita per tabuletoj el ardezo.

S.: Eniru ni en la domon, mi deziras vidi la internan aranĝon!

I.: Mi konsentas, sed ni devas frapi al la pordo. Bonan matenon, kara amiko, permesu al ni, ke ni trarigardu vian domon!

Kampanano: Bonvolu, kun plezuro mi montros ĝin al vi. Venu en la kuirejon, sidigu. Mia edzino prezentos al vi tason da lakto, peceton da pano, iom da butero kaj mielo.

I.: Vi estas tre afabla, mi tre ŝatas lakton kaj mielon.

Kampanano: Jen mia edzino!

I.: kaj S.: Bonan matenon!

Kampanano: Bonan matenon sinjoroj! Mi estas fiera, ke vi vizitis nian modestan domon. Estu bonvenintaj! Permesu al mi, la devo min vokas. — (Ŝi foriras).

I.: Vi havas tre larĝan fajrejon. Mi ŝatas sidi sur fajrejo ĉe fajro.

S.: Kiel infano mi ĉiam sidis sur nia fajrejo.

I.: Sur hejma fajrejo!

Kampanano: Nia hejmo estas nia sanktejo, la altaro en tiu sanktejo estas la fajrejo. Sur ĝi sidis mia patro, avo kaj praavo. Sur ĝi sidis mia patrino, avino kaj praavino, sur ĝi kolektiĝis niaj antaŭuloj de pratempoj ĉiutage. Sur ĝi kolektiĝas tuta mia familio. Sur ĝi kolektiĝos la venontaj generacioj.

Kampanano: (Venas portante broditan tablotukon.) Permesu al mi, sinjoroj, ke mi kovru ta tablon per tablotuko.

I.: Ho, tio estas belega manlaboro. Ĉu vi ĝin faris mem?

Kampanano: Jes, mi ĝin brodis mem. Nokte, kiam ĉiuj

jam dormas, mi ĉe lumo brodas kaj en mian laboron enmetas miajn pensojn, revojn kaj dezirojn: tio estas kiel silenta kanto kiu daŭre sur la tolo restas.

S.: Via esprimmaniero tre plaĉas al mi. Mi estas ravita, tio estas vera poemo.

---

## Dekkvina leciono.

### *Konversacio en kamparana domo.*

Instruisto: Mastrino, vi certe scias plekti kaj teksti.

Kamparanino: Jes, mi plektas irante al la kamplaboro, kaj teksas nur vintre.

Kamparano: Mia edzino estas tre laborema. Ŝi ĉiam laboras, kaj neniam laciĝas: ŝi prizorgas la infanojn, faras ĉiujn hejmajn laborojn, helpas al mi en malfacilaj terlaboroj kaj ankoraŭ belegajn manlaborojn ŝi faras.

Kamparanino: (Alportas lakton, mielon, buteron kaj panon). Bonvolu, sinjoroj, prenu de nia malriĉeco, malmulte estas, sed estas (donite) de koro!

Instruisto: Mi dankas vin, mastrino.

Kamparanino: Nun bonvolu viziti niajn ĉambrojn. La unua pordo en la koridoro maldekstre estas la pordo de nia dorma ĉambro.

Instruisto: La ĉambro tre plaĉas al mi, ĝi estas agrable ordigita. Via lito estas kovrita per belega litkovrilo.

Kamparano: Mia edzino ĝin ellaboris ankoraŭ kiel virgulino antaŭ la edziniĝo, ŝi laboris ĉitutage ĝis noktomezo. Mi timis, ke ŝi malsaniĝos de troa laboro kaj maldormado.

Kamparanino: Dio donas la amon kaj la fortojn al la amantaj.

Instruisto: Vera amo estas ĉiam dia dono. — Super la lito pendas tre bela bildo de dipatrino. La originalon pentris tre konata itala pentristo Rafaelo Sanzio, pentristo, kiu vivis de la jaro mil-kvarcent-okdek-tria ĝis la jaro mil-kvincent-dudeka.

Studento: La kopio estas bonega, en tiu kamparana ĉambro ĝi faras grandegan impreson.

Kamparano: Ĝi estis tre multekosta, mi aĉetis ĝin en Zagreb, sed mi ne bedaŭras la monon, kiun mi por ĝi elspezis, ĉar ĝi nin plenigas ĉiam je profunda pieco. Antaŭ ĝi ofte la tuta familio kolektiĝas por preĝi.

Studento: Tie ĉi estas lulilo. Ĉu vi havas tiel malgrandan infaneton ?

Kampanino: Ĝi jam estas trijara kaj ne kuŝas en la lulilo sed en tiu ĉi infanliteto.

Instruisto: Vi havas keston kaj ŝrankon.

Kampanino: En tiu kesto mia avino alportis sian doton.

Studento: Ĝi estas majstra faraĵo de iu nacia gravuristo, jen tre malnovaj kroataj motivoj.

Kampanino: Ni havas ankoraŭ kvar tiajn kestojn, ĉiu estas alie ornamita per gravuraĵoj. Mi bedaŭrinde kiel doton ricevis ŝrankon, ordinaran fabrikaĵon, miaj gepatroj rompis la malnovan kutimon.

Instruisto: Ĉu aliaj vilaĝanoj faras la samon?

Kampanino: Jes, tio estas nova modo. — Nun ni iru en duan ĉambron! — Tie loĝas niaj filinoj.

Instruisto: Kiom da infanoj vi havas?

Kampanino: Kun dia volo sep: kvar filojn kaj tri filinojn.

Studento: La plej malgranda estas filo, ĉu ne?

Kampanino: Jes, li estas tre brava kaj aminda.

S.: Tie ĉi estas breto, sur kiu staras taso, teleroj, potoj, glaso, boteloj kaj pladoj.

Kampanino: Pri tio devas zorgi miaj knabinoj.

Kampanino: Sur alia flanko estas dormoĉambro de miaj filoj. Ĝi havas la saman grandecon.

Kampanino: En la mezo staras tablo kun kvar seĝoj. Tie ĉi ili lernas, skribas, legas, kalkulas kaj desegnas. Fininte siajn taskojn ili rajtas ludi. Hodiaŭ ili ludas ekstere, sed, kiam estas malbela vetero, ili ludas en la ĉambro.

Kampanino: Bonvolu vidi ankaŭ la kvaran ĉambron. Tie loĝas la maljunuloj: miaj gepatroj.

Studento: Ĉu viaj maljunaj gepatroj ne estas hejme?

Kampanino: Ne, ili tute ne volas esti hejme, ili deziras esti okupataj. La bopatro paŝtas ŝafojn kaj bopatrino gardas meleagrojn.

Instruisto: Ĉu vi ne volus al ni montri viajn dombestojn?

Kampanino: Tre volonte, sed ili ne estas en stalo, en ĝi estas nur du bovidoj. Eliru ni tra malantaŭa pordo en la korton, mi montros al vi la stalojn por ĉevaloj, bovoj, ŝafoj, porkoj kaj por la kortaj birdoj.

Instruisto: Ĉe vi ĉio estas tre praktike aranĝita. La staloj estas dispartigitaj. La bestoj ne ĝenas unu la aliajn. La staloj estas modernaj, konstruitaj laŭ postuloj de la ekonomia scienco. Mi vidas, ke vi racie mastrumas.

Kiom da dombestoj vi havas?

Kampanano: Mi havas ĉevalon kaj ĉevalinon, du bovojn kaj tri bovinojn, dekdu porkojn kaj trideksep ŝafinojn. La nombro de kokinoj kaj kokidoj mi ne scias, ĉar la kortbirdojn mastrumas mia edzino.

Kampanano: Mi havas dek ses kokinojn kaj dudek tri kokidojn, du melegrinojn kaj dek kokojn meleagrojn.

Studento: Ĉu vi ne havas anserojn kaj anasojn?

Kampanano: Nun ne, ĉar mi ne havas bonan ŝancon en ili.

Instruisto: Mi rimarkis, ke vi havas sterkujojn ekster la korto.

Kampanano: Jes, ĝi estas farita el cemento kaj kovrita. El la staloj ĝis la sterkujo kondukas kanaloj, tra kiuj fluas sterkakvo. La sterko estas oro de la terkulturisto.

---

## Deksesa leciono.

### *En ĝardeno.*

Kampanano: Sinjoroj, bonvolu trarigardi mian ĝardenon.

Instruisto: Montru ĝin al ni, kara amiko, tre interesas nin vidi ĝin.

Kampanano: Iru ni antaŭ la domon, ĉar la ĝardeno estas antaŭe.

Studento: Ĝi estas belega, mi estis ravita, kiam mi ĝin vidis venante ĉi tien.

Instruisto: Mi ĝin vidis nur supraĵe, sed ankaŭ al mi ĝi faris grandan impreson. Nun mi deziras trarigardi ĝin precize.

Kampanano: Mi malfermas la pordon, bonvolu eniri.

Instruisto: Mi dankas al vi.

Studento: Ho, kiel belaj floroj!

Kampanano: La florojn kulturas mia edzino kun filinoj. Ili plejparte faras ĉiujn ĝardenlaborojn; mi kun laboristoj nur trafos la ĝardenon.

Studento: Vi havas multajn specojn de rozoj. Ili havas belegajn kaj agrablegajn odorojn.

Kampanano: Mia edzino alportis ĉiujn plantbranĉetojn, kiujn

ŝi povis ricevi ĉe konatuloj. Kion ŝi plantas, ĉio prosperas. Ŝi neniam lasas perei iun planton.

Instruisto: La rozoj ne estas plantitaj kune, sed ili estas dividitaj sur kelkaj lokoj, sed tiel lerte, ke ili faras harmonian unuon kun la aranĝo de la tuta ĝardeno. Tio estas artista faro.

Studento: Sur tiu florbedo troviĝas hiacintoj, tulipoj kaj diantoj. En la mezo staras lilioj.

Instruisto: Ĉi tie sub arbetaĵo mi vidas multajn foliojn de violoj.

Kampano: Jes, dum printempo tiu herbobedo estas plena je violoj, sed nun estas jam malfrue kaj ili velkis.

Instruisto: Tiun angulon plenigas grupo de siringaj arboj. En Majo tio devas aspekti kiel grandega bukedo.

Kampano: Jam en la dua duono de Aprilo siringo floras ĉeni. Ĝi plenigas je ĝojo ne nur min kaj mian tutan familion, sed ankaŭ ĉiujn preterpasantojn.

Studento: Mi tre bedaŭras, ke mi ne vidis ĝin florantan.

Instruisto: Mi ĉi tie vidas ankoraŭ miozoton, anemonon kaj aliajn florojn.

Studento: En la plej granda parto de la ĝardeno estas plantitaj legomoj.

Kampano: Jes, ĉi tie mi kulturas ĉion, kion oni bezonas en la kuirejo por la preparado de ĉiutagaj manĝaĵoj: terpomojn, pizon, fazeolon, fabon, bulbon, ajlon, petroselon, karotojn, kukumojn, kukurbojn, asparagon, brasikon, florbrasikon, salaton, spinacon, tomatojn, celerion, krenon kaj anizon.

Instruisto: Ĉe la ĉirkaŭbaro estas plantitaj frambuoj, ribuoj, grosuoj, aveluoj, melonujoj; certe viaj infanoj plejparte mem manĝas la frambojn, ribojn, grosojn kaj avelojn.

Kampano: Kompreneble, ili tion manĝas tre volonte, sed tiuj plantoj estas tiel fruktodonaj, ke la infanoj havas sufiĉe da fruktoj, kaj tamen ankoraŭ restas por ni plenkreskuloj. Ion ni konservas ankaŭ por la vintro.

Studento: Ĉi tie vi havas bedon da fragoj.

Kampano: Jes la fragojn mi vendas en la urbo kaj mi ricevas sufiĉe da mono por ili.

Instruisto: Mi vidas, ke via ĝardeno estas tre zorge kulturata.

Kampano: Tion faras mia edzino kun la infanoj, kiel mi diris. Kiam ili havas iomete da tempo, ili tuj iras en la ĝardenon labori. Ĝi estas proksime, kaj oni povas eluzi ĉiun mallongan libe-

ran tempon. Ĝardenlaboroj ne lacigas, ili estas amuzaj kaj tre sanigaj.

Studento: La sukceso de tiu laboro estas grandega: vi ricevas ĉiujn legomojn, kiujn vi bezonas por la nutrado de la tuta familio. Kelkajn fruktojn vi vendas kaj ricevas la monon, kiun vi bezonas por aĉetado de kafo, sukero, rizo, salo, pipro kaj aliaj spicoj.

Kampanano: La rezultato estas tiel granda, ĉar ni plantas novan specon tuj, kiam la unua estas rikoltita. Se oni tion faras lerte, oni povas ricevi tri ĝis kvar rikoltojn jare.

Instruisto: Mi ofte legis en libroj kaj gazetoj ke la ĝardenkulturado estas enspeziga, sed mi pensis, ke tio estas nur teorie; nun mi vidas praktikan efikon. Tia maniero de terkulturado povus esti solvo de socia demando en dense loĝataj kaj malriĉaj regionoj de nia patrujo.

Kampanano: Jes, per ĝi malgrandaj posedantoj povus fariĝi bonstarantoj. — Sed ni revenu hejmen!

Studento: Kion mi vidas! En ĉiuj fenestroj estas potfloroj.

Kampanano: Mia edzino volas havi ankaŭ la domon florumitan; en potoj ŝi kulturadas diantojn, rezedojn, rododendron, ciklamojn, begoniojn k. t. p.

Instruisto: Ĉi tie la naturo kaj la homa kulturo faras imponan unuon, ĉio estas plena je floroj kaj ĝojoj. La naciaj kostumoj kaj manlaboroj estas imitado de tiu beleco.

Studento: Mi estas tre danka al vi por ĉio, kion mi ĉe vi aŭdis, vidis kaj lernis. Mi dankas al vi!

Instruisto: Mi ankaŭ, mastro kaj mastrino, elkore dankas al vi. — Adiaŭ!

Kampanano kaj kampananino : Adiaŭ, sinjoroj, ĝis la revido!

---

## Deksepa leciono.

Lernanto: Jam delonge, sinjoro instruisto, ni ne parolis pri gramatiko. Mi ĝin tre ŝatas, ĉar ĝi estas eksterordinare interesa.

Instruisto: La hodiaŭan lecionon ni povas dediĉi al ĝi. Montru viajn grupojn de vortoj.

L.: Via vico de vortoj kun finiĝo *-e*, jam treege kreskis: cert-*e*, kelkfoj-*e*, tag-*e*, nokt-*e*, domaĝ-*e*, bon-*e*, plu-*e*, sufiĉ-*e*, rekt-*e*, ĝeneral-*e*, regul-*e*, ti-*e*, nepr-*e*, neces-*e*, varm-*e*, malvarm-*e*, supr-*e*.

Instruisto: Gramatike ili estas nomataj **adverboj**.

Lernanto: *Kiel la adjektivoj pliprecizigas la substantivojn, tiel la adverboj pliprecizigas la verbojn kaj la adjektivojn.*

Instruisto: Ili esprimas manieron, lokon, tempon, kvanton aŭ direkton: *saĝe* paroli, *hejme* labori, *tage* studi, *nokte* dormi, veni ĉi *supren*; *sufiĉe* granda, *nepre* necesa, *tute* taŭga, *treege* riĉa.

Lernanto: Mi havas ankoraŭ multajn grupojn de vortoj, pri kiuj ni ne parolis. La vortfaradon mi tre bone komprenas kaj kapblas memstare derivi novajn vortojn pere de afiksoj, sed unu vorteton mi ne komprenas.

Instruisto: Mi jam divenas: ĝi estas la **artikolo „la“**.

Lernanto: Jes, sinjoro instruisto, ĝi tre ofte aperas en niaj lecionoj, sed mi ne povas ĝin traduki en nian nacian lingvon.

I.: Certe, ĉar ni ne havas artikolon en nia nacia lingvo. Slavoj ĝenerale ne havas ĝin. Germanoj, italoj, francoj, angloj kaj multaj aliaj nacioj uzas artikolon.

L.: Bonvolu, klarigi al mi ĝian uzadon.

I.: La artikolo „la“ estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa.

Anstataŭ „la“ oni povas ankaŭ diri „l“ (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo). Ekzemple: De l' homaro, pri l' esperantismo, pro l' bono de l' junularo.

L.: Kio estas **prepozicio**.

I.: Prepozicio estas plejparte mallongaj neŝanĝeblaj vortoj, kiuj staras antaŭ substantivoj aŭ pronomoj. Ili povas servi ankaŭ kiel prefiksoj.

L.: Ho jes, mi ankaŭ de ili faris grupojn, kaj trovis, ke oni ne bezonas traduki kelkajn el ili, sed ke du esperantaj vortoj oni tradukas per unu sola nia vorto: *de* patro, *al* patro, *per* krajono.

I.: Montru al mi, kiujn vi havas, ordigu ilin alfabete.

L.: Se kelkaj mankas al mi, sinjoro instruisto, bonvolu ilin diri al mi, por ke mi ĉiujn havu kune, ĉar, mi opinias, ke ili estas tre gravaj en la konstruo de la lingvo.



I.: Bone, skribu ilin laŭ alfabeto ordo: **Al, anstataŭ, antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, da, de, depost, dum, ekster, el, en, ĝis, inter, je, kontraŭ, krom, kun, laŭ, malgraŭ, per, por, post, preter, pri, pro, sen, spite, sub, super, sur, tra, trans.**

*Ĉiuj prepozicioj akordiĝas kun nominativo.*

L.: Sed ni havis ofte ekzemplojn, en kiuj prepozicio akordiĝis kun akuzativo, kiel: Traduki *en nian nacian lingvon*. La birdo flugas *en* la ĉambregon. Kiam la azeno venis *en* la rivereton, ree ĝi sin rulis *en* la akvon.

I.: Jes, sed ĉi tie ne la prepozicio postulas la akuzativon, sed la direkto de la movo.

L.: La uzado de l' prepozicio „je” estas iom stranga, ĝi ne havas difinitan signifon.

I.: Ĝi estas komuna prepozicio. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi „je”. Sed estas bone uzadi la vorton „je” kiel eble pli malofte.

*Anstataŭ la vorto „je” ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio.* Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon). Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon). Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon).

El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple, ni povas diri „obei al la patro” kaj „obei la patron” (anstataŭ „obei je la patro”). Sed ni ne uzas akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉimalpermesas; ekzemple: ni povas diri „pardoni al la malamiko” kaj „pardoni la malamikon”, sed ni devas diri ĉiam „pardoni al la malamiko lian kulpon.

---

## Dekoka leciono.

Instruisto: En Esperanto la substantivoj povas havi nur kvar diversajn finiĝojn: *-o, -on, -oj, -ojn*. En nia gepatra lingvo ili povas ricevi pli da finiĝoj. Laŭ la finiĝoj ŝanĝiĝas ankaŭ ilia senco. Tia ŝanĝado gramatike nomiĝas **deklinacio**. Ni havas sep kazojn: 1. nominativo, 2. genitivo, 3. dativo, 4. akuzativo, 5. vokativo; 6. lokativo, 7. instrumentalo.

En Esperanto ĉiujn kazojn, escepte nominativo kaj akuzativo, ni devas formi helpe de prepozicioj. La sekvantaj demandoj kaj respondoj donu la ekzemplon.

### *Singularo.*

1. **Kiu** estas tiu viro? Li estas mia **amiko**.
2. **Kies** libro estas tio? Ĝi estas la libro **de la amiko**.
3. **Al kiu** vi donacis la libron? **Al la amiko**.
4. **Kiun** vi deziras vidi? **La amikon**.
5. Oni **vokas** lin: Ho, **amiko!**
6. **Pri kiu** vi parolas? **Pri amiko**.
7. **Kun kiu** vi parolas? **Kun amiko**.  
**Per kio** ni tranĉas? **Per tranĉilo**.

### *Pluralo:*

1. **Kiuj** estas tiuj viroj? Ili estas niaj **amikoj**.
2. **Kies** libroj estas tio? La libroj **de la amikoj**.
3. **Al kiuj** vi donacis la librojn? **Al la amikoj**.
4. **Kiujn** vi deziras vidi? **La amikojn**.
5. Oni **vokas** ilin: Ho, **amikoj**.
6. **Pri kiuj** vi parolas? **Pri amikoj**.
7. **Kun kiuj** vi promenis? **Kun amikoj**.  
**Per kio** ni skribas? **Per plumoj**.

Lernanto: Tiuj ekzemploj ĉion klarigas al mi. Post la fino de ĉi tiu leciono mi provos memstare deklinacii substantivojn, adjektivojn kaj pronomojn.

I.: Faru tion, ĉar tio estos por vi tre bona ekzerco.

L.: Mi nun bone konas la prepoziciojn, sed en miaj notoj mi havas neŝanĝeblajn vortojn, kiuj ne estas prepozicioj.

I.: Tio estas **konjunkcioj**: *aŭ, aŭ ... aŭ, ĉar, ĉu, ĉu ... ĉu, do, eĉ, ja, jen ... jen, ju pli ... des pli, kaj, ke, kvazaŭ, nek ... nek, ol, se, sed, tamen*.

L.: Ili kunligas vortojn kaj frazojn. Mi havas ĉi tie ankoraŭ kelkajn vortojn, kiuj estas nek prepozicioj nek konjunkcioj.

I.: Tio estas **interjekcioj**: *Adiaŭ! Antaŭen! Atentu! Atenton! Bis! Bone! Brave! Certe! Dio mia! Fi! For! Ha! Haltu! He! Helpu! Ho! Ho ve! Hura! Jen! Kuraĝe! Nu! Nu do! Vivu!*

L.: Sed kelkaj el tiuj interjekcioj estas simplaj imperativoj.

I.: Imperativoj uzataj kiel interjekcioj.

Nun ni povas transiri al la vortfarado.

L.: En la sepa leciono ni havis aron da vortoj kun prefikso *bo-*, El la tiaj ekzemploj ni klare vidas, ke ili signifas parencecon devenantan per edziĝo aŭ edziniĝo: *bo*-patro, *bo*-patrino, *bo*-frato, *bo*-fratino.

I.: Nova prefikso, antaŭ nelonge oficialigita, estas *mis-*. Ĝi signifas, ke oni erare plenumas tion, kion eldiras la radiko: uzi, *mis*-uzi, kompreni, *mis*-kompreni, paŝi, *mis*-paŝi, aŭdi, *mis*-aŭdi, informi, *mis*-informi, k. t. p.

L.: Prefikso *dis*, donas al la vorto signifon de apartigo, divido aŭ forigo en diversajn flankojn: *dis*-rompi, *dis*-dividi, *dis*-sendi, *dis*-semi, *dis*-doni, *dis*-iri, *dis*-ŝiri, *dis*-porti, k. t. p.

Prefikso *re-* montras denovan faron, ripeton de ago aŭ revenon al la deira punkto: *re*-diri, *re*-veni, *re*-novigi, *re*-iri, *re*-maĉi, *re*-memori, *re*-sendi, *re*-teni, *re*-naskiĝo.

L.: *La prepozicioj povas ankaŭ servi kiel prefiksoj: al*-doni, *antaŭ*-meti, *apud*-esti, *ĉe*-esti, *ĉirkaŭ*-iri, *de*-nove, *dum*-viva, *ekster*-ordinara, *el*-doni, *en*-terigi, *for*-iri, *ĝis*-vivi, *kotraŭ*-stari, *krom*-kostoj, *kun*-ligi, *laŭ*-bezone, *per*-labori, *post*-iri, *preter*-lasi, *pri*-pensi, *sen*-sencajo, *sub*-oficiro, *super*-flua, *sur*-meti, *tra*-iri, *frans*-flugi, k. t. p.

L.: Nun la vorto instruisto. Ĝi estas formata per sufikso – *ist-*. En niaj lecionoj mi trovis multajn vortojn kun la sama sufikso.

*Tiel derivitaj vortoj montras profesion aŭ metion, per kiu speciale sin okupas iu persono: telegraf-isto* telegrafas, *bicikl-isto* veturas sur biciklo, *dent-isto* plibonigas la dentojn, *sanig-isto* sanigas la homojn, *gard-isto* gardas, *ŝu-isto* faras ŝuojn, *mason-isto* masonas, *forĝ-isto* forĝas, k. t. p.

Sufikso *-aĵ-* servas por formi nomon de konkreta objekto farita el tio, kion esprimas la radiko: leg-*aĵo*, konstru-*aĵo*, manĝ-*aĵo*, dolĉ-*aĵo*, trink-*aĵo*, bov-*aĵo*, acid-*aĵo* desegn-*aĵo*, rost-*aĵo*, k.t.p.

I.: *Oni povas ankaŭ du aŭ kelkajn vortojn kunmeti por esprimi novan ideon.*

L.: Jes, mi scias tion, mia grupo de tiaj vortoj estas granda: arte-farita, last-foje, pied-fingro, kamp-labora, vort-farado, lit-kovrilo, di-patrino, dormo-ĉambro, man-laboro, ter-kulturisto, ĝarden-laboro, dom-besto, kort-birdo, frukto-dona, k. t. p.

I.: Aliaj tiaj vortoj estas: vaporŝipo, elektromotoro, okulvitroj, florkrono, punlaboro, labortago, festotago.

L.: Oni povas kunmeti la radikojn, aŭ, se tion postulas la belsoneco, ankaŭ tutajn vortojn kun finiĝo, kiel montras la supraj ekzemploj.

---

## Deknaŭa leciono.

### Vilaĝo.

Instruisto: Nun ni vizitos la vilaĝon.

Studento: Tre volonte mi trarigardos ĉiujn vidindaĵojn de ĉi tiu vilaĝo.

I.: Iru ni sur la strato ĝis la placo, kie estas ankaŭ stratkruciĝo.

S.: Ĉe la placo estas preĝejo kaj la poroĥejo.

I.: Eniru ni la preĝejon. Kiu volas ekkoni la loĝantojn de iu loko, li vidu ilian preĝejon.

S.: La preĝejo estas domo de Dio kaj kunvenejo de l' homoj.

I.: Ĉi tiu preĝejo havas tri navojn: la ĉefan kaj du flankajn navojn.

S.: En ĉiu navo troviĝas po unu altaro.

L.: La ĉefa altaro estas dediĉita al sankta Georgo.

S.: Jes mi vidas lian statuon sur la altaro. La sanktulo rajdas sur fajra ĉevalo, kiu saltas sur la drakon. La drako levis la kapon kaj malfermis la buŝegon por engluti la sanktulon, sed li per lanco atakas la drakon.

I.: La aliaj statuoj de la sanktuloj sur la altaro simbole kompletigas tiun batalon de l' bono kontraŭ la malbono.

S.: La altaro estas belega. Mi miras, ke tia majstroverko troviĝas en tiu vilaĝo.

I.: Laŭ la stilo mi opinias, ke ĝi devenas el la dekkvina jarcento.

S.: La altaro de maldekstra navo estas dediĉita al sankta Mario, dipatrino, la dekstra al la sanktuloj Kozmo kaj Damiano.

I.: Vi bone konas la statuojn kaj bildojn de sanktuloj kaj sanktulinaj.

S.: Ĉi tie la benkoj estas *pli belaj* ol en la urbaj preĝejoj. Ili estas faraĵo de malnova *artmetio*.

I.: La benkoj ne estas *posedaĵo* de la preĝejo, sed du aŭ tri kamparanaj familioj kune *posedas* unu benkon. Kiel heredaĵo ili *transiras* de generacio al generacio. — Permeson por enmeti

en la preĝejon novan benkon oni ricevas tre malfacile, kaj nur tiam, se la benko estas farita en stilo de aliaj.

S.: Tio estas bonega kutimo.

I.: Kampanoj estas tre atentaj pri beleco de sia preĝejo. Ĉioen la preĝejo devas esti *plej bela*.

S.: *Ankaŭ* orgeno estas ĉi tie.

I.: Jes, sinjoro Filipoviĉ estas bonega orgenisto, li ludas majstre. Li estas kantestro de loka kampana kantsocieto. Ili kantas ĉe *diservo*.

S.: Mi vere ĝuis la belecon de tiu vilaĝa preĝejo.

I.: *Elirante* ni ankoraŭ unu foje *rigardu* la tutan bildon de tiu majstra faraĵo.

S.: Antaŭ la preĝejo staras granda maljuna tilio. Eble ĝi estis *plantita* tuj post la konstruo de la preĝejo.

I.: Eble, mi ne scias, ĉu tio troviĝas en kroniko.

S.: Ĉirkaŭ la arbo estas ŝtona benko.

I.: Ĉi tie sidas la homoj, kiuj dimanĉe de malproksime venas, kaj atendas la komencon de meso. Post la meso ĉi tie la komunumestro diskonigas oficialajn sciigojn. Ĉi tie okazas ankaŭ grandaj politikaj kunvenoj.

S.: Ĉu ni vizitos sinjoron paroĥestron?

I.: Certe, sed poste, ĉar nun ni devas viziti sinjoron Filipoviĉ kaj lian lernejon.

S.: Li estas la instruisto, kiun la kampanoj tiel laŭdas?

I.: Jes, li estas vere *laŭdinda*. Ne nur, ke li estas bonega pedagogo kaj en lernejo laboras *sukcesplene*, sed li ankaŭ ekster la lernejo multe kaj entuziasme laboras. Li estas vera kulturlaboristo.

S.: Dumvoje ĝis la lernejo bonvolu al mi rakonti, kion li laboras.

I.: Li instruas kantadon en kanta societo. — Jam de la komenco, kiam li ĉi tien venis, li estas sekretario-kasisto de la kooperativo. Li enkondukis regulan ŝparadon kun granda sukceso tiel, ke nun la kooperativo disponas pri granda kapitalo.

S.: Ĉu unuopaj anoj multe ŝparas?

I.: Kelkaj alportas ĉiusemajne po unu dinaro, kelkaj po du, kelkaj po tri. *Pli riĉaj* ŝparas po dek dinarojn semajne. Tio ne estas multe, sed ŝparas ĉiuj, junaj kaj maljunaj, viroj kaj virinoj.

Ĉiufano havas sian *ŝparlibreton*. En tiu vilaĝo fariĝis kutimo, ke la patro tuj post la *bapto* de sia infano je lia nomo enmetas

en kooperativan ŝparkason malgrandan sumon. Tiaj malgrandaj sumoj sumiĝas en grandan sumon.

S.: Ĉu ĉi tie estas popola biblioteko kaj legejo?

I.: Jes, la biblioteko havas *pli ol* naŭcent volumojn.

S.: Ĉu ĉi tieaj kamparanoj prunteprenas librojn el biblioteko?

I.: Jes, ili multe legas; ne nur legas, sed ankaŭ studas. Kelkaj havas *propran* bibliotekon *de plej bonaj* verkoj.

S.: Sed ili ankaŭ vizitas legejon?

I.: Jes, por trafoliumi gazetojn kaj preparoli kulturajn kaj ekonomiajn demandojn.

S.: Ĉu ili havas prelegojn?

I.: Jes, vintre trifoje semajne, somere nur ĉiun dimanĉon.

S.: Kiu prelegas?

I.: Sinjoroj paroĥestro kaj instruisto *regule*, sed de tempo al tempo ili invitas bonan paroladiston el Zagreb.

S.: Pri kio ili parolas?

I.: Pri ĉio, kion klera kamparano devas scii.

---

## Dudeka leciono.

### *Pluaj afiksoj.*

Studento: *Kapableco*, *parenceco*, *pieco*, *grandeco*, estas derivitaj per sufikso *-ec-*, kiu esprimas ideon de kvalito.

Instruisto: Jes, tion, kio estas esprimita per vortoj kun sufikso *-ec-*, oni ne povas *mane* tuŝi, sed la objektojn nomatajn per vortoj kun sufikso *-aĵ-*, oni povas preni en la manon, ili estas *konkretaj*, dume la aliaj, finiĝintaj per *-ec-*, estas *abstraktaj*.

S.: *Preĝejo*, *lernejo*, *grenejo*, *manĝaĵejo*, *enirejo*, *kuirejo*, *fajrejo*, *sanktejo*, *paroĥejo*, *kunvenejo*, estas derivitaj per sufikso *-ej-*. Ĝi esprimas lokon destinitan por tio, kion esprimas la radiko de la vorto.

I.: Jes, en la *laborejo* oni laboras, en la *oficejo* oni oficas, en *banejo* oni sin banas, en *ĉevalejo* oni tenas ĉevalojn, en *librejo* oni vendas librojn, en *kafejo* oni trinkas kafon.

S.: *Pensado*, *parolado*, *agado*, *estado*, *aĉetado*. — La sufikso *-ad-* esprimas agon ripetitan aŭ longedaŭran.

I.: Aliaj ekzemploj estas: pafi *pafadi*; promeni, *promenadi*; ripeti, *ripetadi*; vendi, *vendadi*; salti, *saltadi*.

S.: *Infaneto*, *rivereto*, *tabuleto*, *peceto*, *liteto*. — Sufikso *-et-* signifas malaltigon, malfortigon aŭ malgrandigon de tio, kion esprimas la radiko. — Male la sufikso *-eg-* esprimas pli altan, pli fortan *gradon*. Ekzemple: *Facilega*, *plezurega*, *premegi*, *bonege*, *grandega*, *belega*, *buŝego*.

I.: Pluaj ekzemploj estas: *Dometo*, *domo*, *domego*; *lageto*, *lago*, *lagego*; *beleta*, *bela*, *belega*; *rideti*, *ridi*, *ridegi*; *piedeto*, *piedo*, *piedego*; *varmeta varma*, *varmega*; *libreto*, *libro*, *librego*.

S.: *Kokido*, *meleagrido*, *bovido*, *ŝafido*, *ido*.

I.: Per sufikso — *-id-* ni derivas nomojn kun la signifo: *infano*, *filo*, *naskito*. Ekzemploj:

*Reĝo*, *reĝido*; *Izraelo*, *Izraelido*; *azeno*, *azenido*; *erinaco*, *erinacido*; *cervo*, *cervido*; *porko*, *porkido*; *leporo*, *leporido*; *leono*, *leonido*.

S.: *Patrujo*, *Jugoslavujo*, *frambujo*, *ribujo*, *grosujo*, *avelujo*, *sterkujo* estas vortoj kun sufikso — *-uj-*.

Mi devas konfesi, sinjoro instruisto, ke mi ne povis kunmeti regulon pri uzado de tiu ĉi sufikso.

I.: Mi tion kredas al vi, mia kara, ĉar la sufikso — *uj* ne havas nur unu uzadon sed tri:

1. Per la sufikso — *uj* oni faras nomon de objekto, en kiu oni kaŝas, konservas aŭ portas objekton esprimitan de la radiko. Ekzemploj:

Paperon oni portas en *paperujo*, monon en *monujo*, supon en *supujo*, kafon en *kafujo*, akvon en *akvujo*, plumojn en *plumujo*, cigarojn en *cigarujo*, cigaredojn en *cigaredujo* kaj kraĵojn en *kraĵonujo*.

2. Ĝi servas por derivi nomon de la lando, en kiu loĝas popolo esprimita de la radiko. Ekzemploj:

Italoj loĝas en *Italujo*, Francoj en *Francujo*, Hispanoj en *Hispanujo*, Angloj en *Anglujo*, Germanoj en *Germanujo*, Poloj en *Polujo*, Rusoj en *Rusujo*, Hungaroj en *Hungarujo*, Bulgaroj en *Bulgarujo* k. t. p.

3. La sufikso — *uj* servas por derivi nomon de l' arbo *donanta* la fruktojn, esprimitaj de la radiko.

*Pomujo* produktas pomojn, *pirujo* pirojn, *ĉerizujo* ĉerizojn, *prunujo* prunojn, *persikujo* persikojn, *abrikotujo* abrikotojn, *juglandujo* juglandojn, *kukumujo* kukumojn, *melonujo* melonojn kaj *migdalujo* migdalojn.

S.: Nun mi tion tre bone komprenas, sed opinias, ke tiu sufikso estas troŝarĝita.

I.: Certe! Tial ni provas ĝin senŝargigi per alia kunmetado de la vortoj.

La nomojn — de la **fruktodonaj arboj** oni povas derivi ankaŭ per — *arbo*. Ekzemple: *pomarbo*, *pirarbo*, *ĉerizarbo*, k. t. p.

La nomon de la patrujo de iu popolo oni povas formi per — *lando*. Ekzemploj: *Franclando*, *Ruslando*, *Svislando*, *Nederlando*, *Hinlando* k. t. p.

S.: Sekvanta grupo de vortoj estas: *Ŝparema*, *mortema*, *laborema*, *scivolema*. — Ĉi tie estas sufikso — *em*. Ĝi esprimas inklinton, amon aŭ kutimon fari ion.

I.: Tute bone! Tiu, kiu volonte parolas, estas *parolema*; kiu volonte babilas estas *babilema*; kiu volonte kuŝas, estas *kuŝema*; kiu ofte mensogas, estas *mensogema*; kiu facile cedas, estas *cedema*, kiu tuj kredas, estas *kredema*.

S.: *Kantestro*, *komunestro*, *paroĥestro*, *urbestro*, *gimnaziestro*. Sufikso — *estr-* signifas personon, kiu estas ĉefo, komandanto aŭ administranto de tio, kion esprimas la radikoj.

I.: Pluaj ekzemploj estas: *regnestro*, *lernejestro*, *oficejestro*, *ŝipestro*, *domestro*, *militestro*, *policestro*, *staciestro*, *rabiestro*.

Sufikson — *il-* ni uzas por derivi nomojn de l' objektoj, kiuj estas uzataj por plenumi agon esprimitan de la radikoj.

Ekzemploj: Per *kudrilo* oni kudras, per *hakilo*, oni hakas, en *lulilo* oni lulas la infanojn, per *segilo* oni segas, per *kombilo* oni kombas per *razilo* oni razas.

S.: *Kampano*, *kampanino*; *societo*, *societano*; *Kristo*, *kristano*; *Zagreb*, *zagrebano*; *urbo*, *urbano*; *vilaĝo*, *vilaĝano*; *nacio*, *naciano*.

Sufikso — *an* signifas personon, kiu estas membro de ia societo aŭ unuiĝo, adepto de ia religio, loĝanto de ia lando, urbo aŭ vilaĝo.

---

## Dudek unua leciono.

### *Urbo.*

Instruisto: Ĉu vi volas kun mi viziti urbon?

Lernanto: Tre volonte, ĉar mi scias, ke mi en tiu okazo multon lernos.

I.: La vagonaro foriras je la sesa horo matene. Venu morgaŭ matene je la kvina kaj tri kvaronoj al la stacidomo. Ne malfruiĝu!

L.: Mi petos mian patrinon, ke ŝi veku min ĝustatempe.



I.: Ho, vi estas jam ĉi tie!

L.: Jes, sinjoro instruisto, mi deziras al vi bonan matenon.

I.: Bonan matenon! Mi tuj aĉetos biletojn.

L.: Ĉe la giĉeto staras multaj vojaĝantoj, por vi estos malagrade stari en vico, tial permesu al mi aĉeti la biletojn.

I.: Bone, ĉi tie estas mono.

L.: Ĉu ni vojaĝos en dua aŭ tria klaso?

I.: En la tria!

L.: Bonvolu, ĉi tie estas via bileto.

I.: Mi dankas vin! – La vagonaro alvenos baldaŭ. Ni iros en la vagonon por nefumantoj.

L.: La vagonaro jam alvenas.

I.: Ni havas bonan ŝancon, du lokoj ĉe la fenestro estas ankoraŭ liberaj, ni okupu ilin!

L.; Tio ĝojigas min, ĉar mi dumvoje povos vidi la pejzaĝon.

I.: Ni estas ĝuontaj la naturbelaĵojn.

L.: Jen la urbo, ni alproksimiĝas al la fina stacio.

I.: La vojaĝo tre rapide forpasis, ĉar ni preterveturis multajn vidindaĵojn, kiuj konstante nian atenton tenis streĉita.

L.: La vojaĝo estis vera plezuro.

I.: Atentu, ne forgesu ion en la kupeo.

L.: Ĉiuj alvenintoj rapidas al la elirejo.

I.: Ni ne bezonas rapidi, ĉar ni havas tempon.

L.: La placo antaŭ la stacidomo estas tre granda kaj asfaltita.

I.: Ĝi etendiĝas kiel bele kulturita ĝardeno ĝis la mezo de la urbo.

L.: La domoj estas grandaj, ĉiuj kvaretaĝaj. Kelkaj havas turojn aŭ kupolojn.

I.: La domoj estas nur trietaĝaj, ĉar la etaĝo plejproksima al la tero estas nomata teretaĝo.

L.: La ĝardeno estas belega. La florbedoj estas arte aranĝitaj. Tiu harmonio de la koloroj tre plaĉas al mi.

I.: La ĝardenistoj devas havi ne nur fakajn sciojn sed ankaŭ estetikan senton.

L.: En la ĝardeno mi vidas kelkajn monumentojn.

I.: Jes, estas monumentoj de niaj gloraj kaj meritplenaj viroj: poetoj, verkistoj, sciencistoj, pentristoj, skulptistoj kaj gvidantoj de la popolo.

L. Mi petas, haltu ni ĉi tie sur la angulo por iomete rigardi la preterpasantojn.

I.: Certe estas interese stari ĉi tie kaj observi la trafikon: homojn, tramvojon, aŭtomobilojn, biciklojn kaj diversajn veturilojn.

L.: Kion faras la policisto en la mezo?

I.: Li ordigas la trafikon. — Rigardu, — nun li haltigas ĉiujn veturilojn venantajn el la strato antaŭ ni kaj lasas pasi tiujn el la dekstra kaj maldekstra direktoj.

L.: Kia estas la nomo de la feraj stangoj en la pavimo, sur kiuj ruliĝas la tramo ?

I.: Relo.

L.: Do, ankaŭ la vagonaro ruliĝas sur la reloj?

I.: Certe!

L.: Verŝajne ĉi tie ankaŭ la irado de la homoj estas reguligita.

I.: Jes, oni devas marŝi dekstren.

L.: Kien ni iros nun?

I.: Ni iru antaŭen, mi volas montri al vi la foirejon.

L.: Ho, kiel multaj homoj svarmas en la mezo de la kontraŭa placo flanko!

I.: Tie estas la enirejo de la foirejo. Ni ankaŭ iros tien.

L.: La komercaĵoj estas ĉi tie aranĝitaj kun artista gusto.

I.: En ĉi tiu foirejo oni vendas ĉiujn eblajn manĝaĵojn: lakton, mielon, ovojn, legomojn, fruktojn, grenojn, farunon, pastaĵojn, viandon, buteron, grason, oleon, spicojn, k. t. p.

L.: La mastrinoj povas ĉi tie aĉeti ĉion, kion ili bezonas por la kuirejo.

I.: Ili tre fervore elektas, kiel vi vidas. — Kun la vilaĝanoj ili multe marĉandas.

L.: Ni nun vidas, kion la urbanoj hodiaŭ tagmanĝos kaj vespermanĝos.

I.: Ni devas jam foriri, ĉar ni estas ankoraŭ multon vizitontaj.

L.: Kien ni iros nun?

I.: Unue ni vizitos la katedralon, ĉar ĝi estas en la proksimeco. Samtempe mi montros al vi parton de la antikva urbo.

L.: Ĉu vi ĉion klarigos al mi?

I.: Bedaŭrinde ne, la materialo estis tro abunda, ni estus perdontaj tro multe da tempo. Tial ni devas rapidi. Ni lasu impresigi nin de la vidindaĵoj kaj iam poste ni pristudos la impresojn. Nur kelkaj rimarkoj sufiĉu.

L.: Mia animo rimarkinde pliriĉiĝis per novaj kaj gravaj impresoj. Nun mi pli bone komprenas, kion mi antaŭe legis kaj studis, ĉar mi per miaj okuloj vidis tion, kion mi ĝis nun devis nur imagi.

I.: Nun ni vizitos la bildogalerion. Ĝi posedas famajn verkojn de italaj, flandraj, nederlandaj, germanaj kaj jugoslavaj majstroj.

L.: Mi estas ravita. Mi dezirus ĉe ĉiu bildo longe stari kaj pie aŭskulti viajn klarigojn.

I.: La bildoj tion vere meritas, sed vi certe vidos ilin ankaŭ poste en via vivo plurfoje, ĉar bildogalerion oni devas ofte viziti, por akcepti ĉiam freŝajn impresojn.

L.: Ĉi tie estas la plej novaj skoloj de la pentrarto.

I.: Nun ni vizitos muzeojn. Unue la arkeologian. En ĝi ni vidos prahistoriajn kaj historiajn monumentojn.

(Daŭrigota kaj finota).

---

## Dudek dua leciono.

### *Urbo.*

(Daŭrigo kaj fino).

Lernanto: Ĉi tie mi pli facile lernus historion ol el la lernolibro. Mi vidas, ĉie estas surskriboj. En ĉi tiu ĉambrego estas objektoj el prahistorio. Nun ni trapaŝas la historion de malnova Egiptujo, Asirio, Babilonio, Grekujo kaj de roma imperio; post la mezepoko ni venas al la nova epoko.

Instruisto: Bedaŭrinde ni ne havas tiom da tempo je nia dispono, kiom ni bezonus por iomete pli detale trarigardi la kolektaĵojn. — Nun ni vizitos la natursciencan muzeon.

L.: Tio estas mineralogia kaj geologia apartaĵoj.

L.: Ni rapide trarigardu la zoologian kaj botanikan sekciojn.

L.: Feliĉaj studentoj, kiuj havas la okazon natursciencan studi ne nur el la libroj sed ankaŭ sur objektoj.

I.: Plej bone estas la natursciencojn studi precipe el la naturo mem. — Ni iru en la artmetian muzeon!

L.: Ĉi tie estas konservataj objektoj de arta metio, ĉu ne?

I.: Jes, de malnovaj kaj novaj metioj. — Fine ni vizitu ankaŭ la etnografian muzeon.

L.: Jen la samaj manlaboroj, kiujn ni vidis ĉe la vilaĝano!

I.: En ĉi tiu muzeo ni havas produktojn de popola metio kaj arto el tuta Jugoslavio. Kiel vi vidas, ĉi tie ni trovas folkloron

ankaŭ de aliaj popoloj. Komparaj studoj en tiu fako estas tre interesaj kaj instruaj.

L.: Min tre interesas la vivo kaj moroj de fremdaj popoloj.

I.: Jam pasis tagmezo, ni estas lacaj kaj malsataj, tial ni iru restoracion por tagmanĝi.

L.: La observo de tiom da diversaj objektoj tiel okupis mian atenton, ke mi eĉ ne rimarkis la forflugon de la tempo.

\*

I.: Ni prenos supon, viandon kun legomoj kaj dolĉaĵon, ĉu ne?

L.: Kiel plaĉas al vi, sinjoro instruisto !

I.: Fininte la tagmanĝon ni iru kafejon por legi la gazetojn kaj iomete ripozi. Poste ni vizitos la botanikan ĝardenon.

L.: En ĉi tiu ĝardeno estas multaj plantoj, kiujn mi neniam antaŭe vidis. Ĉi tie estus facile botanikon lerni.

I.: Ni sidigu sur tiun benkon en ombro de la arboj kaj ĝuu belecon de la ĝardeno.

L.: Mi deziras vidi ankaŭ la zoologian ĝardenon.

I.: Ni estas vizitontaj ankaŭ ĝin. Pro tio ni iros al la haltejo de la tramvojo.

L.: Ĉiuj bestoj interesas min, sed la simioj plej multe, ĉar ili estas komikaj.

I.: Ne haltu tiel longe antaŭ ĉiu kaĝo, ĉar ni perdos la tutan posttagmezon kaj ne revenos ĝustatempe en la urbon por vidi aliajn vidindaĵojn.

L.: Mi obeos vin, sinjoro instruisto, kaj mi iros pli rapide de unu kaĝo al alia malgraŭ mia varma deziro pli detale observi la bestojn.

I.: Reveninte en la centron de la urbo ni trarigardos la montrajn fenestrojn de la magazenoj.

L.: Mi eĉ ne pensis, ke la fenestroj povas esti tiel grandaj, kiel ĉi tiuj fenestregoj.

I.: Sed rigardu, kio estas en ili elmetita, rimarku, kiel bele estas la objektoj aranĝitaj.

L.: Irante de unu elmetejo al alia ni vidos ĉion, kion la homoj inventis.

I.: Tio estas vera ekspozicio. Ĉi tie, sur malgranda spaco, ni havas ĉiujn eblajn vendejojn kaj laborejojn.

Nun ni staras antaŭ librovendejo, kiun ni vizitos ĉar mi deziras aĉeti kelkajn novajn librojn. Ĝia mastro estas tre klera li-

brovendisto kaj fervora esperantisto. Mi preparolos kun li la plej novajn literaturajn aperaĵojn.

L.: Ĉu vi permesos al mi aŭskulti vian interparoladon ?

I.: Certe, mi prezentos vin al li.

L.: Mi tre ĝojas.

\*

I.: La interparolado daŭris iomete tro longe, sed ĝi estis eksterordinare interesa kaj instrua.

L.: Jes, nun mi vidas kiom malmulte mi scias, kaj kiom mi devas ankoraŭ lerni. Aŭskultante vian interparoladon mi decidis tre diligente kaj persiste studi.

I.: Nun ni vizitos faman grandkomerciston, kiu estas malnova esperantisto. Li lernis ĉe doktoro Edmond Privat en Svislando. Lia magazeno estas la plej granda en ĉi tiu urbo. Tie mi aĉetos kelkajn malgrandaĵojn por mia edzino kaj infanoj.

L.: Ĉu vi interparolos esperante ?

I.: Jes, ni ĉiam parolas nur esperante. Mi ĝojas aŭskultante lian modelan elparoladon. Li estas ankaŭ lingva komitatano.

L.: Mi estas feliĉa, ke mi havos la okazon kontroli mian esperantan scion. Li certe ankaŭ montros al ni sian magazinon.

I.: Mi petos lin, ke li tion faru, por ke vi vidu, kion oni povas bezoni, ĉar ĉe li, oni povas aĉeti ĉion de la kudrilo ĝis la plej perfektaj radioaparatoj.

\*

L.: Mi estas ravita pri ĉio, kion mi vidis kaj aŭdis.

I.: Ĉu vi komprenis, kion ni parolis?

L.: Ĉion! Mi lernis ankaŭ multajn novajn vortojn, la nomojn de la komercaĵoj.

I.: Sed nun ni rapidu vespermanĝi, ĉar je la oka horo ni vizitos teatron.

L.: Ho, kiel bela konstruaĵo!

I.: La enirejo estas grandioza.

L.: Mi estas kontenta, ke mi povos sidi, ĉar la piedoj doloras min.

I.: Antaŭ la komenco de la prezentado trarigardu la rigardejon. Ni sidas en pargeto. Ĉi tiu teatro havas tri rangojn da loĝioj. Nun la kurteno leviĝas, ni vidas la scenejon kaj sur ĝi aktorojn kaj aktorinojn.

L.: Bonege ili ludas !

I.: La kurteno falas, la publiko aplaŭdas, la prezentado finis, kaj kun ĝi ankaŭ nia vizito al la urbo. Nun ni veturos al la stacidomo, ĉar nia vagonaro baldaŭ forveturos.

L.: Dum la vojaĝo mi en mia kapo ordigos la multegajn hodiaŭajn impresojn.

\*

I.: Ni jam estas hejme. Ne forgesu ion en la kupeo!

L.: Sinjoro instruisto, mi elkore dankas vin pro la belega ekskurso.

I.: Ne dankinde, per via diligenteco vi meritis tiun plezuron. Adiaŭ, bonan nokton!

L.: Bonan nokton, sinjoro instruisto!

---

## Dudek tria leciono.

### *Komparacio.*

Instruisto: Kio estas adjektivo?

Lernanto: Adjektivo estas vorto montranta kvaliton de substantivo.

I.: Ne ĉiu substantivo posedas la saman kvanton da iu kvalito.

L.: Jes, mi scias: iu studento estas diligenta, alia estas **pli diligenta**, sed iu en la klaso estas **la plej diligenta**.

I.: Ni havas tri gradojn de komparo: pozitivo, komparativo kaj superlativo.

L.: En la vortaro la adjektivoj estas notataj en pozitivo, tio estas en la unua grado de la komparacio. La komparativon ni ricevas per la vortoj **pli** aŭ **malpli**: bona, pli bona, malpli bona; alta, pli alta, malpli alta; dolĉa, pli dolĉa, malpli dolĉa.

I.: La dua *termino*, t. e. la vorto de komparo, estas ligita per konjunkcio **ol**: Johano estas pli riĉa ol Paŭlo. La lernejo estas malpli alta ol la turo de la preĝejo.

L.: La superlativon ni formas per la vorto **plej**, kaj la duan *terminon* ni ligas per la konjunkcio **el**: Jozefo estas la plej brava el la studentoj. Preĝeja turo estas la plej alta el ĉiuj konstruaĵoj en vilaĝo.

I.: Oni povas kompari ankaŭ adverbojn: Mi tion scias pli bone. Horloĝisto laboras pli precize ol seruristo. Vi decidu plej libere! La ondoj de la lumo disvastiĝas plej rapide el ĉiuj ondoj.

L.: Oni povas ellasi la adverbbon. Tiam ŝajnas, ke ni komparas verbojn:

Mi amas mian fraton pli (multe) ol mia fratino (lin amas). Mi amas mian fraton pli ol (mi amas) mian fratino.

I.: Sur la sama grado oni kunligas la komparatajn vortojn per konjunkcioj *tiel... kiel, tia.... kia, sama.... kia, same.... kiel:*

Mi tion scias tiel bone kiel vi. La homo ne estas tia, kia li naskiĝis, sed tia, kian lin faris la edukado. Kia la patro, tia la filo. Li estas la sama, kia li estis antaŭ dek jaroj: ĉiam juna, gaja kaj afabla. La afero okazis same, kiel li antaŭdiris.

Aliaj konjunkcioj de komparo estas: *ju pli... des pli, ju malpli... des pli, ju malpli.... des malpli.* Ju pli ni lernas, des pli ni scias. Ju malpli da ŝipanoj estas sur la ŝipo, des pli longe ili uzos la enŝipitan provizon de la vivrimedoj. Ju malpli ni ŝparas, des malpli ni havos.

L.: El la jam lernita mi supozas, ke ankaŭ per sufiksoj ni povas esprimi gradon: granda, grandeta, negranda, malgranda, grandega; riĉa, riĉeta, neriĉa, malriĉa, riĉega; ami, ameti, neami, malami, amegi.

I.: La vorteto „ne” simple neas tion, kion esprimas la radikiko; „mal” donas al la vorto kontraŭan signifon de tio, kion esprimas la radikiko. Homo neriĉa estas nek malriĉa nek riĉa.

### *De kaj da.*

Lernanto: La vortetoj de kaj da ofte ripetiĝas. Mi ne scias, kiam mi devas uzi unu kaj kiam la alian. Bonvolu klarigi al mi la korektan uzadon de ili.

Instruisto: „*Da*” post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro:

Sur la bordo de la maro staris *amaso da homoj*. Mi havas *centon da pomoj*. La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris *kelke da perloj* kaj *kelke da diamantoj*, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas.

1. „De” povas esti tradukata per simpla genitivo. Tranĉilo de librobindisto (apartenanta al librobindisto). Rostro de elefanto (apartenanta al elefanto).

L.: En tiu signifo ni povas „de” anstataŭi per adjektivo: Librobindista tranĉilo. Elefanta rostro.

I.: 2. „De” montras fizikan aŭ lokan deiron aŭ devenon: De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis plumon. Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo.

3. Ĝi montras deiron aŭ devenon moralan: Mi de teruro ne sciis kion fari. Li paliĝis de timo kaj poste li ruĝiĝis de honto.

4. „De” montras devenon aŭ deiron tempan: De hodiaŭ li estas mia ĉefo. Ŝi loĝas en Parizo jam de tri jaroj.

La diferencon inter „da” kaj „de” montras la sekvantaj ekzemploj: Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino. Alportu al mi metron da nigra drapo. (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo).

L.: Mi dankas vin, sinjoro instruisto, pro la klarigoj. El miaj grupoj mi ne povis diveni tiujn regulojn.

### *Predikata uzado de adjektivoj.*

Instruisto: Ĉu vi deziras ankoraŭ ion demandi?

Lernanto: En la sepa leciono ni havis la regulon, ke adjektivo akordiĝas kun substantivo nombre kaj kaze. Mi rimarkis, ke tio ne okazas ĉiam.

I.: Vi estas prava, ĝi ne okazas kelkfoje, kiam la adjektivo estas uzata *predikate*. Ĉu vi scias kio estas predikato?

L.: *Predikato estas tio, kion ni asertas pri la subjekto.*

I.: **Atributo** precizigas la substantivon responde al demando „kia?”

L.: Kia homo? Bona homo. Homo bona. Kia rozo? Blanka rozo. Rozo blanka.

I.: Tio estas *atributa* uzado de adjektivo.

L.: Kaj la predikata?

I.: *Predikate la adjektivo esprimas kvaliton de la substantivo responde al demando „kia estas.... ?”*

L.: Homo estas bona. Rozo estas blanka.

I.: Ankaŭ en tiu okazo adjektivo obeas la diritan regulon. Diferenco aperas, kiam la substantivo estas en akuzativo. Ekzemploj montros ĝin al vi plej klare.

Atribute: Mi nomis la homon malhonestan = Mi diris la nomon de tiu malhonesto homo.

Predikate: Mi nomis la homon malhonestan      Mi diris, ke tiu homo estas malhonesto.

Atribute: Li konstruis la domon pli altan      Li konstruis la domon, kiu estas pli alta.



Predikate: Li konstruis la domon pli alta = Li konstruis la domon tiel, ke ĝi fariĝis pli alta.

L.: Nun mi jam scias: *Adjektivo atribute uzata ĉiam akordiĝas kun substantivo kaze kaj nombre; predikate uzata ĝi ĉiam restas en nominativo, ankaŭ tiam, kiam la substantivo estas en akuzativo.*

I.: *Sed tiam ĝi akordiĝas nombre.* Se la substantivo staras en pluralo, la adjektivo devas same havi la pluralan formon: Ili trovis la manĝaĵojn bonaj = Ili trovis, ke la manĝaĵoj estas bonaj.

---

## Dudek kvara leciono.

### *Interparolado pri riĉeco de Esperanto.*

Studento: Sinjoro instruisto, mi estas tute ravita. Mi eĉ ne sonĝis, ke mia kunmetado de vortoj en grupojn alportos al mi tiel riĉan rikolton.

Nun multoblighis mia scio de esperantaj vortoj, ĉar per uzo de afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj) mi povas derivi multajn novajn vortojn.

Mi tion provis kaj atingis mirindajn rezultojn:

Mi povas min nun esprimi pri multaj aferoj, pri kiuj mi antaŭe ne povis.

Instruisto: Doktoro Zamenhof ĉe la fino de sia Ekzercaro donas ekzemplon, kiamaniere oni povas formi el simpla radikoj amason da novaj vortoj.

S.: Ĉu vi volas ĝin montri al mi, sinjoro instruisto?

I.: Tre volonte! Ĉi tie estas la libro, legu mem!

S. legas: Sano, sana, sane, sani, sanu, saniga, saneco, sanilo, sanigi, saniĝi, sanejo, sanisto, sanulo, malsano, malsana, malsane, malsani, malsanulo, malsaniga, malsaniĝi, malsaneta, malsanema, malsanulejo, malsanulisto, malsanero, malsanararo, sanigebla, sanigisto, sanigilo, resaniĝi, resaniĝanto, sanigilejo, sanigejo, malsanemulo, sanilaro, malsanaro, malsanulido, nesana, malsanado, sanulaĵo, malsaneco, malsanemeco, saniĝinda, sanilujo, sanigilujo, remalsano, remalsaniĝo, malsanulino, sanigista, sanigilista, sanilista, malsanulista, kpt.

I.: Do, tio estas pruvo, ke vi estas prava.

S.: Sinjoro instruisto, permesu al mi nombri tiujn vortojn.

I.: Volonte mi tion permesas.

S.: Entute estas kvindek tri vortoj el unu radiko.

I.: Sed la Majstro finigas tiun vicon da vortoj per ktp. Tio signifas, ke li povus fari ankoraŭ pluajn vortojn el tiu sama radiko.

S.: Mi vidas, ke ĉi tie estas uzataj kelkaj afiksoj, kiujn ni ankoraŭ ne pritraktis. — Kelkajn el ili mi jam havas inter miaj grupoj de vortoj.

I.: Nun ni povas rapide ilin trastudi. Legu viajn grupojn!

### *Pluaj sufiksoj.*

Instruisto: Per sufikso *-ar-* ni formas vorton, kiu signifas kolekton de objektoj, *formantaj* unu tuton:

Vorto, *vortaro*; vagono, *vagonaro*; homo, *homaro*; arbo, *arbaro*; monto, *montaro*; bruto, *brutaro*; ŝafo, *ŝafaro*; militisto, *militistaro*.

Sufikso *-er-* havas signifon tute kontraŭan al la sufikso *-ar-*, ĉar ĝi signifas malgrandan parton de objekto, kiun esprimas la radiko:

Neĝo, *neĝero*; pulvo, *pulvero*; pano, *panero*; fajro, *fajrero*; mono, *monero*; sablo, *sablero*; ĉeno, *ĉenero*; pluvo, *pluvero*.

Sufikso *-ind-* signifas iun, kiu meritas ion:

Miri, *mirinda*; ami, *aminda*; laŭdi, *laŭdinda*; vidi, *vidinda*; estimi, *estiminda*.

Sufikso *-ebl-* esprimas, ke io povas esti farata:

Vidi, *videbla*; trinki, *trinkebla*; manĝi, *manĝebla*; ŝanĝi, *ŝanĝebla*; aĉeti, *aĉetebla*.

Sufikso *-ing-* signifas objekton en kiun oni povas parte enŝovi objekton, kiun esprimas la radiko:

Fingro, *fingringo*; kandelo, *kandelingo*; plumo, *plumingo*.

Sufikso *-ĉj-* servas por formi virajn **karesajn** nomojn:

Patro, *paĉjo*; frato, *fraĉjo*; onklo, *onĉjo*; Petro, *Peĉjo*; Jozefo, *Joĉjo*; Johano, *Johanĉjo*.

Sufikso *-nj-* servas por derivi virinajn karesajn nomojn:

Patrino, *panjo*; Mario, *Manjo* aŭ *Marinjo*; fratino, *franjo*; onklino, *onnjo*.

Sufikso *-um-* estas neŭtrala:

Bruli, *brulumo*; butono, *butonumi*; malvarmo, *malvarmumi*; nazo, *nazumo*; kruco, *krucumi*; broso, *brosumi*; krono, *kronumi*.

Tiajn vortojn oni devas lerni kiel radikojn.

Prefikso *fi-* esprimas malaltigon aŭ malplibonigon de tio, kion montras la radikoj. Ekzemple:

Homo, *fi*homo; insekto, *fi*insektaro; knabo, *fi*knabo; domo, *fi*domo; buŝo, *fi*buŝo; hundo, *fi*hundo.

Proksimume la saman signifon havas la sufikso *-aĉ-*. Ekzemple:

Ĉevalo, *ĉevalaĉo*; skribi, *skribaĉi*; paroli, *parolaĉi*; herbo, *herbaĉo*; kanti, *kantaĉi*; morti, *mortaĉi*; krii, *kriaĉi*; hundo, *hundaĉo*; frazo, *frazaĉo*.

Tamen estas malgranda diferenco inter *fi* kaj *aĉ*: *fi* direktas nian atenton al la morala, *aĉ* al la ekstera degradado.

---

## Dudek kvina leciono.

### *Participoj.*

Studento: Ofte ni havis sufiksojn *-anta*, *-inta*, *-onta*.

Instruisto: Ni aldonas ilin al la verbaj radikoj:

*porti*, *portanta*, *portinta*, *portonta*;  
*trinki*, *trinkanta*, *trinkinta*, *trinkonta*;  
*laŭdi*, *laŭdanta*, *laŭdinta*, *laŭdonta*;  
*ami*, *amanta*, *aminta*, *amonta*;  
*akuzi*, *akuzanta*, *akuzinta*, *akuzonta*;  
*dungi*, *dunganta*, *dunginta*, *dungonta*;  
*flegi*, *fleganta*, *fleginta*, *flegonta*;  
*juĝi*, *juĝanta*, *juĝinta*, *juĝonta*.

Studento: Tiaj sufiksoj estas ankaŭ *-ata*, *-ita*, *-ota*.

Instruisto: Ekzemploj estas:

*pagi*, *pagata*, *pagita*, *pagota*;  
*aĉeti*, *aĉetata*, *aĉetita*, *aĉetota*;  
*tordi*, *tordata*, *tordita*, *tordota*;  
*trakti*, *traktata*, *traktita*, *traktota*;  
*trompi*, *trompata*, *trompita*, *trompota*;  
*trudi*, *trudata*, *trudita*, *trudota*;  
*varbi*, *varbata*, *varbita*, *varbota*;  
*vendi*, *vendata*, *vendita*, *vendota*;  
*verŝi*, *verŝata*, *verŝita*, *verŝota*;  
*viŝi*, *viŝata*, *viŝita*, *viŝota*;

*fendi, fendata, fendita, fendota;*

*fosi, fosata, fosita, fosota;*

Studento: Tiuj sufiksoj estas parencaj al verbaj finiĝoj, pri kiuj ni parolis en la dekunua leciono.

Instruisto: Tute ĝusta rimarko. Grupigu ilin!

Studento: *-as, -anta, -ata* esprimas agadon aŭ estadon en estanta tempo:

*Froti*, mi frotas, mi estas *frotanta*, mi estas *frotata*;

*grati*, mi gratas, mi estas *gratanta*, mi estas *gratata*.

*-is, -inta, ita* eldiras, ke la agado aŭ estado estis jam en estinta tempo, ke ĝi jam estas finita, kiam ni parolas pri ĝi:

*Halti*, mi haltis, mi estas *haltinta*, mi estas *haltita*;

*insulti*, mi insultis, mi estas *insultinta*, mi estas *insultita*.

*-os, -onta, -ota* esprimas, ke la agado aŭ estado estos en estonta tempo, ke ĝi ankoraŭ ne komencis, kiam ni parolas pri ĝi:

*Kribri*, mi kribros, mi estas *kribronta*, mi estas *kribrota*;

*kritiki*, mi kritikos, mi estas *kritikonta*, mi estas *kritikota*.

Instruisto: La sufiksoj *-anta, -inta, -onta* estas **aktivaj**, ili montras, ke la **subjekto** ion agas.

La sufiksoj *-ata, -ita, -ota* estas **pasivaj**, ili montras, ke la ago estas farata sur subjekto, ke li ion suferas aŭ toleras.

Studento: Verbaj formoj faritaj per tiuj sufiksoj certe havas apartan gramatikan nomon!

Instruisto: Ili estas nomataj **participoj**.

Studento: En kroata lingvo ni ne havas ses participojn. Tial ni ne povas ĉiujn traduki.

Instruisto: Se ne estas eble iun particon traduki per unu vorto, oni ĝin tradukas per **priskribanta** frazo.

Studento: Mi rimarkis, ke la sufiksoj finiĝas per *-i, -o* kaj *-a*, kiujn ni en sepa leciono nomis **finiĝoj**. Nun mi ne scias, ĉu ili estas tio ankaŭ ĉi tie.

Instruisto: Certe! Sufiksoj estas nur: *-ad-, -aj-, -an-, -ar-, -ej-, -ebl-, -ec-, -eg-, -ej-, -em-, -er-, -estr-, -et-, -id-, -ig-, -iĝ-, -il-, -in-, -ind-, -ing-, -ist-, -nj-, -uj-, -ul-, -um-, -aĉ-*, al kiuj oni aldonas la finiĝon *i* de verboj, *o* de substantivoj *a* de adjektivoj, *e* de adverboj.

Studento: Esperanta vortfarado estas al mi nun tute klara:

La radiko esprimas **ideon**. Kunmetante prefikson aŭ sufikson kun radiko ni esprimas **alian percepton**. Finiĝo **precizigas** la vorton. Ni povas ankaŭ kelkajn radikojn kunmeti por esprimi ideon.

E1 konataj radikoj ni povas krei multajn novajn vortojn.

La afiksoj povas servi kiel radikoj: *ano, aro, ero, ejo, estro ilo, inda* k. t. p.

---

## Dudek sesa leciono.

### Sistemo de korelativaj vortoj.

Instruisto: Ĉu vi konas la vortojn: **ia, ial, iam, ie iel, ies, io, iom, iu.**

Studento: Jes, ĉar ni havis ilin en niaj lecionoj jam ofte.

I.: Nun ni ripetos ilin kune, ĉar Zamenhof konsilas la montritajn naŭ vortojn bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj.

S.: Tion mi jam divenis!

Se ni antaŭmetas antaŭ ili la literon „**k**”, ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: **kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu.**

I.: Se ni antaŭmetas la literon „**t**”, ni ricevas vortojn montrajn: **tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu.**

Antaŭmetante la literon „**ĉ**”, ni ricevas vortojn komunajn: **ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu.**

Aldonante la prefikson „**nen**”, ni ricevas vortojn neajn: **nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniŭ.**

Aldonante al la vortoj montraj la vorton „**ĉi**”, ni ricevas montron **pli proksiman**; ekzemple: **tiu** (pli malproksima), **tiu ĉi** (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); **tie** (malproksime), **tie ĉi** (aŭ ĉi tie) (proksime).

Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „**ajn**”, ni ricevas vortojn sendiferencajn: **kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn.**

Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: **tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi tiea, tieulo, tiamulo, neniulo**, k. t. p.

## Modelo de demandoj kaj respondoj.

*Kiu estas via instruisto ?*

Nia instruisto estas sinjoro Johano Filipović

*Kia li estas ?*

Li estas tre diligenta kaj saĝa persono.

*Kie li loĝas?*

Li loĝas en la lernejo.

*Kio estas lia profesio ?*

Lia profesio estas instrui la infanojn.

*Kiam li venis en vian vilaĝon ?*

Li venis antaŭ kvin jaroj.

*De kie li venis?*

Li venis el Putinci en Slavonio.

*Ĉu la lernantoj lin amas ?*

Jes, ili adoras lin.

*Kial ili ŝatas lin ?*

Tial, ĉar li konas la infanan animon kaj laŭ tio agas.

*Kiel li instruas?*

La infanoj estas ravitaj pri lia instrumaniero.

*Kiom da lernantoj li havas ?*

Li havas kvardek sep lernantojn en sia klaso.

*Kies filoj ili estas?*

Ili ĉiuj estas filoj de la lokaj kamparanoj.

*Kien la instruisto vojaĝas dum la libertempoj?*

Dum la someraj libertempoj li ĉiujare vojaĝas al la marbordo kune kun sia familio.

*Kion ili tie faras ?*

Ili sin banas, ili remas, velŝipas, boatveturas kaj fiŝkaptas.

*Kial ili tion faras?*

Por ripozi post fervora pasinta kaj por ĉerpi novajn fortojn por la venonta spirita laboro; ĉar, kiu laboras, devas ankaŭ ripozi. Tion postulas la homa naturo.

## Dudek sepa leciono.

### *Vetero.*

Instruisto: La vetero ludas gravan rolon en komuna konversacio. Ĝis nun ni ne havis la okazon paroli pri ĝi.

Lernanto: Sed en la dektria leciono ni parolis pri la *tempo*.

I.: Estas ja granda diferenco inter tempo kaj vetero.

L.: Jes, mi scias, la klarigon mi trovis en la tria parto de ĉi tiu libro: tempo estas forfluganta io, kion ni mezuras per horloĝo; vetero estas meteorologia aperaĵo.

I.: Tre bone! — Kia vetero estas hodiaŭ ?

L.: Hodiaŭ estas bela vetero.

I.: Jes, ĉar la ĉielo estas serena kaj la suno brilas.

L.: Sed hieraŭ estis malbela vetero.

I.: Jes, ĉar hieraŭ la ĉielo estis kovrita per nuboj kaj pluis. Dum la nokto fulmis kaj tonbris.

L.: Kia vetero estos morgaŭ ?

I.: Tion mi ne scias. Meteorologoj antaŭdiras la veteron por la venontaj du tagoj. Ili observas la temperaturon, barometran premon, malsekecon kaj movon de la aero. El observoj faritaj en multaj lokoj sur la tuta terglobo ili kunmetas la antaŭdirojn. Iliajn profetaĵojn oni dissendas ĉiutage per radio, sed tio ne estas fidinda, ĉar ankoraŭ ne estas konataj ĉiuj elementoj, kiuj influas la veteron.

L.: Somere ni havas belan veteron pli ofte ol vintre.

I.: Ne ĉiam kaj ĉie. Tio dependas de la regiono kaj de aliaj cirkonstancoj. Vintre frostas kaj neĝas, la akvo glaciigas. Matene en somero, kiam estas klare, ni havas roson; vintre ĝi fariĝas prujno.

L.: Printempe la vetero estas nekonstanta: ofte ĝi ŝanĝiĝas, jen pluas, jen la suno brilas, kaj ofte vento blovas. Marta aŭ aprila vetero estas konata. La aŭtunoj ĉe ni plej parte estas belaj.

I.: Ĉu la noktoj estas tute malhelaj ?

L.: Ne, ĉar dumnokte la luno kaj la steloj heligas la teron.

I.: Ĉu la luno estas ĉiam egala ?

L.: Ne, ĝi ŝanĝiĝas, ni konas: novan lunon, la unuan kvaronon, plenlunon kaj la lastan kvaronon.

I.: La luno estas mensogema: kiam ĝi kreskas, ĝi havas la formon de la litero D, kaj kiam ĝi dekreskas, ĝi havas la formon de la litero C, diras latina proverbo.

L.: Sed la poetoj ĝin tre ŝatas. Ili diras, ke ĝi estas protektanto de la amantoj.

L: Certe ĝi havas influon sur nian teron: ĝi kaŭzas la tajdon de la maro.

L.: Kio estas tio ?

L: La maro ses horojn alfluas kaj ses horojn defluas. La diferenco inter la plej alta kaj la plej malalta nivelo de maro ĉe tajdo en Adriatika maro ordinare ne estas granda, proksimume duonan metron; sed ĉe la bordo de l' oceano ĝi atingas kelkajn metrojn.

L.: La maro havas ankaŭ fluojn.

L: Jes, kelkaj el ili estas tre gravaj. Ekzemple la varma Gofa fluo, kiu venas el Meksika golfo, varmigas Eŭropon. Ĝi estas kvazaŭ centrala hejtado de nia kontinento.

L.: Ĉu la suno ankaŭ influas nian teron.

L: Certe, ĝi donas al ni la lumon kaj la varmon, ĝi estas la fonto de la tuta energio sur nia tero, sen ĝi nenio povus vivi.

L.: Kaj kio estas la steloj?

L: Ili estas sunoj, sed tre malproksimaj.

L.: Ne ĉiuj steloj estas egalaj. Ekzemple la matena stelo ŝanĝiĝas, kelkfoje ĝi aperas kiel vespera stelo.

L: Ĝi estas planedo nomata Venuso.

L.: Ĉu ekzistas ankoraŭ aliaj ĉielaj korpoj ?

L: Jes, kometoj, ĉielaj nebuletoj, meteoroj kaj lampiroj.

L.: Astronomio estas belega scienco.

L: Oni nomas ĝin reĝino de la sciencoj.

L.: Ĉi tiu nia interparolado estas tre interesa kaj instrua, sed pardonu al mi, ke mi ĝin interrompas, ĉar min interesas unu gramatika demando.

L: Nu, kio?

L: En la deknua leciono ni vidis, ke en Esperanto oni konjugacias aldonante personan pronomon al la verbo. En ĉi tiu leciono vi diris kelkajn verbajn formojn sen pronomo kaj sen subjekto: pluvas, neĝas, hajlas k. t. p.

L: Tio estas senpersonaj propozicioj faritaj per verboj montrantaj veteron. En tiu maniero oni uzas ankaŭ diversajn aliajn verbojn, kiujn oni ordinare uzas kun esprimita subjekto. Ekzemple: okazas, aperas, ŝajnas; necese estas labori, honte estas perfidi; se plaĉas al vi . . .

L.: Ho jes! Mi rememoras, ke ni havis similajn ekzemplojn.



## Dudek oka leciono.

Lernato: Mi rimarkis, sinjoro instruisto, ke vi la nomojn de la monatoj en Esperanto skribas per grandaj komencaj literoj kaj la nomojn de la nacioj per malgrandaj.

Instruisto: Jes, ĉar en tiu maniero skribis doktoro Zamenhof, kreinto de internacia lingvo. En leteroj ni kutime la pronomon „Vi" aŭ „Ci" skribas per grandaj komencaj literoj por honori la adresaton. La angloj skribas la pronomon „Mi" per granda komenca litero. Tio ne estas necesa. Tial en esperanta lingvo oni kutime skribas „vi" per malgranda komenca litero.

L.: Kiel oni skribas la interpunkciojn?

I.: En Esperanto la verkistoj plejparte interpunkcias laŭ la kutimo en sia nacia lingvo. Tial en esperanta lingvo ni ankoraŭ ne havas unuecon de interpunkciado.

L.: Kaj la stilo?

I.: La ĉefa regulo por esperanta stilo estas: *Skribu simple, logike kaj klare.*

Dank' al akuzativo la ordigo de la vortoj en Esperanto estas libera, kiel en nia nacia lingvo. Oni aranĝas propoziciojn kaj vortojn tiamaniere, ke ideo estu plej klare esprimita. Granda libereco regas sub tiu kondiĉo. Oni povas diri:

Morgaŭ mi donos ĉapelon al mia frato.

Mi donos ĉapelon al mia frato morgaŭ.

Ĉapelon mi donos al mia frato morgaŭ.

Ĉapelon mi morgaŭ donos al mia frato.

Al mia frato mi donos ĉapelon morgaŭ.

Al mia frato mi morgaŭ donos ĉapelon.

Morgaŭ al mia frato mi donos ĉapelon.

Morgaŭ ĉapelon mi donos al mia frato.

Morgaŭ al mia frato ĉapelon mi donos.

Mi donos morgaŭ ĉapelon al mia frato.

Mi ĉapelon donos morgaŭ al mia frato.

Mi al mia frato donos morgaŭ ĉapelon.

Mi al mia frato ĉapelon donos morgaŭ.

Mi al mia frato morgaŭ ĉapelon donos.

Mi ĉapelon morgaŭ donos al mia frato.

K. t. p.

L.: Tio estas admirinda libereco, sed la sento diras al mi, ke tamen estas eta diferenco inter la supraj prepozicioj. Se mi diras: „Morgaŭ mi donos...", signifas, ke *morgaŭ* sed ne *hodiaŭ*

mi donos. Se mi diras: „Mi donos...“, signifas ke ĝuste **mi** sed ne eble *mia fratino* aŭ iu alia donos.

I.: Vi estas prava. La vorto en la komenco de la propozicio estas akcentita. Do, sur la unuan lokon oni metas plej gravan vorton. Iafoje la atento estas pli facile altirebla sur iun vorton, se oni metas ĝin sur la lastan lokon.

L.: El tio mi konkludas, ke oni ne ordigas la vortojn nur laŭ la senco, sed ankaŭ laŭ la interna sento.

I.: Tio estas ĝusta rimarko. La francoj diras: „La stilo, tio estas la homo“.

L.: Do, en Esperanto ni povas esprimi ankaŭ niajn personajn sentojn.

I.: Certe, eĉ nuancojn de individuaj sentoj.

L.: Esperanto estas vere admirinda kreaĵo, genia elpensajo.

I.: Pri la grupigo de la propozicioj en kunmetita propozicio ni povas diri la samon, kion ni diris pri la ordigo de la vortoj. Legu ĉi tiun kunmetitan propoziciegon aŭ periodon:

L.: (legas el gazeto „Heroldo de Esperanto“):

„Alfluegu, popolaroj!“ Popolaroj de l' tuta terglobo alfluegu por vidi kaj admiri, kion naturo kaj homo ĉi tie kreis, estigante regionon, kiu estas unu el la plej ĉarmaj kaj plej belaj en la tuta mondo: alfluegu kaj admiru la romantikan, per multaj fabeloj kaj legendoj sorĉumitan Valon de l' riverego Rejno, kun siaj urboj kaj vilaĝoj, siaj katedraloj kaj palacoj, siaj kasteloj kaj ruinoj, siaj arbaroj kaj vinterasoj, kun sia pramalnova kaj ĉiam nova ĉarmo, kun siaj belulinoj kaj siaj kantoj, – alfluegu por vidi kaj admiri ĝin kaj ĝian kronon: la dumiljaran urbon Kolonjo, kun sia katedralo – miraklaĵo de l' gotiko, siaj riĉaj trezoroj el antikva kaj nova tempo, sia arta kaj scienca vivo, sia komerco, industrio, „Kolonja Akvo“, sia trafiko, la bonhumoro de siaj loĝantoj en tempoj bonaj kaj malbonaj . . .

I.: Tielan kunmetitan propozicion oni nomas periodo. La verkinto povus alimaniere konstrui ĝin, sed li volis esprimi sian senton kaj atingi specialan efekton tial li konstruis ĝin ĝuste tiel.

L.: En deknua leciono, sinjoro instruisto, vi klarigis al mi la uzadon de refleksiva pronomo **si**. Kiel ni vidis en la dekdua leciono, la sama regulo validas ankaŭ por la posesiva pronomo **sia**. Oni ĝin uzas, kiam ĝi rilatas la *subjekton* en *tria persono* de la propozicio. La skribinto de la supra periodo evidente eraris: en la propozicio post la du punktoj subjekto **vi** (popolaroj) estas

kaŝita, la poste starantaj posesivoj **siaj** kaj **sia** ne rilatas al ĝi sed al la objekto **Valon**, do la ĝustaj posesivoj estas **ĝiaj** kaj **ĝia**.

L: Mi gratulas vin! Per tiu rimarko vi montris profundan scion de Esperanto, kaj vi pruvis, ke vi kapablas memstare juĝi. La verkinto estas germano, kaj en sia entuziasmo li lasis sin fortreni de sia gepatra lingvo. Cetere li la periodon bonege konstruis, sed mi ne konsilas imiti lin, ĉar por Esperanto pli taŭgas simplaj propozicioj.

L.: Por nia nacia ankaŭ, sed bonaj stilistoj ĉe ni de tempo al tempo grandiozajn pensojn esprimas per longaj grandiozaj periodoj. Tial mi opinias ke tamen ankaŭ en esperanta lingvo tiaj periodoj estas permesataj.

I: Jes, sed nur al bonegaj sciintoj de la lingvo.

L.: Mi havas ideon, sinjoro instruisto.

I: Nu, diru ĝin.

L.: Se la ĉefa esperanta regulo estas simpleco kaj klareco, ĝi certe validas ankaŭ por vortfarado.

I. Jes, sed se ni troigas la simplecon, ni eble perdos la klarecon, kontraŭe, se ni troigas la klarecon, ni eble perdos la simplecon.

L.: Tial ni devas harmoniigi la du postulojn.

I: Tion faras la **principo de sufiĉo kaj neceso**. Vi tute bone komprenis, kiam mi diris „ni troigas“, ke tio signifas „ni trograndigas“. Do *sufiĉas* la vorto sen radiko „*grand*“ vi estus dirinta „*harmonii* la postulojn“, mi estus kompreninta el kunteksto, ke vi opinias *harmonii*gi. Do ankaŭ ĉi tie *sufiĉus* la vorto sen sufikso *-ig-*. „*Doloro* pro la mondo“ estas plifoja sento, sekve: *dolorado*, sed *sufiĉas* la vorto sen sufikso *-ad-*, ĉar ĉiu ĝin komprenas.

L.: Laŭ **tiu principo de sufiĉo** ni povas uzi vortojn pli mallongajn.

I: Sed ni devas diri: Mi aĉetis *memoraĵon* por mia fianĉino. Se ni dirus „Mi aĉetis *memoron* . . . “ ni pensigus, ke mi aĉetis la *memorkapablon* de mia fianĉino. Do estas *necese* aldoni la sufikson *-aĵ-*. Oni diras: neelĉerpebla estas la *boneco* de Dio, sed: patrioto celas la *bonon* de sia lando.

L.: La **principo de neceso** bridas nin, ke ni ne tromallongigu la vortojn.

I: Devas esti modereco en ĉio.

L.: Mi opinias, ke ankaŭ la skribadon de esperantaj leteroj regas la regulo de simpleco kaj klareco.

L: Jes, la leterojn oni komencas per: *Estimata sinjoro. Estimata fraŭlino. Estimata sinjorino.* La komenco „*Kara sinjoro*” montras amikecon. *Estimata samideano* estas de esperantistoj ofte uzata, sed oni ne devas troigi en tio.

La leteron oni finas per: *Respekte via, kun granda estimio, sincere via, kun kora saluto, tre kore via* (al konatoj).

Instruisto: Ĉio havas sian finon. La birdoj instruas siajn idojn flugi, kaj gvidas ilin tiel longe, ĝis ili kapablas memstare flugi; tiam la gepatroj forlasas siajn idojn. Tiel ankaŭ mi gvidis vin. Nun mi povas forlasi vin, ĉar vi jam kapablas en esperanta lingvo tute memstare labori. Tio estas la lasta leciono de nia esperanta kurso.

Lernanto: Mi elkore dankas vin, sinjoro instruisto, pro via afableco kaj pro ĉio, kion vi donis al mia spirito. Mian komplimenton!

1: Adiaŭ, kara lernanto, fartu bone!



## LEGAĴOJ

### 1. La sonĝo.

- Terure, kion mi sonĝis lastnokte.
- Kion?
- Ke mi estas norvego.
- Kaj tio estas terura ?
- Jes, mi ja ne scias norvege!

### 2. Li konas sin.

„Se subite vi trovus cent ŝilingojn en via veŝto, kion vi pensus unue?"

„Ke mi surmetis fremdan veŝton".

### 3. En policejo.

„Sinjoro ! en via pasporto estas skribite, ke vi estas senhara, sed mi vidas harojn sur via kapo. Kio el tio estas falsa ?"

„La haroj, sinjoro komisaro", respondas la demandito.

### 4. La konkurĉevalo.

„Mi havis grandan malfeliĉon ĉe la lasta ĉevalkonkuro. Mi vetis je la plej bona ĉevalo kaj tamen perdis ĉion."

„Nu, certe ĝi ne estis la plej bona ĉevalo".

„Sed jes, se vi nur estus vidinta, kiel ĝi pelis antaŭ si ĉiujn aliajn ĉevalojn!"

### 5. La fakulo.

„Kiel vi sukcesis", demandas la juĝisto, „forŝteli la horloĝon el la veŝta poŝo de l' akuzanto, kvankam ĝi estis firmligita per patentita sekurĉeno?"

Memfide ekstaras la akuzito, respondante kun digneco:  
„Sinjoro juĝisto, mia honorario por la plena kurso estas 30 ŝilingoj.”

## 6. Skotoj.

Du skotoj iris kune bani. Ili vetis unu pencon, kiu povos pli multe da tempo resti subakve. La vetkondiĉoj estis skribe fiksataj kaj deponataj ĉe la banservisto. Kaj tio estis bona. Alie oni neniam estus sciinta ion pri ĉi tiu afero. Ĉar ambaŭ dronis.

\*

Malsat-artistino venis dum sia vojaĝo ankaŭ en skotan urbeton. La enspezoj estis tre malgrandaj. Sed kompanse ŝi ricevis pli ol 100 edzinig-proponojn de tieaj fraŭloj.

## 7. Post la amputo.

Edzino venas al la lito, kie kuŝas ŝia edzo post la operacio, montras al li la amputitan kruron kaj demandas lin:

„Kion mi faru kun la kruro?”

„Donacu ĝin al malriĉulo!” li respondas.

## 8. Strange.

„Je kio, mi demandas, mortis la maljuna Maj?”

„Tion neniu povas diri.”

„Strange estas pri tiu Maj. Antaŭe neniu sciis per kio li vivis, kaj nun neniu scias, je kio li mortis.”

## 9. Arlekejo.

La arlekeno de la franca reĝo Francisko I-a ĉiam donis konsilojn al la reĝo ĉe gravaj ŝtataj aferoj. Fine la reĝo diris al li: „Ĉu vi ne volus ŝanĝi kun mi la oficon?”

„Tute ne!” protestis energie la arlekeno.

„Kial ne?” demandis la reĝo. „Ĉu eble vi hontus esti la reĝo?”

„Mi ne hontus esti reĝo — sed mi hontus havi tian arlekenon, kia vi”, klarigis la saĝulo.

## 10. Kiaj la patroj, tiaj la idoj.

Joĉjo ricevis je festo la unuan pantalonon, kaj fiere prezentas sin antaŭ sia patro. „Knabo, nun vi jam estas vera viro!” ĝojigite ekkrias la patro.

Joĉjo metas la manojn en la pantalonpoŝojn, feliĉe dirante:  
„Jes! jen sen mono, kaj jen sen mono!”

### **11. Duobla sciigo.**

- Hieraŭ mi renkontis vian edzon, sed li ne vidis min.
- Mi scias. Li rakontis tion al mi.

### **12. La rajdemulo.**

Onklo (kiu al malgranda nevo permesas rajdi sur siaj genuoj): Nu, tio certe faras al vi plezuron, ĉu ne?

Nevo: Jes, sed sur vera azeno tio estas tamen pli bela.

Nroj 1–12 el „Heroldo de Esperanto”.

### **13. La tradicio.**

Instruisto: „Tradicio” estas tio, kio iras de patroj al filoj. Nun, Joĉjo, faru unu frazon kun la vorto „tradicio”!

Joĉjo: Hieraŭ mi grimpis sur la ĉerizarbon kaj mi ŝiris mian tradicion.

### **14. Kritiko.**

- Nu, ĉu vi estas kontentaj pri la nova pastro?
- Ni ankoraŭ ne konas lin bone. Dum ses tagoj de la semajno li estas nevidebla, en la sepa tago nekomprenebla.

### **15. Nova modo.**

Sinjorino, ĉu vi ne vendus al mi vian ĉapelon?

- Ĉu via edzino bezonus ĝin?
- Ne sed mi mem, ĉar mi estas arlekeno en cirko.

### **16. Pli altaj studoj.**

Gimnazianino fanfaronis antaŭ sia patro: „Post la fino de la mezlernejo mi studos biologion, psikologion kaj fiziologion”.

La patro respondis al ŝi tute flegme: „Sed estus pli bone, se vi lernus la kuirologion, lavologion kaj kudrologion”.

### **17. Preferas havi amikojn.**

Lordo Palmerston estis ĉefministro de Britujo. En iu tago lia ĉefarbaristo, kiu jam de kvardek jaroj fidele servis lin, diris:

- Via Lorda Moŝto devas fine energie trakti la posedantojn de la najbaraj bienoj.
- Kial? – demandis la lordo.
- Ĉar ili ĉasadadas en viaj arbaroj kaj mortigadas la plej belajn leporojn.
- Kion do mi faru ?
- Bonan proceson kontraŭ ili!
- Kara Martin, – respondis la nobla lordo, – mi preferas havi amikojn ol leporojn.

### **18. Nun li konas lin.**

Fridtjof Nansen, la fama norvega vojaĝisto, dum sia juna aĝo foje sur la strato salutis unu sinjoron opiniante koni lin.

- Ĉu vi konas min? – demandis krude la salutita viro.

Nansen nun pli bone rigardis la viron kaj diris:

- Pardon, sinjoro, sed mi eraris.

– Do kial vi salutas, se vi ne konas min? – respondis malafable la viro.

– Se mi estus sciinta, kia homo vi estas, mi ne estus vin salutinta. Nun mi konas vin kaj plu mi ne salutos vin.

### **19. Ne postulu tro!**

Frederiko la Granda, prusa reĝo, distingis foje unu oficiron per ordeno. La oficiro aperis antaŭ la reĝo kaj hezitis akcepti la ordenon, dirante:

– Reĝa Moŝto, mi povas akcepti ordenon, nur se mi meritas ĝin sur la batal-kampo.

Frederiko kun kolero respondis:

– Ne estu freneza, sed akceptu ĝin, ĉar por vi sola mi ne povas fari militon.

Nroj 13-19 el „La Praktiko“.

### **20. Bedaurinda fakto.**

Juĝisto: Kial vi ne redonis la trovitan monujon ?

Akuzito: Kiam mi trovis la monujon, estis jam malfrua vespero kaj estis neeble por mi, redoni ĝin je la sama tago. La sekvantan tagon la monujo estis malplena.



## 21. Ĝentila.

Du malamikaj sinjoroj renkontis unu la alian sur tre malvasta piedirejo. Unu el ili iras rekte antaŭen kaj diras:

- Mi ne ĉirkaŭiras malsaĝulon.
- Sed mi, diris la alia kaj ĉirkaŭiris lin.

## 22. Natura leĝo.

Instruisto: Do, la malvarmo kuntiras la aĵojn kaj la varmo etendas ilin. Diru al mi ekzemplon!

Lernanto: En la vintro la tagoj estas mallongaj kaj en la somero la tagoj estas longaj. **Nroj 20–22 el C. Walter: Gajaj Horoj.**

## 23. Parto de la leono.

Leono, vulpo kaj azeno ĉasis kune kaj kaptis cervon. Tiam la leono ordonis, ke la azeno dispartigu la ĉasaĵon. La azeno faris tri partojn; pro tio la leono koleriĝis kaj deŝiris la felon al la azeno tiel, ke li staris tute sangokovrita, kaj poste li ordonis, ke la vulpo dispartigu la ĉasaĵon. La vulpo ree kunmetis la tri partojn kaj donis ilin al la leono. Nun la leono ridis kaj diris: „Kiu instruis vin dispartigi tiel? La vulpo montris al la azeno dirante: „Tie la magistro kun ruĝa bireto“.

## 24. Esploroj de la maro.

Profesoro Agassiz publikigis la rezultatojn de siaj esploroj pri la floro kaj faŭno de la Silenta Oceano. Kiel oni vidas el la raporto, vivaj kreitaĵoj ekzistas en la maro nur ĝis certa profundece, nome ne pli malsupre ol 171 klaftoj sub la supraĵo de la akvo. Pli malsupre komenciĝas jam la regno de absoluta morto, kiu sin etendas ĝis la spaco trovanta sin en malproksimeco de 50–60 klaftoj de la fundo de la maro. Tie ĉi denove komencas montriĝi vivaj kreitaĵoj. Kompreneble, la konstruo de tiuj ĉi bestoj kaj maraj kreskaĵoj estas konformigita al la grandega pezo de la akvo, kiun tiuj ĉi kreitaĵoj devas porti sur si.

Nroj 23–24 el „Fundamenta Krestomatio“  
de L. L. Zamenhof.

## 25. Vortoj de japanaj verkistoj.

Kiam mi vivas en la vera soleco, de neniuj dependante kaj de neniuj ion ajn esperante, nur tiam mi sentas pacon en la koro.

Sakujiro Kano.

Neniu estas tiel ĵaluza pri alies bona ellaboraĵo kiel artista kaj samtempe neniu sin klinas tiel humile antaŭ alies bona ellaboro kiel artisto.

**Masao Kume.**

Estas simplanime opinii ion nova pro tio ke ĝi estas fremda por la okuloj aŭ por la oreloj. Estas malsaĝe, opinii ion malnova pro tio ke ĝi ekzistas jam de longe.

**Ton Satomi.**

Vorto estas ideo, ĝi estas ago, kaj ĝi estas signo.

**Toson Simazaki.**

Oni ne ŝatas neŝanĝon, nek ŝanĝon. Kaprica ja estas la homo.

**Soseki Nacume.**

Arto estas la hibrido de amemo al belo kaj instinkta kreemo de la homo.

**Joŝio Nagajo.**

La plej terura afero por mi estas ne tio, ke mi ne posedas genion, sed tio, ke mia kora flamo ne ardiĝas plu por ĉio.

**Genĵiro Joŝida.**

La plej feliĉa artisto estas tiu, kiu akiras al si grandan famon en siaj malfruaj jaroj.

**Rjunosuke Akutagaŭa.**

La homo tuj forgesas bonajn agojn de aliaj personoj, dum li por ĉiam memoras iliajn malbonaĵojn.

**Ton Satomi.**

Konvinkiĝu, ke la pasinteco estas grava. Ĉar ĝi ĉiam estas mistera fonto, kiu naskas la estonton, kaj lampo, kiu lumigas la estantan vojon, sur kiu oni erare vagas.

**Kafu Nagai.**

Tio, kio naskas la arton, estas la amo.

**Takeo Ariŝima.**

La unua akto de l' homa tragedio komenciĝas jam je la momento de la ekesto de patro kaj filo.

**Rjunosuke Akutagaŭa.**

Poeto havas devon sekci sian kadavron per si mem, kaj elmontri ĝian malsanan staton al la mondo.

**Soseki Nacume.**

Racie mi opinias, ke estas prave ke mi ne estus naskiĝinta. Sed por la fakto, ke mi naskiĝis, kiom utilis tia racio?

**Saneacu Muŝakoĵi.**

La vortoj en frazo devas esti pli belaj ol kiam ili troviĝas en vortaro.

**Rjunosuke Akutagaŭa. Traduko de H. Kaji:**

## 26. Ĉerizfloroj en la Lunluma Nokto.

El „Naturo kaj Homo” da R. Tokutomi.

### I.

Mi malfermis la pordon de mia studĉambro. La plena luno pendas super la supro de la ĉerizarbo en la korto. La ĉielo estas helkolora, kaj ĝia bluo estas nebuleca. Tie ŝvebas blankaj masoj de nubo, kiuj en la apudeco de la luno lumas en arĝenta brilo, kaj fore ŝajnas molaj kaj lanecaj.

Etaj steloj briletas en la ĉiela arkaĵo, kvazaŭvualita lunlumo ludas kun la ĉerizarbo, kaj la branĉoj dense amasigitaj per floroj estas mallumetaj tie, kien la lunlumo ne povas atingi, dum la maldense florhavaj branĉoj, lumigita de l' luno, aspektas blanke, kaj estas nedireble belaj. Maldensaj ombroj kaj heleta lumo falas sur la korton, kiu estas surŝutita per falintaj floroj. Estas kiel se mi paŝus en fabellando.

Foren ĝis la maro etendiĝas blanka sablejo; ie aŭdiĝas kantanta voĉo.

### II.

Baldaŭ poste ekpluvas, sed tuj ĉesas pluvi.

La pluvnuboj malheligas la lunon tiel, ke la mondo estas malhela, kaj la ĉerizfloroj preskaŭ formalaperas en la mallumeton. Ie ranoj estas kvakantaj. (La 15-an de Aprilo).

Trad. de H. Kaji.

## 27. La sezonoj.

El „Makuranosōi”.

En printempo, mi amas rigardi la tagiĝon pli kaj pli blankiĝantan, ĝis hela rozkoloro lumigas la montan pinton, dum maldikaj strioj de skarlata nubo sin etendas supre.

En somero, mi amas la nokton, kiam la luno lumas, kaj la mallumon ankaŭ, kiam la lampiroj krucigas siajn vojojn dum sia flugado, aŭ kiam la pluvo estas falanta.

En aŭtuno, estas la belo de la vespero, kiu movas min plej profunde, kiam mi rigardas la kronikojn revenantajn al sia dormejo duope, triope, kaj kvarope, dum la subiranta suno sendas siajn pompajn radiojn, proksimiĝante al la monta rando. Estas ankoraŭ pli ravante vidi la liniojn de sovaĝaj anseroj, ŝajnantaj ekstreme malgrandaj en la malproksimo. Kaj kiam la suno tute sin kaŝis, kiel plezure aŭskulti al la ĉirpado de insektoj, aŭ la vento ĝemanta en la arboj.

En vintro, mi amas la fruan matenon. Kiel nedireble belega estas la neĝo! Sed mi ankaŭ amas la blindetigan blankon de la prujno

Trad. da H. Kaji. — Nroj 25–27 el „La Esperantisto”  
Tokio. Japanujo.

## 28. Esperanto en la Universitato.

En la Universitatoj de Ĝenevo, Zagreb, k. a. jam ekzistas katedro por Esperanto. En konsiderinde granda nombro da teknikaj lernejoj ktp Esperanto estas jam enkondukita. D-ro Buchanan, filo de skota komercisto, kiu mortis antaŭ ne longe en Liverpol postlasis fundon de 4000 funtoj sterlingaj por krei katedron de Esperanto en la Universitato de tiu urbo. Esperanto estas jam instruata en la Universitato de Liverpol kaj pluraj eminentaj profesoroj estas adeptoj de la internacia lingvo.

(I. E. S.) El „Juna Azio”. Tokio. Japanujo.

## 29. La stomako de Londono.

Londono okupas la unuan lokon kiel urbo-konsumanto. En 1930 ĝi konsumis 1,4 milionojn da tunoj da tritiko. Por bone kompreni tian amasegon, oni imagu ŝarĝvagonaron de 50 vagonoj. Por transporti la supre cititan kvantegon, oni bezonus 2800 tiajn vagonarojn. Se ĉiuhore forveturus vagonaro, pasus 16–17 semajnoj, ĝis la lasta estus forlasinta la ŝarĝejon. En ĉiu semajno Londono konsumas 25 milionojn da panoj kaj pli ol 3000 tunojn da butero. La tuta nutraĵkonsumo atingas en unu jaro la sumon de kvin milionoj da tunoj.

„Heroldo”.

## 30. Ukrajna popola rakonto.

Hieraŭ mi renkontis sur la strato vilaĝanon, kaj ni interparolis kune dum longa momento. Li rakontis al mi, ke li iam iris al Poltava. Mi demandis lin: Kion vi faris tie?

— Mi aĉetis sakon da pizoj, li respondis.

— Bona afero, mi diris.

— Jes, bona, sed ne tre. — Kial? — Ĉar tiun tagon en Poltava mi vizitis kelkajn drinkejojn, kaj kiam mi revenis, mi estis iom ebria kaj falis sur la strato kun mia sako. La pizoj disruliĝis sur la tero.

— Malbona afero! — Jes, malbona, sed ne tre. — Kial?

Ĉarne ĉiuj pizoj falis el la sako, kaj mi plantis la restantajn pizojn en mia ĝardeno, kaj ili bone kreskis.

— Bona afero! — Jes, bona, sed ne tre. — Kial? — Ĉar la porko de mia najbaro iam enkuris la ĝardenon kaj difektis la tutan plantaĵon.

— Malbona afero! — Jes, malbona, sed ne tre. — Kial? — Ĉarpreninte mian tranĉilon, mi mortigis la porkon kaj el ĝia karno faris bonajn ŝinkon, porkaĵon kaj kolbasojn.

— Bona afero! — Jes, bona, sed ne tre. — Kial? — Ĉar iun tagon la hundo de l' vilaĝa pastro enkuris mian domon, saltis en la kuirejon kaj formanĝis la ŝinkon, la porkaĵon kaj la kolbasojn.

— Malbona afero! — Jes, malbona, sed ne tre. — Kial? — Ĉarmi prenis denove mian tranĉilon, kaj mi mortigis la hundon. El ĝia felo mi faris belan pelton, belan mantelon por mia edzino,

— Bona afero! — Jes, bona, sed ne tre. — Kial? — Ĉar postan dimanĉon mia edzino iris al la preĝejo, kaj tie la pastro vidis ŝian pelton, rekonis la felon de sia hundo kaj forprenis la pelton de mia edzino.

— Malbona afero! — Jes, malbona, sed ne tre. — Kial? — Ĉarmi iris plendi al la juĝisto, kaj en la tribunalo li kondamnis la pastron, redoni la pelton al mia edzino.

— Bona afero! — Jes, bona, sed ne tre. — Kial? — Ĉar por gajni la proceson, mi devis fari donacon al la juĝisto, kaj mi donis al li mian bovinon.

— Malbona afero! — Jes, malbona, sed ne tre. — Kial? — Ĉarmia bovino estis tre malsana, kaj post unu semajno ŝi mortis en la bovinejo de la sinjoro juĝisto.

D-ro E. Privat: *Kursa Lernolibro.*

### 31. Rozoj.

Estas rozoj bonodoraj. Ilia milda ornamo similas al tiu fantazia ornamo, per kiu la rideto de l' suno kolorigas la malgrandajn fumnebuletojn, kiuj vespere postlasas ĝin.

Estas rozoj ruĝaj. Ili memorigas la koloron de viva vundo kaj ĉiu ilia florfolieto similas al sanga makulo.

Tio estas la fajraj rozoj de l' pasio.

\*

Estas rozoj flavaj, flavaj kiel la flamo de vakskandelo, kiel la vizaĝo de l' aŭtuno. Tio estas la malĝojaj rozoj de l' disiĝo, la rozoj de l' rezigno.

Silente kaj senvorte salutu tiujn noblajn rozojn vidante ilin ornami ies brustojn.

Estas rozoj blankaj, blankaj kiel la luno, surprizita matene de l' ardanta matena suno, kaj iliaj rigardoj renkontiĝas supre en la ĉielo.

Tio estas la rozoj de l' silenta kaj senespera amo, rozoj de l' soifo kaj de l' malĝojaj – solecaj tagoj.

Estas rozoj nigraj. Ili estas rozoj eternaj, ĉar ili neniam velkas. Iliaj pikiloj estas akraj, la florfolioj grandaj kaj krispaj.

Tiuj strangaj rozoj kreskas en la homa animo.

Tio estas la nigraj rozoj de l' malĝojo.

### 32. Senutila fontano.

Ĉasvagante en la profundaĵoj de unu malluma fagarbaro, kie ekzistas nenia vojeto, kie homaj piedoj apenaŭ paŝis iam, en la mezo de la plej kaŝita loko mi trovis fontanon. Ĝi estis konstruita de bela ĉizita ŝtono. La akvo fluis el kupra tubo grandkvante, plenigis la malgrandan ŝtonan pelvon kaj vive susuradis. En la malgranda niĉo videbliĝis ligna pokalo.

Kiu konstruis tiun ĉi fontanon, kun tia zorgo, kaj por kio li konstruis ĝin tie ĉi, kien homoj neniam venas?

Kredeble iu amiko de l' naturo, iu amiko de l' nimfoj, de l' soleco. Iu intuicianto, iu enamiĝinta pura animo, iu poeto?

Jes, iu poeto certe faris tion, tiun belan fontanon, meze de la netrairebla fagarbaro.

Poeto nur povas fari belan kaj senutilan aferon.

Nroj 31–32 de Elin Pelin. El bulgara lingvo tradukis Kr. Gerogiev. Aperis en „La Esperantisto” en Tokio,

### 33. Mia hundo.

(1887)

J' interprete tousjours la mort par la vie.  
Montaigne, Essais.

Mi havis hundon: lupo. Elkore mi amis ĝin.

Malbela ĝi estis. Eble mi ĝin amis ĝuste, ke ĝi estis tiom malbela – tial ja la aliaj ĝin nek dorlotis, nek malbonigis. Vere, la Lupo estis pli fidela kaj pli bona ol multaj belaj hundoj . . . Ankaŭ la belaj homoj ne ĉiam estas la plej bonaj.

Alvagiŝis rabia hundo en la kazernon kaj mordvundis multajn hundojn. Ankaŭ mian Lupon ĝi mordis.

Venis severa ordono transdoni ĉiujn morditajn hundojn al la senfeligisto.

Deniel mi povis decidiĝi por transdoni mian multjaran, fidelan kamaradon al la ekzekutisto. Mi decidis propramane mortigi la Lupon.

Kun ŝarĝita revolvero mi eliris sur herbejon. La Lupo post mi. Ĉe la kolumo mi ĝin kaptas. Pafi mi volas, sed mi ne povas rigardi en tiun fidelan, senmalican okulon . . . Mi turnas min flanken kaj pafas. . . Malbone trafite! El la femuro fluas sango, sed la Lupo estas kvieta, nek ekbojis, nek ekveis.

Ĝinur rigardas min larme, esprime, kvazaŭ demandante: „kion mi ja pekis kontraŭ vi?”

Per dua kuglo mi frakasis la kapon. La Lupo falis. En la lasta baraktado ĝi sin trenas al mi. Svingas per la vosto kaj lekas miajn piedojn. En la okuloj ankoraŭ tremetas la esprimo: „ne mi kulpas . . .” Estingiĝas la okulo . . . Jam mortis.

Mi havis la senton, kvazaŭ mi estus mortiginta la plej bonan amikon . . .

Tiun ĉi vesperon mi ne manĝis. Sed mi vidis iun manĝi kun granda apetito — post kiam li sian kamaradon, mian amikon, pafmortigis . . .

Kompreneble — laŭ ĉiuj duel-reguloj!

### 34. Legendo el la monaĥejo.

(1888)

Junulo kiel novico eniris inter la monaĥojn. Tutan jaron per pia preĝado li preparadis sin por la sankta ordeno. Jen morgaŭ oni lin konsekros, hodiaŭ la patro gvardiano lin konfesprenas.

— Mi amas! ekflustris la junulo. Mi amas kaj tiun amon mi ne povas eĉ per la plej pia preĝado elpeli el la koro!

— Iru en dia paco, respondis la maljunulo. Skurĝu vin, fastu kaj preĝu unu jaron plue.

La junulo foriris kaj obeis.

Post la jaro jen denove li: „Patro! Mi skurĝis min ĝis la sango, mi preĝis ĝis frenezigo, mi suferis malsaton kaj soifon, sed mi pli kaj pli ŝin amas . . . Helpu!”

— Ne estas helpo por vi — diris la maljunulo, iru kaj edzinigu ŝin.

La junulo foriris kaj obeis.

Post unu jaro li revenis.

- Jen mi, patro, konsekru min! Via mi estas korpe kaj anime!
- Sed la amo?
- La amo? ekĝemis la junulo, – jam forvelkis!

Nroj 32–33 el la „Foliaro” de Fran Mažuranić.  
Tradukis Dada Novačić.

### 35. La saĝa knabo en Siamo.

Dum mia longa, longa vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, por propagandi Esperanton, mi ankaŭ vojaĝis tra la malproksima kaj stranga lando Siamo.

Kvankam estis en la monato decembro, la aero estis terure varma. Regis vera tropika temperaturo. Mi ŝvitegis dum la tuta tago kaj eĉ dum la noktoj. Mi soifis konstante kaj mi trinkis multan kokoslakton.

La kokoso estas la plej utila frukto en la tropiko kaj estas ŝatata de la indiĝenoj kaj vojaĝantoj. La loĝantoj de tiuj tropikaj landoj faras truan en la dikan ŝelon, tenas la nukson super la kapon kaj lasas flui la kokoslakton en la buŝon. Tio estas tre bona metodo por la enlandanoj, kiuj ne portas ĉemizon.

Sed mi ne povis uzi tiun metodon, ĉar mi ne povis ŝanĝi mian ĉemizon post ĉiu kokoso, ĉiutage kvinfoje aŭ eĉ pli ofte. Do mi eksperimentis kaj baldaŭ trovis ke gumotubeto estas la plej bona ilo por trinki la lakton el la kokoso, same kiel en Eŭropo kaj Ameriko oni trinkas limonadon el glaso per pajlo.

Foje mi vizitis tre malgrandan vilaĝon en la praarbaro de Siamo. Nur 200 enloĝantoj vivis en la vilaĝo, kaj ili tuj staris ĉirkaŭ mi, kiam mi alvenis. Mi aĉetis kokoson, malfermis ĝin kaj komencis trinki ĝin per mia gumotubeto. La vilaĝanoj tute ne sciis, kion mi faris. Ili ne sciis ke oni povas trinki limonadon aŭ lakton per tubeto. Do ili simple atendis kaj rigardis. Poste mi turnis la nukson kaj ĉiuj vilaĝanoj tre multe miris ke la lakto estis for.

Ili tuj pensis ke mi estas blanka fakiro aŭ eble speco de dio. Ili tuj komencis paroli pri la granda miraklo, kiun mi faris. Kelkaj rigardis tra la truo kaj konstatis ke fakte la lakto estas for.

Dum kiam la granduloj preparolis la aferon, malgranda knabo forkuris kaj baldaŭ alportis alian kokoson. Li malfermis ĝin kaj prunteprenis mian gumotubeton. Mi volonte pruntedonis ĝin al la lernema knabo, kiu pensis ke eksperimenti estas pli saĝe ol nur preparoli kaj miri.



Baldaŭ la knabo sukcesis trinki la lakton laŭ mia metodo. Li turnis la malplenan nukson, por ke ĉiuj povu vidi, ke li estas same saĝa kiel la blanka fakiro. La knabo tre, tre multe ĝojis pri sia lerteco. Do mi donacis la tubeton al li. Mi pensis ke mi povos aĉeti novan en la najbara vilaĝo, kie mi estis vidinta apotekon.

Mi faris ankoraŭ multaj fotografiaĵojn en la ĉirkaŭaĵo, kaj en la posttagmezo mi fine alvenis ĉe la apoteko. La apotekisto multe miris ke mi volas aĉeti gumotubeton, eĉ faris grandajn okulojn kaj demandis min:

„Ĉu vi eble ankaŭ deziras trinki kokoslakton per gumotubeto??? La enloĝantoj de la najbara vilaĝo estis tie ĉi dum la tagmezo kaj aĉetis ĉiujn miajn gumotubojn. Mi ne plu havas. Nur post kelkaj tagoj mi havos novajn.”

Mi denove vizitis la vilaĝon por vidi kio okazis. Nun estis mi, kiu faris grandajn okulojn. Antaŭ ĉiuj domoj kuŝis multaj malplenaj kokosoj. Ĉie la vilaĝanoj eksperimentis per gumotuboj. Ĉiuj volis lerni la trinkadon de lakto laŭ mia metodo. Ili trinkis la lakton laŭ la eŭropa metodo, kaj mi devis nun trinki la kokoslakton laŭ la metodo de la siamanoj.

La malgranda knabo, kiu unue sukcesis trinki la lakton per gumotubo, devis montri la arton al ĉiuj aliaj vilaĝanoj. Kaj ĉiuj bone lernis. Do, vi vidas, ke malgranda knabo estis pli lerta kaj pli saĝa ol la granduloj.

Tamen li estis tre, tre ĝentila kaj afabla al la gepatroj. En la tropikaj landoj la infanoj estas ĉiam tre ĝentilaj kaj afablaj al la gepatroj. Ili estas tre obeemaj infanoj. Neniam mi vidis ke gepatroj devis bati aŭ nur mallaŭdi la infanojn. El tio oni vidas ke la infanoj kun malhela haŭto multe respektas siajn gepatrojn. Ilia respekto kaj amo estas tre imitindaj! Se la rakonto plaĉis al vi, rakontu ĝin al viaj amikoj kaj kunklasanoj kaj diru ke per Esperanto mi vojaĝis ĉirkaŭ la mondo.

De Joseph R. Scherer, Los Angeles. Aperis en „Nia Revueto”, aldono al „Heroldo de Esperanto.” Koln.

### **36. Por refreŝigo de geografia leciono.**

Siamo estas konstitucia reĝlando oriente de Hindujo kun proks. 500.000 km<sup>2</sup>, 9,6 milionoj da loĝantoj; ĉefurbo Bangkoko. Unu el la plej gravaj eksportlandoj por rizo, krome por spicaĵoj kaj stano; praarbaroj kun valoraj lignospecoj (tektono). Serĉu ĝin sur la landkarto!

## 37. La deveno de l' arta muziko.

(Greka fabelo)

En antikvaj tempoj, longe antaŭ Homero, vivis juna paŝtisto, kiu paŝtis sian ŝafaron sur la herboriĉaj deklivoj de Parnaso. Iun tagon li tranĉis kanon, boris en ĝi truetojn kaj eltiris el ĝi sonojn de rava dolĉeco. Ĝoje li invitis siajn amikojn, ke ili faru la samon. Sed ili mokis lin: „Ĉu ne sufiĉas la kanto de l' birdoj kaj la melodia voĉo de l' junulinoj? Por kio ni bezonas novan muzikon? — Sed la paŝtisteto persistis kaj la junaj paŝtistoj el Parnaso iris por demandi la saĝulojn de Grekujo. „Ho, respektindaj saĝuloj“, ili diris, „ĉu ebla estas arta muziko?“ Kaj la respektindaj saĝuloj post longa medito, *karesante* sian blankan barbon, respondis fine per serioza voĉo: „Ne, paŝtistoj, tia muziko estas neebla, ĉar ĝi neniam ekzistis, kaj eĉ se ĝi estus ebla, ĝi estus, kiel la lingvaĵo de l' Barbaroj, — nur sovaĝa miksaĵo, interfrakaso de sonoj, netolerebla por ĉiu delikata orelo“ . . . .

*Triumfante* revenis la *paŝtistetoj* al sia ŝafaro kaj ree mokis sian tro genian kamaradon. Sed obstina li restis. Senhalte li tranĉis kanojn kaj senĉese invitadis al ludo siajn kunulojn. Fine ili konsentis kaj el la boritaj kanoj ankaŭ siavice eligis sonojn de rava dolĉeco.

Tiel naskiĝis la arta muziko. Ĝi ne ĉesigis la kanton de l' birdoj, ĝi ne mutigis la melodian voĉon de l' junulinoj. Ĝi vivas, saĝuloj de Grekujo, kaj tiel longe ĝi vivos, *kiel longe* ekzistos homoj.

Simile ankaŭ nia Esperanto ne detruos niajn naciajn lingvojn kaj tamen ĝi vivos por la bono de l' homaro.

Prof. Theophile Cart,  
prezidinto de l' Esperantista Akademio en Parizo.

## 38. Deklaracio pri Esperantismo.

(oficiala teksto de la Boulogne'a kongreso en la jaro 1905).

Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon:

1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, kiu „ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzi-

stantajn lingvojn naciajn", donus al la homoj de malsamaj nacioj, la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj, faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiu prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas „nenies propraĵo", nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritalaj mastroj de tiu ĉi lingvo estas ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estas konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto", en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj „tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto". Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto", ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la

verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

### 39. La Fundamento.

Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, estas *plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: La ekzistado de klare difinita, neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo.* Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala *leĝo* garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj; sed *ĝis tiu tempo* la fundamento de Esperanto devas plej severe resti *absolute senŝanĝa*, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta. *Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon!*

Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto:

1. La 16-regula Gramatiko;
2. La Universala Vortaro;
3. La Ekzercaro.

### La Fundamento de Esperanto.

Eldonejo

Hachette & Cie, Paris.

Tiun ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel *leĝojn* por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj, li neniam permesis al si eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto.

L. L. Zamenhof.

## 40. La fosiloj. (Malnova franca fabelo).

Antaŭ multaj jarcentoj ia franca reĝo venigis tri laboristojn kaj diris al ili:

„Gravan premion mi donos al tiu, kiu fosos plej longan sulkon!”

La du unuaj laboristoj komencis disputadi pri la meritoj de siaj fosiloj.

– Bona fosilo devas esti longa, diris unu.

– Ĝi devas esti larĝa, diris la alia.

*Dum ili disputadis*, la tria per pli-malpli bona fosilo fosis sian sulkon kaj gajnis la premion.

Esperantistoj, karaj kunbatalantoj, *ni* ne perdu nian tempon, *babillante* kaj *diskutante*:

Ni fosu nian sulkon!

Vivu nia *Zamenhofa* Esperanto!

(Dirita en 1907 en Cambridge).

Prof. Th. Cart.

## 41. Parolado de Doktoro Zamenhof ĉe la unua kongreso de Esperanto 1905. en Boulogne-sur-Mer.

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! – Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas. Mi salutas vin ankaŭ, glora lando Francujo kaj la bela urbo Bulonjo-sur-Mar, kiuj bonvole oferis gastamon al nia kongreso. Mi esprimas ankaŭ koran dankon al tiuj personoj kaj institucioj en Parizo, kiuj ĉe mia trapaso tra tiu ĉi glora urbo esprimis sub mia adreso sian favoron por la afero Esperanto, nome al s-ro la Ministro de publika instruado, al la urbestraro de Parizo, al la franca Ligo de instruado kaj al multaj diversaj sciencaj eminentuloj.

Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis regnestroj nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj kaj

multego da imponaj ordenoj en nia salono, ne bruas pafilegoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaltaj, ne audeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la sonoj de io granda, kiu nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugas en la mondon, korpigiĝas kaj potenciĝas, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.

En la plej malproksima antikveco, kiu jam de longe elviŝiĝis el la memoro de la homaro kaj pri kiu nenia historio konservis al ni eĉ la plej malgrandan dokumenton, la homa familio disiĝis kaj ĝiaj membroj ĉesis kompreni unu la alian. Fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havis ĉiuj egalajn ideojn, egalan Dion en siaj koroj, fratoj, kiuj devis helpi unu la aliajn kaj labori kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio, — tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj, disiĝis ŝajne por ĉiam en malamikajn grupetojn, kaj inter ili komenciĝis eterna milito. En la daŭro de multaj miljaroj, en la daŭro de la tuta tempo, kiun la homa historio memoras, tiuj fratoj nur eterne bataladis inter si, kaj ĉia interkompreniĝado inter ili estis absolute ne ebla. Profetoj kaj poetoj revadis pri ia tre malproksima nebula tempo, en kiu la homoj denove komencos komprenadi unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion, sed tio ĉi estis nur revo. Oni parolis pri tio, kiel pri ia dolĉa fantazio, sed neniu prenis ĝin serioze, neniu kredis pri ĝi.

Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi. En la malgrandan urbon de la franca marbordo kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj, kaj ili renkontas sin reciproke ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu alian, ili parolas unu kun la alia kiel fratoj, kiel membroj de unu nacio. Ofte kunvenas personoj de malsamaj nacioj kaj komprenas unu alian; sed kia grandega diferenco estas inter ilia reciproka kompreniĝado kaj la nia! Tie komprenas sin reciproke nur tre malgranda parto da kunvenintoj, kiuj havis la eblon dediĉi multegon da mono, por lerni fremdajn lingvojn, — ĉiuj aliaj partoprenas en la kunveno nur per sia korpo, ne per sia kapo: sed en nia kunveno reciproke sin komprenas ĉiuj partoprenantoj, nin facile komprenas ĉiu kiu nur deziras nin kompreni, kaj nek malriĉeco, nek nehavado de tempo fermas al iu la orelojn por niaj paroloj. Tie la reciproka kompreniĝado estas atingebla per vojo nenatura, ofenda kaj maljusta, ĉar tie la membro de unu nacio humiliĝas antaŭ la membro de alia nacio, parolas lian lingvon, hontigante la sian, balbutas kaj ruĝiĝas

kaj sentas sin ĝenata antaŭ sia kunparolanto, dum tiu ĉi lasta sentas sin forta kaj fieraj; en nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj, ne altrudante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!

Ni kunvenis hodiaŭ, por montri al la mondo, per faktoj nefuteblaj, tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montros al la mondo, ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ke la muroj inter la popoloj tute ne estas io necesega kaj eterna, ke reciproka kompreniĝado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed apero tute natura, kiu pro tre bedaŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj estis nur tre longe prokrastita, sed kiu pli aŭ malpli frue nepre devis veni kaj kiu fine nun venis, kiu nun elpaŝas ankoraŭ tre malkuraĝe, sed, unu fojon ekirinte, jam ne haltos kaj baldaŭ tiel potencege ekregos en la mondo, ke niaj nepoj eĉ ne volos kredi, ke estis iam alie, ke la homoj, la reĝoj de la mondo, longan tempon ne komprenis unu alian! Ĉiu, kiu diras, ke neŭtrala arta lingvo estas ne ebla, venu al ni, kaj li konvertiĝos. Ĉiu, kiu diras, ke la parolaj organoj de ĉiuj popoloj estas malsamaj, ke ĉiu elparolas artan lingvon alie kaj la uzantoj de tia lingvo ne povas kompreni unu alian, venu al ni, kaj, se li estas homo honesta kaj ne volas konscie mensogi, li konfesos, ke li eraris. Li promenu en la venontaj tagoj en la stratoj de Bulonjo-sur-Maró, li observadu, kiel bonege sin komprenas reciproke la reprezentantoj de la plej diversaj nacioj, li demandu la renkontatajn esperantistojn, kiom multe da tempo aŭ mono ĉiu el ili dediĉis por ellerni la artan lingvon, li komparu tion ĉi kun la grandegaj oferoj, kiujn postulas la lernado de ĉiu lingvo natura, — kaj, se li estas homo honesta, li iru en la mondon kaj ripetadu laŭte: „jes, lingvo arta estas tute ebla, kaj la reciproka kompre-

niĝado de homoj per neŭtrala arta lingvo estas ne sole tute ebla, sed eĉ tre kaj tre facila. Estas vero, ke multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ tre malbone kaj malfacile balbutas, anstataŭ paroli flue; sed, komparante ilian balbutadon kun la perfekta flua parolado de aliaj personoj, ĉiu konscienca observanto facile rimarkos, ke la kaŭzo de la balbutado kuŝas ne en la lingvo, sed nur en la nesufiĉa ekzerciteco de la diritaj personoj.

Post multaj miljaroj da reciproka surda-muteco kaj batalado, nun en Bulonjo-sur-Maró fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed irados antaŭen ĉiam pli kaj pli potence, ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperos por ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Bulonjo-sur-Maró, kaj ili estu benataj!

En la unua kongreso de la esperantistoj estas necese diri kelkajn vortojn pri la ĝisnunaj batalantoj de nia afero. Sed antaŭ ol mi parolos pri la batalantoj speciale esperantistaj, mi sentas la devon diri ĉi tie kelkajn vortojn pri unu homo, kiu havas tre grandajn meritojn en nia afero kaj al kiu bedaŭrinde la esperantistoj ofte rilatas maljuste nur tial, ĉar li, multe farinte por la ideo de lingvo internacia ĝenerale, ne apartenas tamen al la amikoj de tiu speciala lingva formo, por kiu ni batalas. Mi parolas pri la tre estiminda sinjoro Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapŭk. La lingva formo, por kiu laboris tiu respektata maljunulo, montriĝis ne praktika; la vojo, kiun li elektis, montriĝis ne bona, kaj la afero, por kiu li batalis, baldaŭ falis, kaj per sia falo ĝi alportis grandan malutilon al nia ideo entute kaj precipe al tiu speciala formo de la ideo, por kiu ni batalas. Sed ni devas esti justaj, ni devas taksu ĉiun homon ne laŭ lia venko aŭ malvenko, sed laŭ liaj laboroj. Kaj la laboroj kaj meritoj de sinjoro Schleyer estis tre grandaj. Kun granda fervoro li laboris por la ideo de lingvo internacia en la daŭro de multaj jaroj; dum multaj personoj donadis nur nudajn projektojn, li estis la unua, kiu havis sufiĉe da pacienco, por ellabori plenan lingvon de la komenco ĝis la fino (kvankam Esperanto tiam estis jam preta, ĝi ne estis ankoraŭ publikigita), kaj ĝi ne estas lia kulpo, se la lingvo montriĝis ne praktika. Li estis la unua, kiu per senlaca laborado vekis la intereson de la mondo por la ideo de lingvo neŭtrala, kaj ĝi ne estas lia kulpo, se lia falinta afero por longa tempo malvarmigis la mondon por ĉia arta lingvo. Li volis fari grandan bonon, kaj por la atingo de tiu bono li laboris tre multe kaj fervore, kaj ni devas lin taksu ne laŭ lia sukceso, sed laŭ lia volo kaj laboro. Se la ideo de lingvo internacia iam venkos la mondon — tute egale, ĉu ĝi



estos sub la formo de Esperanto aŭ de ia alia lingvo — la nomo de Schleyer okupos ĉiam la plej honoran lokon en la historio de nia ideo, kaj tiun ĉi nomon la mondo neniam forgesos. Mi esperas, ke mi esprimas la opinion de ĉiuj partoprenantoj en nia kongreso, se mi diros: „ni esprimas nian koran dankon al sinjoro Schleyer, la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia”.

Nun mi transiros al la laborantoj speciale esperantistaj. Ne venis ankoraŭ la tempo, skribi oficialan historion de nia afero, kaj mi timas, ke mi povus fari ian publikan maljustaĵon al tiu aŭ alia persono ĉe la kompara taksado de la meritoj de la diversaj batalantoj. Tial mi ne nomos ĉiun el ili aparte, sed al ĉiuj kune mi esprimas koran dankon pri ilia laborado en la nomo de ĉiuj amikoj de Esperanto. Dek ok jaroj pasis de la tago, kiam Esperanto aperis en la mondo. Ne facilaj estis ĉi tiuj dek ok jaroj. Nun mi vidas antaŭ mi grandegan nombron da varmegaj amikoj de Esperanto, kiuj reprezentas per si preskaŭ ĉiujn landojn de la tera globo, preskaŭ ĉiujn naciojn de la mondo, ĉiujn rangojn, statojn kaj klasojn de la homoj. Tre granda estas jam nia literaturo, tre multaj estas niaj gazetoj, en la tuta mondo ni havas nun grupojn kaj klubojn esperantistajn, kaj al neniu klera homo en la mondo la nomo de nia afero nun estas jam nekonata. Kiam mi rigardas la nunan brilantan staton de nia afero, mi rememoras kortuŝite pri la unuaj pioniroj, kiuj laboris por nia afero en tiu malĝoja tempo, kiam ni ĉie renkontadis ankoraŭ nur mokon kaj persekuton. Multaj el ili vivas ankoraŭ kaj ili rigardas nun kun ĝojo la fruktojn de sia laborado. Sed ho ve, multaj el niaj pioniroj jam ne vivas. Dek ok jaroj estas granda peco da tempo. En tiu ĉi granda spaco da tempo la morto rabis al ni tre multe el niaj fervoraj kunbatalantoj. Citi ĉiujn nomojn estus nun afero ne ebla; mi nomos nur kelkajn el ili. La plej frue forlasis nin Leopoldo Einstein, la unua energia propagandisto de nia afero; lia morto estis granda bato por nia afero entute, kaj speciale por ĝia disvastigado en Germanujo. Poste la morto rabis al ni Josefon Wasniewski, la simpatian kaj de ĉiuj amatan apostolon de nia afero en Polujo. Kaj antaŭ kelke da jaroj mortis tiu persono, al kiu Esperanto ŝuldas multe, tre multe kaj sen kiu nia afero nun eble tute ne ekzistus: mi parolas pri la neforgesebla W. H. Trompeter. Neniam parolante pri si, postulante por si nenian dankon, li prenis sur siajn ŝultrojn nian tutan aferon, kiam ĝi troviĝis en la plej malfacilaj cirkonstancoj; li sola subtenadis ĝin tiel longe, ĝis la nombro de la esperantistoj fariĝis sufiĉe granda, por subtenadi la aferon per fortoj komunaj. Kiel li ĝojus nun, se li vidus la nunan staton de nia afero!

Krom la nomitaj tri personoj estas ankoraŭ granda, ho ve, tre granda nombro da personoj, kiuj multe laboris por nia afera kaj kiuj nun jam ne loĝas en nia mondo kaj ne povas vidi la fruktojn de siaj laboroj. Ili mortis korpe, sed ili ne mortis en nia memoro. Mi proponas, estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj. Al la ombroj de ĉiuj mortintaj batalantoj esperantistaj la unua kongreso esperantista esprimas sian respekton kaj pian saluton!

Baldaŭ komenciĝos la laboroj de nia kongreso, dediĉita al vera fratiĝo de la homaro. En tiu ĉi solena momento mia koro estas plena de io nedifinebla kaj mistera kaj mi sentas la deziron faciligi la koron per ia preĝo, turni min al iu plej alta forto kaj alvoki ĝian helpon kaj benon. Sed tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas ia naciانو, sed simpla homo, tiel same mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo. Kaj en la nuna momento staras inter miaj animaj okuloj nur tiu alta morala Forto, kiun sentas en sia koro ĉiu homo, kaj al tiu ĉi nekonata Forto mi turnas min kun mia preĝo:

## 42. Preĝo sub la verda standardo.

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,  
Fortego, la mondon reganta,  
Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero  
Kaj fonto de vivo konstanta,  
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,  
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,  
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,  
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,  
Kun dogmoj de blinda fervoro:  
Silentas nun ĉiu disput' religia  
Kaj regas nur kredo de koro.  
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,  
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,  
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro  
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,  
Sed ĝi sin dividis batale;  
Popolo popolon atakas kruele,  
Frat' fraton atakas ŝakale.

Ho, kiu ajn estas Vi forto mistera,  
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,  
Redonu la pacon al la infanaro  
De l' granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,  
Por reunuigi l' homaron.  
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,  
Sed lasu nin venki la baron;  
Donacu Vi benon al nia laboro,  
Donacu Vi forton al nia fervoro,  
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj  
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;  
Ĝisignas la bonon kaj belon.  
La Forto mistera de l' mondo nin benos,  
Kaj nian antigos ni celon.  
Ni inter popoloj la murojn detruos,  
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos  
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero  
Ekregos sur tero.

### 43. La Espero.

En la mondon venis nova sento, Forte staras muroj de miljaroj  
Tra la mondo iras forta voko; Inter la popoloj dividitaj,  
Per flugiloj de facila vento Sed dissaltos la obstinaj baroj  
Nun de loko flugu ĝi al loko. Per la sankta amo disbatitaj.

Ne al glavo sangon soifanta Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Ĝila homan tiras familion: Komprenante unu la alian,  
Al la mond' eterne militanta La popoloj faros en konsento  
Ĝi promesas sanktan harmonion. Unu grandan rondon familian.

Sub la sankta signo de l' espero Nia diligenta kolegaro  
Kolektiĝas pacaj batalantoj, En laboro paca ne laciĝos,  
Kaj rapide kreskas la afero Ĝisla bela sonĝo de l' homaro  
Per laboro de la esperantoj. Por eterna ben' efektiviĝos

L. L. Zamenhof.

### 44. Poploj en aleo

. . . Poploj staras en aleo . . .  
Ekiras vent' kun laŭta veo.

Kun branĉoskua, brua spiro  
 La vent' lamentas pri l' sopiro.  
 Kaj dum la vento vee blovas,  
 La poploj vice sin ekmovas.  
 L'unua klini sin komencas,  
 Kaj al la dua riverencas,  
 Sed ĝi al tiu vane zumas,  
 Tiu la trian amindumas.  
 La tria flustras al la kvara  
 Kun ama tremo foliara,  
 Kaj tiel plu . . . jen lud' sencela  
 Dolora, vana kaj kruela,  
 Kaj en la tuta vic' la sama:  
 Rifuz' de am', petego ama. . . .  
 Jam hurle veas vent' lamenta:  
 Sopir', sopir', sopir', turmenta. . . .  
 Fleksiĝas poploj jam laŭtĝeme,  
 En ark' sovaĝa, sopirtreme.  
 Reklini sin . . . miksiĝus drone  
 La branĉ kun branĉ . . . kaj estus bone ...  
 Sed, ve, proksimo, certa havo,  
 Estas sen logo kaj sen ravo,  
 La kor' kun flam' ne estingebla  
 Sopiras je l'Neatingebla . . .  
 Ho, steloj en la alt' glacia!  
 Ho, Vo de l'gruoj nostalgia!  
 Ho, floro sur la roko kruta!  
 Sur frosta lip' rifuzo muta!  
 Ho, flor' ravanta de l' Deziro,  
 Ho, flor'—velkonta post deŝiro!  
 En brua blov' de l' skua vento  
 Ĉu ploras veo kaj lamento,  
 Aŭ—en doloro dum ni dronas—  
 Infera moka rido sonas?

D-ro Kolomano de Kalocsay.  
 Internationale Language, Londono,

## 45 Mia koro

Ne demandu plue kion sentas mia koro !  
En tri tagoj ĝi la malfeliĉa malsaniĝis;  
post interparolo senutila ĝi rompiĝis . . .  
Iu tuŝis mian koron kaj ektordis ĝin doloro . . .

Koro mia . . . Koro malfeliĉa floro blanka  
dum malvarma vintro de la frosto velkigita.  
Mia kor'; sen lun', sen stelo, en mallum' jetita . . .  
Mi en tiu ĉi mallumo timas, Dio sankta!

Timas mi . . . Malluma falas la vespero jena . . .  
Kvazaŭ en profunda maro sola mi nun staras,  
aŭ ligiĝis mil' da nodoj ĉirkaŭ kapo svena . . .

Kiu ĉirkaŭligis mian amon kun severo?  
Mia koro ploras . . . forlasita, sen espero . . .  
Okulparo larmas kaj mallumo ĝin vualas . . .

El la turka: Ahmed Asker

## 46. Al vi ĉion

Narita.-S.

Al vi ĉion  
Ho belulino  
Mi estas la via.  
Mi adoras vin  
Ho anĝelo belega,  
Donantino, vin  
De la sonĝo ebriga.  
Al vi ĉion  
Ho karulino  
Vi estas la mia.  
Mi admiras vin  
Kerubino ĉarmega  
Vi donacas min  
Al la ĝojo juniga.

(Tokio, la 12-an de Decembro, 1926)

## 47. Dormemaj birdetoj

La dormemaj gebirdetoj  
Jen traflugas la aeron ;  
Kaŝas sin inter branĉetoj –  
Bonvesperon!  
Nun aŭdeblas nur fontploroj,  
Dum l' arbar' silentas lace .  
Endormiĝis eĉ la floroj. –  
Dormu pace !  
Naĝas cigno sur la lago  
Inter kanojn noktmalhelajn;  
Naĝas tien laŭ zigzago. –  
Songojn belajn!  
La vespera belmagio  
Montras flavon lunduonan ;  
Ĉioestas harmonio. –  
Nokton bonan!  
De M. Eminescu  
El la rumana: P. Firu

## 48. „Estis iam rozo bela"

(Bila jednom ruža jedna)

Ĉe l' patrin' knabino floris,	Al l' alia manon donis
Ĉarma pli ol tago hela.	Estis iam rozo bela . . .
Kaj ekamis junuleton –	Ĉe altar' la edzo ĵuras
Estis iam rozo bela . . .	Ĝoje vibras kant' miela.
La junul' flirtulo estis,	Sonoril' ĉe l' tomo ploras:
Ŝin perfidis kor - kruela :	Estis iam rozo bela . . .

De Milorad J. Mitrović.  
Tradukis: Jean d' Agreve

## 49. Venu amatino!

Ĉi tien venu, amatino mia,  
Sidiĝu do ĉe mi; aŭskultu nur,  
Ne ampoemojn volas mi nun kanti,  
Rakonti nur pri l' ĉarmo de l' natur'.

Mi tien gvidos cin, feinoj kie  
Plektadoskronojn el ravanta flor';  
De tiu floro el feiĝardeno  
Ekbrilu cia frunto kiel or'.

De tie dornavoje mi cin gvidos,  
Feinoj kie en malproksimaĵ'  
Plore gas, ĉar sub kruco ripozadas  
Unika mia tere plejkaraj'.

Ĉartie dormas patrineto mia,  
Apude dua, ve, junulesper';  
Ho savu ĝin, se mi kun ci migrados  
Al malproksima tomb' en harda ter' !

Kaj tie sonu l' vort' de cia koro,  
Se malkaŝiĝos la mortiga vund':  
„Ĉi tie dormas la estontaj tagoj –  
Nek ilin suno vekos el profund'!"

Ĝojtremantetiam mi aŭskultus  
Feliĉvekiĝon de dormema mort', –  
Mi aŭdas jam anĝelan ĉirkaŭadon :  
Revivokanton jam per cia vort' !

De Silvije Strahimir Kranjčević.  
Tradukis Mavro Spicer.

## 50. Osoja mutulo

„Ho, salutata estu, centjara monaĥej',  
kaj lago vi trankvila kun verda la ondej' !  
En karintia lando kaŝita perlo vi,  
Ĉutrovi pacon povos al mia koro mi?"

Parolas vojaĝanto mallaŭte nur kun si,  
laŭ lago sur la strato rapide iras li.  
Kuraĝa estas paŝo, statur' de nobelul',  
sed pala la vizaĝo kaj arda la okul'

Li haltas sub la monto jen ĉe la enirej',  
ekvidas lin grizhara abat' de l' monaĥej'.  
Li estas muta viro, nenion diras li,  
nur papereton montras al la monaĥo li.

„El Romo vi alvenas, sciigas la leter'  
kaj resti vi deziras, fremdul', sur nia ter'!  
Eniru, viro pia, kaj se fidela vi,  
al patroj niaj servi facile povos vi!"

Postsekvas la abaton silente la fremdul',  
labori li komencas, plej lasta la subul'.  
tre frue ellitiĝas matenon ĉiun li,  
malfrue ĉiun nokton jen dormi iras li.

Demandas lin neniŭ, de kie venis li  
kaj kie li naskiĝis kaj kiu estas li.  
Al ĉiuj nekonata nur restas la fremdul',  
ĉar povis ja neniŭ paroli kun mutul',

Hodiaŭ komunii ekiras la abat',  
en la malvasta ĉelo jen lia muta frat'.  
Sur lito malkomforta li kuŝas, la fremdul',  
komuniĝi volas la muta malsanul'.

„Aŭskultu, patro mia, paroli devas mi!"  
Li estis viro muta kaj nun parolas li!  
Sep jarojn laboradis tre brave la subul',  
neniam li parolis, silentis la fremdul'.

Kaj nun tre malrapide konfesas ĉion li,  
pri peko granda sia parolas longe li,  
pri episkopo sankta – li estis Stanislav,  
al kiu li la koron traboris per la glav'.

Tri tagojn poste en la Osoja monaĥej',  
funebrajn kantojn kantis la ĥoro en preĝej'.  
Kaj en la mezo dormis en ĉerko la mutul';  
abato meson faris por savo de l' pekul'.

Kantadis patro Tenĥa kaj preĝis tiel li :  
„Anim' alvenu lia, ho Dio, nun al vi!  
Li penton ja faradis, ni petas pri la sav',  
li estis reĝo pola, la reĝo Boleslav!"

De Anton Aŝker.  
Tradukis Franjo Modriĵan.

## 51. Amkanteto.

Nokta kovras silentego  
Ĉion;ĉie ripozad',  
Ĉieĉirkaŭ trankvilego,  
Mĭn nur premas dolorad'.

Ĉuci dormas, sorĉa oro,  
Kiun arde amas mi ?  
Kial kaŭzis ho, sen koro  
Tian doloregon ci?

Ĉueble maldormadas  
Cian sklavon aŭskultant',  
Aŭ pri l' amo ci revadas,  
Pri ĉiel' feliĉdonant' ?

Dormu plu, feino mia,  
Songu, koro, dolĉe nun,  
Ne ĝeniĝu paco cia,  
Ĝisekbrilos l' ora sun..

Popolkanto. Tradukis Mavro Spicer.

## 52. La Vojo

Tra densa mallumo briletas la celo,  
Al kiu kuraĝe ni iras.  
Simile al stelo en nokta ĉielo,  
Al ni la direkton ĝi diras.  
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
Nek batoj de l' sorto, nek mokoĵ de l' homoj,  
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita,  
Ĝiestas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
Traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco,  
Jen estas la signoj, per kies potenco,  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.



Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,  
Pri l' tempoj estontaj pensante.  
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,  
Ni semas kaj semas konstante.  
„Ho, ĉesu!“ mokante la homoj admonas,  
„Ne ĉesu, ne ĉesu!“ en kor' al ni sonas:  
„Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,  
Se vi pacience eltenos“.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj  
Velkantajn foliojn deŝiras,  
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,  
Ni forton pli freŝan akiras.  
Ne mortos jam nia bravega anaro,  
Ĝinjam ne timigos la vento, nek staro,  
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,  
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
Traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.

L. L. Zamenhof



<i>Predgovor.</i> . . . . .	3
-----------------------------	---

## I. dio:

<i>Uvod.</i> Alfabet, Imena slova. Izgovor. Vježba za čitanje . . . . .	5
<i>Prva lekcija.</i> Razgovor o učenju esperanta . . . . .	6
<i>Druga lekcija.</i> Razgovor između učiteljice i učenice o muževima i ženama . . . . .	8
<i>Treća lekcija.</i> Školska soba . . . . .	10
<i>Četvrti lekcija.</i> Razgovor o školskoj sobi . . . . .	11
<i>Peta lekcija.</i> Čovječje tijelo . . . . .	13
<i>Šesta lekcija.</i> Vježba za točnije upoznavanje dijelova tijela . . . . .	14
<i>Sedma lekcija.</i> Imenice, pridjevi, množina. Glagoli u sadašnjem vremenu i u zapovjednom načinu . . . . .	15
<i>Osma lekcija.</i> Porodica . . . . .	16
<i>Deveta lekcija.</i> Tvorba riječi. Afiksi pra-, ge-, -in-, -ul- . . . . .	17
<i>Deseta lekcija.</i> Poslovice. Dječja glava. Mudri miševi. Magarac. Pitanja za vježbu . . . . .	19
<i>Jedanaesta lekcija.</i> Lične zamjenice. Neodređena i povratna zamjenica. Primjeri konjugacije (sprezanja) glagola . . . . .	20
<i>Dvanaesta lekcija.</i> Subjekt, predikat, objekt. Akuzativ smjera. Posvojne zamjenice. Afiksi: mal-, -ig-, -iĝ- . . . . .	22
<i>Trinaesta lekcija.</i> Brojevi godina. Pitanja i odgovori. Akuzativ vremena . . . . .	24
<i>Četrnaesta lekcija.</i> Razgovor o domu . . . . .	26
<i>Petnaesta lekcija.</i> Razgovor o seljačkom domu . . . . .	28
<i>Šesnaesta lekcija.</i> U vrtu . . . . .	30
<i>Sedamnaesta lekcija.</i> Prilog. Član. Prijedlozi. Uporaba akuzativa mjesto prijedloga . . . . .	32
<i>Osamnaesta lekcija.</i> Deklinacija. Veznici. Uzvici. Afiksi: bo-, mis-, dis-, re-, -ist-, -aj-. Sastavljanje riječi . . . . .	34
<i>Devetnaesta lekcija.</i> Selo . . . . .	37

<i>Dvadeseta lekcija.</i> Sufiksi: -ec-, -ej-, -ad-, -et-, -eg-, -id-, -uj-, -em-, -estr-, -il-, -an- . . . . .	39
<i>Dvadeset i prva lekcija.</i> Grad . . . . .	41
<i>Dvadeset i druga lekcija.</i> Grad (Svršetak). . . . .	44
<i>Dvadeset i treća lekcija.</i> Komparacija. Uporaba prijedloga „de" i „da". Atributska i predikatska uporaba adjektiva.	47
<i>Dvadeset i četvrta lekcija.</i> Razgovor o bogatstvu esperanta. Afiksi: -ar-, -er-, -ind-, -ebl-, -ing-, -ej-, -nj-, -um-, fi-, -aĉ-	50
<i>Dvadeset i peta lekcija.</i> Participi . . . . .	52
<i>Dvadeset i šesta lekcija.</i> Korelativne riječi . . . . .	54
<i>Dvadeset i sedma lekcija.</i> Vrijeme. Bezlični glagoli. . . . .	56
<i>Dvadeset i osma lekcija.</i> Pisanje velikih početnih slova. Stil. Interpunkcije. Princip dostatnosti i nužde. Oblik pisama . . . . .	58

## II. dio:

### (Štiva).

La songo. . . . .	63
Li konas sin. . . . .	» 63
En policejo. . . . .	63
La konkurĉevalo. . . . .	63
La fakulo. . . . .	63
Skotoj. . . . .	64
Post la amputo. . . . .	64
Strange. . . . .	64
Arlekenaĵo. . . . .	64
Kiaj la patroj tiaj la idoj. . . . .	64
Duobla sciigo_____	65
La rajdemulo. . . . .	65
La tradicio. . . . .	65
Kritiko_____	65
Nova modo. . . . .	65
Pli altaj studoj. . . . .	65
Preferas havi amikojn. . . . .	65
Nun li konas lin . . . _____	66
Ne postulu tro. . . . .	66
Bedaŭrinda fakto. . . . .	66
Ĝentila. . . . .	67

Natura leĝo. . . . .	67
Parto de la leono. . . . .	67
Esploroj de la maro. . . . .	67
Vortoj de japanaj verkistoj. . . . .	67
Ĉerizflorojen la Lunluma Nokto. . . . .	69
La sezonoj. . . . .	69
Esperanto en la universitato. . . . .	70
La stomako de Londono. . . . .	70
Ukrajna popola rakonto. . . . .	70
Rozoj. . . . .	71
Senutila Fontano. . . . .	72
Mia hundo. . . . .	72
Legendo el la monaĥejo. . . . .	73
La saĝa knabo en Siamo. . . . .	74
Por refreŝigo de geografia leciono. . . . .	75
La deveno de l' arta muziko. . . . .	76
Deklaracio pri Esperantismo. . . . .	76
La Fundamento. . . . .	78
La fosiloj. . . . .	79
Parolado de Doktoro Zamenhof ĉe la unua kongreso de Esperanto 1905. en Boulogne-sur-Mer. . . . .	79
Preĝu sub la verda standardo. . . . .	84
La Espero. . . . .	85
Poploj en aleo. . . . .	85
Mia koro. . . . .	87
Al vi ĉion. . . . .	87
Dormemaj birdetoj. . . . .	87
Estis iam rozo bela. . . . .	88
Venu, amatino. . . . .	88
Osoja mutulo. . . . .	89
Amkanteto. . . . .	90
La vojo. . . . .	90

